



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 138 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. JANUARO, 1932.

## “JANE EYRE”

de Charlotte Bronte

tradukita el la angla de H. Bulthuis  
eldonita de W. J. Thieme, Zutphen,  
Holando.

493 paĝoj; ĉe la B.E.A., prezo tolbinda  
11ŝ.

Charlotte Bronte, kun la escepto de E. Browning kaj G. Eliot, estis eble la plej talenta kaj famekonata virino en la literaturo angla de la 19a jarcento. Per sia ĉefromano, “Jane Eyre” ŝi atingis sensacian sukceson, kaj per ĝi influis senteble sur la verkistinojn, kiuj ŝin sekvis. Ĝi estas esence aŭtobiografia, kaj pro ĝiaj kuraĝe realismaj bildoj forte altiris atenton de la leganta mondo.

Temas pri orfino, kiu, sendita al lerninstituto por nedeziritaj infanoj, fariĝas, post kelke da jaroj, tiea instruisto. Poste, trovinte oficon en Thornyfield Hall, sinjora domo, ŝi konatiĝas kun la mastro, Edward Rochester, homo elsuĉinta la sukajn de l'plezura mondo kaj serĉanta ion intelekte pikantan por tion anstataŭi. Li vidas en la etkorpa, viglacierba, sed nebela klerulino, tion, kio ektenas lian intereson, kaj fine amon.

Kiam la libro enmondigis, Rochester estis, por la virinaj legantoj, nova tipo de fikcia heroo, malsama ol la senmakulaj, komplezemaj, ame adoremaj “kavaliroj,” kiuj ĝis tiam paŝiris sur la paĝoj de romanoj. Regema mastro, jen brute kruda, jen indulge ĝentila, li tiranadis super Jane, kiu (laŭ la nova teorio) estante virino, sopiris esti regata kaj posedata de la viro.

La libro abundas je misteroj, teruraj noktoscenoj,—lertaj dialogoj, pensriĉaj meditoj—kaj entute estas sorĉe alloga rakonto. La lingvaĵo de la tradukinto, s-ro Bulthuis, holandano, estas simpla,

flua, kaj plejparte la frazkonstruo estas bona. Oni legadas la verkon, kvazaŭ ĉenita per la intereso al ĝi, kun rava ĝuo, malgraŭ tio, ke la traduko estas multloke tute ne fidinda, eĉ tre erariga. Ĝi donas frapan ekzemplon de libro, kiu devis esti kontrolata de kompetenta anglo, antaŭ ol oni ĝin eldonis. Neanglalingvanoj ne rimarkos multajn el la deviaĵoj for de la originalo, sed estas tre da lokoj, kie ili haltos antaŭ sence enigmaj linioj. Estas evidente, ke s-ro B. tro foje servigis al si fuŝajn tradukaĵojn, ne atentante la anglan originalon. Estas tre rekomendinde, ke tradukantoj esperantigu nur verkojn de siaj samnacionoj, ĉar estas tre tre malofte, ke alilandano faras tute kontentigan tradukon. Sekvante tiun konsilon, oni evitos tiajn absurdajn erarojn, kiuj preskaŭ ĉiupaŝe makulas ĉi tiun cetere bonan verkon.

P.60. La piednoto devas esti cito al Agoj 20/9, sen kio la aludo en la teksto estas tute nekomprenebla. Kial uzi “tifo” kaj “tifuso”? 393/23, granddame estas grandsinjorino, nobelino, tute ne “avino”! 431/27, “ecclesiastical cousin” (“spirita nevo”!); 301, plebeian (“plej belan”!); 233/22, “with a vengeance” (“pro venĝo”!); 76, “Salomo” (legu: Salomono); 144/31, “edzo” (homo); 216/4, 248/17, forigu la frazojn dirantajn pri amo.

Kelkaj frazoj rekte kontraŭas la originalon. Zorga revizio de anglo estis krie necesa.

(Robo)

Juna Germano deziras korespondi kun legantoj de ĉi tiu gazeto. Per letero aŭ ilus. p.k. Hermann Zwickirsch, Henschdorf (Ries e n g e b i r g e) Warmbrunner-str., I, ii., Germany.

**"DANCU, MARIONETOJ."**

Originaloj de J. Baghy.

Eldonita de Literatura Mondo.

2a Eldono. 174 pp. Prezo 3 ŝil. ĉe  
B.E.A.

En unu rilato J. Baghy ĝis nun superas sian grandan konkuranton en la kampo de l'poezio, K. Kalocsay. Li estas kromdotita en tio ke li montris sin majstra fabrikanto de la novelo. Jen aperis dua eldono de liaj elektindaj verketoj, "Dancu, Marionetoj."

"Unu el la Kvar" estas sceno el la Dia Tragedio. Romana soldato pelata de la fera disciplino, devas najli al Kruco ĝuste la Manojn, kiuj redonis vidon jam al okuloj filetaj. La admirinda lerteco de nia hungara aŭtoro atingas plejsupran nivelon en la frazjuvela "Uragano." "La Metropolo Malsatas" estas paĝo el la vivo de "ĉiesulino," kies koron ankoraŭ varmas la amo kompata. La plej longa verkaĵo estas "Nur Homo," kiu rakontas psikan batalon de ĉeĥa militkaptito sentanta la animon ŝirata de sensa kaj de spirita amo. "Kiel Mikok instruis Angle" estas gemo de nia bonhumora literaturo. "Tri Kamaradoj," vualita per komikeco, revokas la amaran historion de ĉeĥa militado dum la mondkataklismo.

Ĉi tiu geniriĉa verko kaj similaj, trezorejoj de la trafesprimo, decidus venke por Esperanto la demandon pri tio, ĉu ĝi rajtas roli kiel artesprima lingvo, taŭga en ĉiuj rilatoj vortvesti la senfine variajn pensojn de l'homo.

Bedaŭre, la preseraroj de la 1a eldono ankoraŭ restas en la nova. Mankas finpaĝa listo de la iom multaj neologaj vortoj.

(Robo)

**"LA LINGVO DE LA BESTOJ."**

An eloquent plea by Florence Barker, B.A., for a more humane attitude toward the lower animals. She denounces vivisection as a cruel and wasteful absurdity, and asks for help in the worldwide dissemination of the principles laid down in the "Animals' Charter." The speech was delivered in Esperanto at the Oxford Congress. 24 pages, price 3d., from Nacia Konsilantaro pri Bonstato de Bestoj, 36 Gordon Sq., London, WC1.

**NIA ADRESO!**

Box 731 F,  
P.O., Elizabeth-str.,  
MELBOURNE,  
Australia.

**THE PYKE MEMORIAL  
EXAMINATION**

Was held 14th November in the Australian Church Hall, Melbourne. Six candidates sat, four for the diploma, and two for the prize of £5/5/-, which was gained by Mr. Alfred Pitt. Mr. Pitt, the "best 12 months' student," was recruited to Esperanto as a result of a wireless talk last January. Those to gain the Memorial diploma were Mrs. A. Hintze, Mr. Roy Hastings, and Mr. Max Schmidt.

Indications are that there will be a good entry for 1932.

The committee intends early in the new year to get into touch with groups in the other capital cities with the aim of extending the range of the Examination.

**COBURG ESPERANTO CLUB.  
Annual Report.**

The annual meeting of the Coburg Esperanto Club took place in the Labor Hall, Sheffield-st., Coburg, on Thursday, 19th November. The attendance of about 20 showed keen interest in the balance-sheet presented by the secretary, Mr. Spencer. Mr. Williams occupied the chair. The following office bearers were elected for the ensuing year: President, Mrs. Hintze; secretary, Mr. Spencer (re-elected); auditors, Miss Trenoweth and Mr. Williams.

The club has gone on steadily since it was formed two years ago, and expects an influx of new members in the new year. We were pleased indeed to congratulate Mrs. Hintze on gaining her certificate at the Pyke Memorial Examination. Next year we hope a large number of our members will also gain their certificates.

We wish to thank Mr. Glaisher and Mr. Perkins, and also other helpers, for their valuable assistance; and to regret to state that one of our members, Mr. Bob Lowe, is very seriously ill. All members join in wishing him speedy recovery.

In conclusion we wish all clubs and fellow-esperantists a Merry Christmas and a prosperous New Year.

**KOBURGA ESPERANTO-KLUBO.  
Jarraporto.**

La jarkunveno de la Koburga Esperanto-Klubo okazis la 17an de novembro en la Laborista Halo, Sheffield-st., Koburgo. Proksimume 20 anoj ĉeestis kaj

montris intereson pri la bilanco donita de la sekretario, s-ro Spencer. S-ro Williams prezidis. La jenaj elektigis: Prezidanto, s-ino Hintze; sek-io, s-ro Spencer; kontrolantoj, f-ino Trenoweth kaj s-ro Williams.

La klubo progresis mezrapide dum la pasinta jaro kaj atendas multon da novlernantoj en la venonta. Plaĉis al ni gratuli s-inon Hintze, kiu gajnis la Ateston de la Pyke Memoriga Ekzameno. Esperable en la proksima jaro multe da niaj anoj gajnos la Ateston. Ni tre dankas al s-roj Glaisher kaj Perkins kaj aliaj instruantoj pro ilia valora servo.

Bedaŭrinde s-ro Bob Lowe, unu el niaj anoj, grave malsanas. Ni ĉiuj deziras al li baldaŭan resaniĝon.

La Koburga Klubo deziras al ĉiuj samideanoj kaj kluboj "gajan Kristnaskon kaj prosperan Novjaron"!

### LIVERPOOL UNIVERSITY. Esperanto Lectorate founded.

British Esperantists lived through proud moments on the 10th October last year, when, in the great lecture hall of the Liverpool University some 130 educationists gathered for the first ceremony of its kind to take place in any English university.

It was the inauguration of the "J. Buchanan Esperanto Lectorate," now an official part of the language courses in the university. The late Dr. Buchanan left portion of his estate for the establishing of Esperanto in scholastic circles.

Prof. L. Wilberforce presided, and Prof. W. Collinson spoke on The Structure of Esperanto as compared with that of Other Languages, outlined the characteristics of Zamenhof's creation, and strongly urged its fitness for the scientific field.

### HAGUE TELEPHONE ADMINISTRATION USES ESPERANTO.

New automatic telephones were recently installed in The Hague, a city largely visited by foreigners. The instructions as to the use of the devices were, therefore, printed in French, German, English and Esperanto, besides Dutch.

The Administration is to be praised for its progressive spirit. Why not send a card of congratulation to:

Gemeentelijke Telefondienst,  
Marnixstraat 18,  
Den Haag, Nederlando.

### ESPERANTO ON THE MARCH.

We have learned—

That "The International Good Templar," the quarterly organ of the International Supreme Lodge of Good Templars, has an Esperanto column, giving news of the anti-alcohol movement in all countries.

That Amiens (France) now has its Zamenhof-street; and so has Barcelona, Catalonia's capital.

That, despite the crisis, 3,000 copies of "Das leichte Esperanto" ("Easy Esperanto") were sold in Germany during October last.

That the Italian Tourist Club (400,000 members) will publish No. 2 of the Esperanto guide-books, "Romo." The volume will be about twice the size of the first, "Milano Kaj Lagoj de Lombardio," which has almost been sold out.

That the Czecho-Slovakian railways has published wholly in Esperanto an illustrated booklet, "Monograph of Czecho-Slovakian State Railways.

That the Institute of Meteorology at Ljubjana, Jugo-Slavia, has published a resume of observations, titles of which are in Esperanto as is also a long article on hydrography.

That daily lessons on Esperanto were broadcast from JOBK, Osaka, Japan, from 20th July to 31st August last. Relayed by two other stations, the course was a huge success. **Twenty thousand textbooks** were sold in connection with it.

### TO OUR SUPPORTERS

We give thanks for the following:—

Mr. N. Mills, 5/-, Aug., '32; Frau E. Boden (per Mr. Holloway), 5/-, Dec., '32; Mr. F. Luhnig, 5/-, Dec., '32; Miss C. Bauer, 9/-, Dec., '33; Anon, 21/-; Miss L. Saw (donaco), 5/6; Mr. F. Archer (donaco), 10/-; Mr. H. McKerrow, 5/-, Feb., '31; Miss H. Bostock, 2/6, June, '32; Advert, 2/-; Mr. E. Hart, 5/-, Sept., '31; Miss J. Gray, 4/6, Dec., '32.—Total, £3/19/6.

**Sir J. A. Thomson**, brita zoologo, proponas kiel la kvar ĉefmirindaĵojn de l'universo la jenajn:—

- (1) La potenco, kiu tenas la ĉielajn korpajn turniĝantaj sur sia aksō.
- (2) La vastegeco de l'espaco.
- (3) La delikategaj meĥanismoj, kiuj karakterizas la vivon de eĉ la plej mikroskopaj insektoj.
- (4) La bonordeco de l'Naturo mem.

**"MINIATUROJ"**

de G. D. Nash.

Eld. de Esperanto Publishing Company.  
58 p. tolbinda, 2/6p. ĉe B.E.A.

Kolekto da mallongaj poemoj. Dezirinde estus, ke la verkinto parafrazu kelkajn el la plej nebulaj en kompreneblan prozon. Li montras lingvan talenton, sed ofte lia penso estas tro subjektive subtila, kaj evitas la katenon el vortoj, per kiu li penas ĝin ligi al la paĝo. Eta Manet' kaj Ironta al Foiro pli impresas.

Demando leviĝas, ĝis kioma grado havas la poetoj rajton kontraŭigi la lingvan unuigadon de Esperanto? Ekzemple, s-ro Nash uzas "korono," "rituale," "kalt'" anstataŭ "kron'", "rit'", "malvarm'" nur por belsonigi liniparon. Tiuj formoj estas iom vaste komprenataj en Eŭropo, sed preskaŭ tute ne en Oriento. Ni ne oferu for nian nepre-havendan unuecon lingvuzan, lasante al poetoj danĝeran rimedon eviti malfaciletojn alimaniere venkeblajn. Ŝajnas esti opinio ĉe kelkaj homoj, ke Esperanto ne taŭgos por la poezio antaŭ ol ĝi ŝvelos ĝiskreve, englutinte la esencan vortaron de ĉiu ĉeflingvo de Eŭropo.

Iuj preseraroj ĝenas. Nebona elizio de akuzativa finaĵo ĉe:

"Ripozon trovu mi en okcident'

Serena sunsubir', kaj bela mortkontent'".

(Robo)

**EVANGELIAJ KRISTANOJ.**

Abonu "La Kristana Revuo"

Jare 1/6p. Dumonata.

"Notoj pri Malnova Testamento"

de M. C. Butler.

Tradukoj de H. Luyken k.a. kom-  
petentuloj.Red. F. Hanbury, "Antaŭen," Slewins-  
lane, Hornchurch, Essex.**"LA ESPERANTISTO."**

(1889-1895)

Only two persons in the world possess the complete series of "La Esperantisto" (Nurnberg). They are a Mr. Bailey, in Manchester, and Herr E. de Wahl, en Reval (Talinn). Herr Eugen Wuster, of Berlin, has every copy except No. 11 (1890). It goes without saying that copies of this gazette are very valuable, and are eagerly sought for. The same applies in varying degree to all the early Esperanto organs; especially coveted are those in which Zamenhof's hand is seen.

**ESPERANTO WORKS!**

A certain ex-inspector of schools in England wished to possess the extremely rare Ostronomir Gospels in Russian. He advertised in French and German papers, visited France and Germany for to find the work in the haunts of bibliophiles, but in vain. At last he informed Mr. W. Hurst, an Esperantist of Huddersfield, who put an advertisement in "Heroldo de Esperanto" (Koln) and "Esperanto" (Geneva). He received three replies from Russia and finally bought the literary treasure for £10. He would willingly have given twenty. Is this not a striking proof of the worldspread influence of Esperanto?

(From "Heroldo de Esperanto")

**SENDU RESPONDKUPONON!**

Sendante al gazeto por specimen-numero, nur ĝentile estas enmeti respondkuponon. Cetere estas firma regulo ĉe La Suda Kruco, ke neniam ĝi sendas specimenon kontraŭ nura peto. La financa ekvilibro de nia gazeto estas tiele delikata, ke absolute neeble estas sendi al homoj volantaj senpagajn ekzemplerojn. Pro tio, ke jam kelkaj gazetoj, adresaroj kaj similaj eldonaĵoj presis nian adreson sen la nepre necesa aldono—"Sendu respondkuponon"—ni ricevas preskaŭ ĉiupoŝte du-tri petojn neakompanitajn de la konforma afrankkosto. Ni dankus al ĉiu adresaro ktp. en kiu troviĝas nia nomo-adreso, se ili tuj enpresus aldona la avertantan linion.

Al ĉiu sendinta resp. kuponon ni kutimas ekspedi almenaŭ du ekzemplerojn.

(Redakcio)

**BIALYSTOK.**

A card to J. Šapiro, Marsz. Pilsudskiego 14a, Bialystok, Poland, will bring you a folder describing the town where the creator of Esperanto was born, and a program of the "post-kongreso" held there in August. An appeal is also made for funds to erect a 36-feet high monument to its famous citizen. The space has been given and the foundation laid.

**LA NEKONATA EVANGELIO**

Kiun Kristo predikis, 50-paĝa sen-paga libreto oferita. Konkiza, en legeblaj ĉapitroj. A. Broughton, 140 Wiggan Street, BIRMINGHAM, Anglujo. Citu "Suda Kruco."

## PARALLEL TRANSLATION.

"MR. TOT AĈETAS MIL  
OKULOJN."

Originalo de Jean Forge.

Eldonita de "Literatura Mondo,"  
Budapest.

Paĝoj 243, prezo broŝurita 3s3p., tol-  
binda 4s8p., plus 4p. sendkosto ĉe  
B.E.A.

Jen la tria romano de J. Forge (plumnomo de poldevenulo Fethke), reprezentanto de la moderna stilo Esperanta. De post apero de lia "Saltego trans la Jarmiloj" ĉi lerta plumo iakiale sekigis, kiom koncernas nian lingvon, sed jam denove ĝi fluas, pentrinte kun majstra facileco kolorplenan vivpecon de riĉulo, konsumata de l'mondumaj enuoj, kiu venas sub la tiranan potencon de psikosciencia krimulo. Ĉi tiu inventas "televizoron," per kiu li povas vidi tra la muroj de la materio. S-ro Tot aĉetas ĝin, kio al li malfermas la pordon al teruraj aferoj. La nuda animo de l'homo montriĝas al liaj mirstreĉitaj okuloj kaj bateganta koro; li kapantaŭe saltas en amfrenezion, fie aranĝitan de la psikisto kaj ina komplico. Sed Tot feliĉe havas duulon, similulon. Ĉi tiu mortas, kaj lia amintino, nesciante pri tio, venas goje en la brakumon de la bonvenanta Tot, kiu vidas en ŝi knabinon fresan, nedifektitan de la societa mondo.

La lingvaĵo estas tre originale-prima, plena de trafaj parolturnigoj; ĝi radias vivecan evoluemon. Danĝero nur estas, ke homoj malpli kapablaj ol la aŭtoro, imitante lin, malutilos al la lingvo. Interese estas kontrastigi ĝin kun la lingvo de Kofman kaj Wasniewski, stilistoj de 1898.

La verko estas spicita per iom tre da neologismoj, el kiuj nur kelkaj havas klarigon en posta listo.

"Rasa" (ekz. 8/1) uzata strangasence kvin fojojn (ŝiaj rasaj kruroj!!); manekina pupo (vaksa figuro por magazenfenestro); meneĝero (A manager); filmstatisto?; limuzino (luksa aŭtomobilo); mokko (Mocha kafo); komplico (kunkrimulo); sadisto (psike-malsanulo, kiu avidas kruelon); ateliero (laboreja, metieja). Trouzo de -em; multa verbigoj de adjektivoj—necesas sesa senso (!); d-ro K. oportunas en fotelo (brakseĝo); kurioza figura uzo ĉe "strikas (ĉesas funkcii) la fortoj de la virino." (Robo)

"MR. TOT BUYS A THOUSAND  
EYES."

An original Esperanto work by  
Jean Forge.

243 pages. Price 3/3 and 4/6.

This is the third novel by Jean Forge (pseudonym of one Fethke, of Polish descent), representative of the modern style in Esperanto. After the appearance of his "Saltego trans la Jarmiloj" (Leap over the Milleniums) this artful pen for some reason ran dry, as far as Esperanto is concerned, but now, in flow again, it has painted, with the ease born of mastery, a lurid fragment from the life of a pleasure-worn plutocrat, who comes under the tyrannical power of a criminally-minded psychologist. This scientist has invented a "televizor," by means of which he is enabled to visually penetrate matter. Mr. Tot buys the contrivance, an act that opens for him the door to many a terrible experience. The naked souls of men are revealed to his awe-stretched eyes and throbbing heart; he falls headfirst into an infatuation shamefully arranged by the psychologist and a female accomplice. Luckily, however, Tot has a double; this person dies, and his lover, all unknowing, yields joyfully to the embrace of the willing Tot, who sees in her a girl fresh and unspoiled by Society.

The diction is highly original in its expressiveness, full of apt turns of speech; one sees manifested throughout a lively tendency to evolve the language. The only danger of this is that writers less capable than the author may imitate him to the detriment of Esperanto. It would be interesting to contrast the language of Forge with that of Kofman and Wasniewski, stylists of 1898.

The book is somewhat peppered with neologisms, only a few of which are explained in a list at the back.

1928, 1929, 1930

JARKOLEKTOJ DE "LA  
SUDA KRUCO" ESTAS  
HAVEBLAJ.

ĉe Box 731 F., P.O.

Elizabeth-st., Melbourne.

Interesaj artikoloj kaj skizoj Esperant- kaj angalingve.

Pike atentotenaj prilingvaĵoj kaj librorcenzoj.

Prezo: tri ŝilingoj, inkluzive sendkosto, por ĉiu.

(fratorganoj bv. represu)

## "HUMAN DOCUMENT"

of Lazarus Ludovic Zamenhof.

"On four sheets of paper he had begun to set down the intimate confession, but death had interrupted him. Three of the sheets contain an explanatory foreword, in which he asked pardon for treating a subject on which he had had no special training. Possibly some will say, as has been said of others, that only after entering on old age he occupied himself with the matter of religion. In anticipatory protest against this he wrote:—

'All that I here set down entered my thought, not now, but some forty years ago, when I was 16-18 years old; although I have since that time meditated much and read different scientific and philosophical works the thoughts I had in those days of God and of immortality have hardly changed a whit.'

"He nevertheless foresaw that this article would be displeasing to many:—

'I shall lose all esteem in the scientific world, and for such loss shall find no compensating sympathy among believers, who, it is more than likely, will attack me, for my creed is quite other than their creed . . . . It were prudent that I keep silence, but I cannot.'

"The fourth page was only begun. The writing is almost illegible:—

'My mother was a religious believer; my father an atheist. In my infancy I believed in God and in the immortality of the soul, in the form given by the religion in which I was born. I cannot now remember precisely in what year I lost religious faith, but I recall that I entered the most acute phase of my unbelief at about the age of 15 or 16. That period was also the most tormenting I have ever lived through. Life and all that it means lost in my eyes all reason and value. With contempt I looked on myself and on others, seeing in them and in me nothing more than useless flesh, created one knows not why or for what end—flesh, whose brief life is but a flash in eternity, flesh, which is soon to putrify for ever, and which through countless aeons of time will never be seen again. To what end do I learn, labor and love? For all is so senseless, useless, so ridiculous . . . .'

"There the confession ends. On the remainder of the page is jotted a note on the projected sequence of the writ-

ing: after the disgust of life and of death, there came to his mind, at 17, a new thought:—

'I began to feel that possibly death is not disappearance . . . . that there exists certain laws of Nature . . . . that something is shielding me for a lofty end . . . .'

"These were the last words he wrote. Dying, Zamenhof carried his secret with him."

(Pages 198/200 of "La Vivo de Zamenhof," by Dr. E. Privat; translated Robo.)

[George Allen and Unwin have just published the complete book, translated by Ralph Elliott. Price 4/6, at B.E.A., Museum St., London, W.C.1.]

## PRI NEOLOGISMOJ.

(Respondo)

Preskaŭ en ĉia pli serioza nacia revuo oni trovas vortojn aŭ esprimojn nekonatajn; estus do troa pretendo voli senescepte kompreni ĉiun vorton aŭ esprimon aperantan en Esperanta gazeto, precipe se temas pri faka esprimo. Eĉ la redaktoro kelkfoje mem ne komprenas la signifon de iu vorto; li devas ĉikaze fidi la kompetentecon de la aŭtoro. Jen la vortoj de via listo klarigitaj laŭ eblo:

Agro (kulturebla kampo); baremo (tabelo de antaŭpretaj kalkuloj); anhelu (malfacile spiri); ĉantaĝi (trudpostuli de iu monon aŭ favoron per skandalminaco); blago (ŝerca mensogo); forsto (metode flegita arbaro); ŝika (laŭmode bongusta); vito (arbeta produktanta la vinberojn); minusklo, majusklo (malgrand-, grandlitero komenca); orlo (refaldita bordero ĉe tuko aŭ vesto).

Ne maltrankviliĝu pri via Esperanto-kono, se kelkfoje vi trovas vorton aŭ esprimon nekonatan al vi! Tio okazas eĉ al la plejperfektulo. Tio ne estas manko de Esperanto, sed pri tio kulpas nia homa neperfekteco.

## ESPERANTO KAJ RADIO.

### BRODKASTOJ EN N.Z.

Du stacioj en Nov-Zelando dissendas E-ton, nome 3YA (Christchurch) kaj 1ZR (Auckland). De la unua s-ro N. M. Bell, M.A., longatempe regule parolis ĉiusessemajne, kaj pastro T. R. Wolloxhall jam de 24 junio parolas el 1ZR pri E-to. En 16 septembro li traktis pri "Esperanto en lernejoj de la tutmondo."

## Why Not Advertise in "LA SUDA KRUCO"

The Paper that is NEVER THROWN AWAY,  
So your Advertisement is always Alive

Rates on application.

Support those who advertise in "La Suda Kruco"!

### "LINGVO, STILO, FORMO"

de K. Kalocsay.

Eldonita de Literatura Mondo,  
Budapest.

142 pp. Prezo 4ŝ. 6p. ĉe B.E.A.

Fasko de priliteraturaj studoj verkitaj de eble la plej majstra ankoraŭ vivanta poeto Esperanta, homo riĉe dotita per la lingva sentemeco. Ĝi konsistas el ok eroj: (1) Esperanta Vortfarado. Valora kontribuo al la vortanalizo, temo fundamente grava, sed ankoraŭ studata kun intereso nur de malmultaj. (2) La Evoluo de nia poezia lingvo, prelegita antaŭ la Oksforda Kongreso. Linion post linio oni lege sorbas. Plenplenas ĝi je rimarkindaj lingvaj sugestioj, kaj pikaj observoj pri la principoj laŭ kiuj laboris Grabowski, tradukante "Sinjoro Tadeo," "la plej granda fortostreĉo en Esperanto." (3) Sendemandaj Respondoj pri diskutindaj punktoj en la lingvouzo. (4) La Esperanta Rimo, ĝis nun plej ampleksa traktato donita pri tiu temo. En ĝi Kalocsay kuraĝe, pacience provas meti bazojn, sur kiuj la poeziaj eblecoj de Esperanto povu pli libere multiĝi, disflori. Sekvas Esperanta Elparolo, Esperanta Ritmo, La Klasika Metriko en Esperanto, kaj fine La Mezepoka Esperanto, en kiu li ŝerce sovas nian lingvon en groteskan veston.

Al multaj, kiuj sentas rajton fanfaroni en si pri siaj Esperantaj konoj, la verko konvinkos, ke vere tiuj konoj estas relative mizeraj. Tamen pride-mandindaj estas unu-du punktoj ankoraŭ dubaj: en la opinio de kelkaj,

la lingvaĵa koncizo ĉe "Sinjoro Tadeo" estas oftloke troa, malfaciligante per tio la fluan legadon. La rimarkoj sub "iu" kaj "ia" povos naski nekonsentojn. Ankaŭ, ĉu oni ne povas uzi la indikativon post "kvazaŭ"? Zamenhof uzis ambaŭ formojn; nesage estas fari malmolan regulon. Estas delikata nuanco de diferenco inter la frazoj: Li marŝas kvazaŭ li estas ebria, kaj. Li marŝas kvazaŭ li estus ebria. En (a) estas subkomprenata opinio, ke li efektive estas ebria, sed en (b) ne estas tia, kaj la signifo nur estas, ke li marŝas kiel marŝas ebriulo. (Eble aŭ efektive li estas lama aŭ malsana). 85. Estas dube, ke "ĝuste" havas tempan forton en la frazo: Li ĝuste manĝas" (ĝuste nun manĝas); ĉu ne "post kiam mi finos (aŭ, kiam mi jam finos) la laboron, mi iros promeni"? Uzi la pasinttempon en la unua frazo ne ĝuste esprimas la penson. 86. Li ek-sedziĝis al (ĉu ne "de"?). ŝi. 50. "en-vidas" (preseraro? envias); 61/21 venu (rigardu); 63/1 kara (klara); 81 plumpa vorto (G. plump, —A. clumsy, awkward). —Robo.

### TO PHILATELISTS.

According to Soviet law the export of stamps is forbidden to private persons. Business can, however, be done through the Soveta Filatelista Asocio, ul. 1a, Tverskaja-Zamskaja d. No. 3, Moskvo. This association corresponds in Esperanto.

### KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

### POR SVEDOJ.

#### Ekzercara libro por elementa kurso en Esperanto.

Ellaborita de Sam. Jansson. Prezo sved. kr. 0,50.

La libro kompletigas la kurson per korespondan de Sveda Esperanto-Federacio, al kiu sin anoncis dum la aŭtuno pluaj du mil partoprenantoj. Krome la libro estas uzota je la radialecionoj esperantaj, kiuj okazos la unuan dimanĉon en ĉiu monato.

La gramofona kurso en Esperanto estis bone akceptata de la svedaj esperantostudentoj. Pli ol cent kursoj jam estas venditaj. La kurso konsistas el tri diskoj, kiuj kostas kune 12 kr. (por afranko ekster Eŭropo aldonu 5 sv. kr.), enhavas sur la unua disko modelan elparolon kun parte instruado por svedoj, sur la dua ekzemplojn el la Fundamento kaj sur la tria dialogojn. La dua kaj tria diskoj enhavas nur Esperanton.

Novspeca propagandilo konsistas el malgranda mondatlaso, "La tuta mondo sur 14 landkartfolioj," uzata de diversaj firmoj kiel reklamilo. La eldoninto aldonis propagandan tekston pri Esperanto kaj vendas ĝin je sv. kr. 0,35. Ĝi estas vendata kiel mondatlaso, ne kiel propaganda broŝuro esperanta. Ĝi tamen servas kiel propaganda broŝuro.

La granda oficiala libro pri la polustragedio de Andrèe, "Per balono al la Poluso," fariĝis tre granda sukceso. De la tuta eldono restas nur ĉirkaŭ cent ekzempleroj, kiujn la eldonejo konservas por la estonteco.

Mendu supraĵn ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Sweden.

### ROMAIN ROLLAND AND ESPERANTO.

"True it is that the spread of Esperanto will not be sufficient to suppress among men misunderstandings and grounds for quarrel, for in every country, speaking one language, there exists today fierce discord; but Esperanto will make choice among the world's spirits, will group together kindred souls now scattered over the globe and separated by the bars of differing speech. Thus will be formed, over and above the problems of race, class and party, an international people." (Romain Rolland, author of "Jean Christophe," in a letter to Esperantist George Mahn, 1920.)

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A. Skribu al Sekretariino.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

**Redakcio-Administracio :**

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 139 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. FEBRUARO, 1932.

**"THE LIFE OF ZAMENHOF."**

Translated from the original Esperanto of Dr. Edmond Privat by Ralph Elliott.

Published by Messrs. Allen and Unwin, London.

123 pages. Price 4/6, post 6d.

There are those in Australia and New Zealand who have clasped the hand of the modest little Polish oculist; of every civilised country the same can be said. This fact, inapplicable to many a louder name, is but one of many rays emanating from the universal character of the man and his work. Every Esperantist worth the name is at least fairly familiar with the life and labor of this unique figure. The same is, we regret, not true of the general public. The circumscribed meeting hall, the monthly broadcast, the occasional gazette article have not been enough to effect this enlightenment. The Book, the permanent record, was needed to fittingly carry abroad the message of deliverance from Babel's curse. This need has been met for the English-speaking world by Messrs. Allen and Unwin, who we believe to be the first house to issue the "Life of Zamenhof" in a national language, an act of enterprise that has, for once, shown the way to Continental publishers.

Of Lazarus Ludovic Zamenhof it has been said that his mother's heart, his father's brain, and the environment of a Polish village torn by racial hatred went to his making. It would seem that, in the order of things, such a man must needs have been called forth, for his life span covered the decades marked by the introduction of those technical conquests that were to usher in our present International Age.

And the flower of his genius, the language Esperanto, bids fair to become the cardinal factor in the cultural welding of the world's peoples.

It is difficult for the reader sensitive to the beauty of heroic struggle to voice the lines of this book without betraying certain emotion. The naive longing of the child Zamenhof for a better world; the lonely anguish of his student years; the recompense of joy at the prospect of victory heralded by the Boulogne Congress in 1905; the years of application that gave to posterity masterly translations from a dozen tongues; then the seeming annihilation of all idealism when the world caught fire in '14, and the final folding of tired hands in Warsaw, 1917—these pulsating pages were penned by one who shared intimately the hopes and disappointments of "La Majstro," by one who, by virtue of his eloquence in the interlanguage, has been named the Demosthenes of the movement.

The translator has finely succeeded in conveying to the English reader the accurate sense and rich coloring of the original; rare indeed are the slight evidences of the prism through which they passed. We confidently urge every Esperantist adept and sympathiser to help to the utmost in giving to this "Life" the scope of usefulness it deserves.

**PUBLIKA LETERO**

pri la reorganizado: Memorando al la Esperantistaro kaj ĝiaj gvidantoj, de Julio Baghy. 23-paĝa broŝuro. Eldono de Hungarlanda Esp. Societo, BUDAPEST, VIII, Dohany-utca 76. Prezo: 1 poŝta resp. k.

---

**Watch this Space for a Special Announcement next month.**

---

### SYDNEY ACTIVITY.

The Sydney Esperanto Society, whose chief meeting place is in Manning Buildings, 449 Pitt Street (opposite The Hotel Sydney), has just opened a School of Esperanto in Paton's Buildings, No. 2, Crystal Street (corner of Parramatta Road), Petersham, N.S.W.

It was intended to hold the classes on Monday evenings only, but, thro' judicious advertisement in the local newspaper, and by personal canvass during a few weeks, news of the venture has become so widely known, and the response so encouraging, that the organiser has decided to institute a ambitious course of subjects as follows:

**Beginners' Circle, Mon., 7.30 p.m.**  
**Advanced Circle, Mon., 8.30 p.m.**  
**Special Circle, Mon., 9.30 p.m.**  
**Commercial Circle, Tues., 7.30 p.m.**  
**Teachers' Circle, Tues., 8.30 p.m.**  
**Linguaphone Circle, Tues., 9.30 p.m.**  
**Religious Circle, Wed., 7.30 p.m.**  
**Debating Circle, Wed., 8.30 p.m.**  
**Geography Circle, Wed., 9.30 p.m.**  
**Science Circle, Sat., 7.30 p.m.**  
**Legal Circle, Sat., 8.30 p.m.**  
**Travel Talk Circle, Sat., 9.30 p.m.**

There will be four sessions each year, each session consisting of 13 lessons, each lesson of one hour's duration.

The first session commenced on January 11th. Already there are sufficient entrants to form three circles, each of ten pupils, and others are being enrolled.

Also, it is being made possible to inaugurate day classes for school children, as several parents have expressed the desire to have their little ones instructed in Esperanto.

Mr. A. W. Peacock, a native of Colac (Victoria), who studied Esperanto in Japan 26 years ago, and who was residing in that country during the Russo-Japanese War, and for several years after it (1904-1909), was engaged in the study of the Japanese language when Esperanto was first introduced into that country. The whole class immediately took it up with enthusiasm, each pupil purchasing for himself a Dictionary of English-Esperanto, by J. C. O'Connor, and an "Esperanto" Handbook, by the same author. Rapid progress was made by the use of these

two books, but they were handicapped through having no one who could correct them in **the matter** of pronunciation.

However, the Japanese people quickly realised the great advantages to be derived by them from its use, and applied themselves diligently in studying it. This is confirmed in "La Suda KrucO" of November, 1931 (page 310), under the heading "Esperanto on the March" (paragraph 2).

Mr. Peacock, the organiser, is voluntarily devoting his energies to this experimental tuition, and no effort is being spared to make the venture a success. This gentleman is a linguist of no mean order, and has spent nearly ten years in close contact with the peoples of India, Malaya, China and Japan.

He is also a good Latin and French scholar, and, through constant and diligent lingual studies, has acquired a wealth of knowledge of other important European languages. He believes wholeheartedly that Esperanto is the only hope of world-amity, and is an ardent preacher of its wonderful merits and possibilities.

Unfortunately, Australia is so far away from the hub of commerce that its people fail to realise the utility of such a powerful factor at their very hands.

There are however, many indications that the aloofness hitherto in evidence concerning Esperanto is fast dying away. A few ardent spirits constantly at work in the various trade centres will do much to bring to the minds of Australians a realisation that, while they are sleeping, the world is seizing upon Esperanto as the sole solution to many a difficulty that hitherto only war has been called on to decide.

From time to time this paper will be advised as to the progress of this experimental undertaking, the success of which, it is hoped, will be the forerunner of a revived interest in our wonderful and efficient auxiliary tongue.

### RAPORTO DE LA KURSESTRO.

**Petersham-filio de la Sydney Esperanto Society.**—La 9an de januaro akurate je la oka horo la Sekretario de SES (s-ro L. E. Pfahl) venis en la

Watch this Space for a Special Announcement next month.

ĉambiron por fari la inaŭguracian ceremonion vice de s-ro E. A. Pryke, kiu estas bedaŭre malsana.

La grupo en la kunveno inkluzivis kelkajn negocistojn; ĉi-kiuj forte interesiĝis je nia movado. Ili sentis surprizon pro la rapida progreso kaj la granda pensemeco de la loka organizanto, kiu tute respondecis pri la afero.

Dum la kunveno kelke da personoj varbiĝis por la kursoj; ili pagis la kotizojn, aĉetis lernlibrojn kaj verdajn stelojn. Ĝis nun ĉirkaŭ 35 homoj jam enregistris sin, ankoraŭ pliajn ni atendas.

La kunveno finiĝis je la 11a15 vespere, kaj eĉ tiam kelkaj ŝajnis ne voli foriri hejmen.

Pri la sabatvespera kunveno jam sufiĉe! Jen iom pri la unua kurso de la instruado la sekvantan lundon. Dek tri personoj ĉeestis. Oni uzis la nigran tabulon kaj penis interese teni la atenton. Kiam la leciono finiĝis neniu kursano deziris foriri, sed prefere restadis babilante inter si dum ankoraŭ unu horo.

Mardvespere kelke el tiuj lernantoj venis por plua leciono, kiun mi donis. Merkredvespere mi donis al aliaj leglecionon el la Nova Testamento, "La Preĝo de la Sinjoro," klarigante al ili vorton post vorto dum tre plaĉa horo. Ili deziris, ke mi klarigu al ili en la venonta merkredo "La Predikon sur la Monto."

Ŝajnas al mi, ke la entrepreno bone progresas kaj ke ĝi donos al la movado ĉitiumurba konsiderindan antaŭpuŝon.

Saluton de via sincere,  
A. W. Peacock.

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned:—

That Viroflay (France) also has a "rue Zamenhof."

That the famous Japanese aviator Kato Masami has compiled a technical dictionary in Esperanto. He was recently appointed commander of the important 'drome at Dairen.

That the State of Lichtenstein has again issued a set of official post cards with views and explanatory text in German and Esperanto.

That the association for the blind, "Valentin Haüy" (France) has undertaken the printing in Braille of a French-

Esperanto dictionary.

That "The City Literary Institute," the most important body of its kind in London, has arranged a course of lectures on Esperanto literature. There are to be 36 lectures of two hours' duration each. Some 120 students attend the Institute's Esperanto classes.

That Count Kalocsay is translating the whole of Dante's Inferno for "Rivista Italiana di Esperanto." The first "kanto" appeared in the October number. Address: Via Goffredo Casalis N25, Torino, Italy.

That Seattle (KJRK) U.S. radio transmits at wavelength 970 metres Esp-o course and chronicle every Saturday; Huizen (Holland) on 1,875 metres an Esp-o course every Saturday; Osaka (JOBK) transmits every day in Esperanto (except Sunday).

That there were 12,667 transmissions on and in Esperanto from the world's radio stations in 1930.

That the Greek Ministry of Education has again willingly issued a decree favoring the instruction of Esperanto in schools and colleges.

That again the "Istituto Fascista di Cultura" in Brescia, Italy, has included Esperanto in its language program for the year.

50,000 PESETAS  
for Spanish Esperanto Institute.

Senor Domingo, Spain's minister of education, has decided that the budget shall include the sum of 50,000 pesetas (£2,100) as a subvention to the Spanish Esperanto Institute for the establishment of chairs of Esperanto. With this money the S.E.I. will found free chairs in 13 towns. The institute will also set apart good prizes for the two best scholars in each town at the end of the courses, which will run from January to June, the only condition being that the candidates attend the Paris Congress of Esperanto in August next.

—Heroldo de Esperanto.

[Senor Rosenorn, president of the Spanish Esperanto Association, urges Esperantists to inundate, if possible, the office of the Minister with cards of approval, and to send to him gazettes printing this report. He says that on

Watch this Space for a Special Announcement next month.

such action possibly depends official introduction of the auxiliary language. The question is almost certain to be considered when the Government has mastered the initial difficulties of transition. Address: Senor J. M. Rose-norn, Sagasta 10, Madrid, Spain.]

### "WANPAOSHAN INCIDENT AND ANTI-CHINESE RIOTS IN KOREA."

Detailed account of the above from the Chinese viewpoint. Sixty photo-illustrations, good paper and get-up. Conscious of the Englishman's profound ignorance of the Chinese language, it is in no spirit of captiousness that we give herewith a sample of the author's delightful style. "A whizzing bamboo pole was thrown out by one of his followers (read "pursuers") and unmissingly **hit** upon his head." Write to International Relations Committee, 5 Maotah-str., Nanking, China, in English or Esperanto.

### ' SEQUEL.

The director of the Hague Telephone Administration has been impressed by the large number of cards and letters he received from foreign and Dutch Esperantists approving his introduction of Esperanto into Spain. into the service. He expresses his hearty thanks. (See page 324).

—Heroldo de Esperanto.

### NEKROLOGO. S-ro W. Cornish.

La 28an de Septembro, 1931, mortis en Wellington, N.Z., ankoraŭ unu el la Nov-Zelandaj pioniroj de Esperanto, s-ro Vilhelmo Cornish, je la aĝo de 66 jaroj.

Dum pli ol 25 jaroj s-ro Cornish tenis grandan intereson en Esperanto. Li estis unu el la fondintoj de la antaŭa Esperanto Klubo ĉe Wellington kaj trapasinte B.E.A. ekzamenon en 1909 gvidis klason dum la jaroj 1910 kaj 1911, instruanta multajn lernantojn.

Nov-Zelandanoj danke memoros tiun fidelan amikon kaj pioniron; kaj esprimas al la familianoj respektplenajn kondolencojn.

### VOCO EL INTERNOLANDO.

El Kvinslando venis interesa letero, el kiu ni donas ekstrakton.

"Mi ne povis ne rideti, legante vian konsilon aĉeti respondkuponojn ĉe la poŝtoŭicejo. La plej apuda al mi p.o. estas for 20 mejloj. Ĝi estas etaĉa kabano ĉe soleca fervoja flankiĝo, kaj tial ĉar la poŝtisto liveras al mi la sendaĵojn unufoje en ĉiu semajno, mi tre malofte vizitas ĝin. Mia lasta iro tien estis antaŭ pli ol 12 monatoj. Mi tre tre dubas, ĉu respondkuponoj estas haveblaj tie, ĉar mi sensukcese petis ilin ĉe okulvide mirfrapita oficisto en la Hughenden'a oficejo, kiu situas 200 mejlojn for de mi. La plej proksima urbo stokanta poŝtkartojn kaj ĵurnalojn estas preskaŭ 400 mejlojn for! Kia terura malfacilo por homo, kiel mi, dezirema kontakti kun alilandanoj kun celo interŝanĝi p. markojn, p. kartojn kaj gazetojn. Mi devas do kontentiĝi je nura intersendo de leteroj, ĝis kiam mi trovos min en pli oportuna situacio."

### "LA SOCIETO DE AMIKOJ (Kvakeroj) KAJ ĜIAJ ESENCAJ TRAJTOJ."

20 paĝoj. Prezo 3½ p. ĉe Friends' Service Council, Friends' House, Euston Rd., London, NW1.

Bona Esperanta traduko de prelego de Edward Grubb, M.A., pri la principoj de sekto, kies kredo, rimarkinda fandaĵo de mistika kaj praktika Di-adoro, regas la vivon de 120,000 homoj en Usono kaj Kanado, 20,000 en Anglujo, kaj 2,000 en Irlando. Temas pri ilia centra doktrino, nome la Interna Lumo, **organizo, sinteno** al la Biblio, milito kaj sklaveco. Interese estas, ke la kvakeroj kiel unuaj "starigis la kutimon meti **definitivan** prezon sur vendotaj varoj en butikoj"; ke ili ankaŭ "havas la honoron esti la unua **bristanaro en Usono**, kiu decidis, ke sklavposedanto ne povas esti membro."

**F. W. Mischke, Radeberg i.Sa., Germanlando**, volas bonajn E. tradukojn el negermanaj gazetoj pri la germana politiko, Bruning kaj Hitler. Rekom-pencos per il. gaz., p. kartoj kaj p. markoj.

Watch this Space for a Special Announcement next month.

## PARALLEL TRANSLATION

### EVENING PRAYER. (Robert Louis Stevenson)

We come to Thee, O Lord, in the end of Thy day, with thanksgiving. Our beloved in the far parts of the earth, those who are now beginning the labors of the day what time we end them, and those with whom the sun now stands at the point of noon, bless, help, console and prosper them.

Our guard is relieved, the service of the day is o'er, and the hour come to rest. We resign into Thy hands our sleeping bodies, our cold hearths, and open doors. Give us to awake with smiles, give us to labor smiling. As the sun returns in the east, so let our patience be renewed with dawn; as the sun lightens the world, so let our loving kindness make bright this house of our habitation.

### TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following. We regret to say, however, that this issue has not gone out under its own steam. Lapsed readers are earnestly asked to respond to our necessity by renewing their subscriptions as soon as possible.

Mr. Rawson, 4/-; Mr. P. Paris, 4/9, dec., '32; Mrs. A. Chapman-Taylor, 5/-, jan., '33; Mr. J. Rogers, 4/6, junio, '32; Miss Trundle, 5/-, nov., '32; Mr. H. McKerrow, 4/6, jan., '33; Mr. Dandridge, 2/6, junio, '32; Mr. L. Hiob, 5/-, majo, '33; Mr. Alexander N., 4/6, jan., '33.—Total £1/19/9.

[Lastmomente. Pro monmanko neapero de marta numero grave minacas. Helpu tuj!]

### KION VI SCIAS?

- (1) Kie estas la statuo de libereco, kaj pro kio oni ĝin konstruis?
- (2) Kiu eŭropanoj kiel unuaj ekvidis la aŭstralian marbordon?
- (3) Kiu estas la plejalta monto en Aŭstralio? En ŝtato Viktorio?
- (4) Kiu estis la unua gubernatoro de ŝtato Viktorio?
- (5) Kiu estas la plej pluva regiono de Aŭstralio?
- (6) Kial oni ne povas geedziĝi post la tria posttagmeze en Anglujo?

### VESPERA PREGO.

Kun dankemo ni venas antaŭ Vin, ho Sinjoro, je la fino de Via tago. Helpu, konsolu, kaj prosperigu al niaj amatoj en la malproksimaj partoj de la tero, al tiuj, kiuj jam komencas la laborojn de la tago dum ke ni finas ilin; al tiuj, kun kiuj la suno nun staras ĉe la tagmeza punkto.

Nia deĵoro estas jam deŝanĝita, la servo de la tago finita, kaj la ripoz-horo venis. Al Viaj manoj ni fide donas nian dormantan korpon, nian malvarmiĝintan fajrujon, kaj sendependan pardonon. Donu, ke ni vekigu kun ĝoja vizaĝesprimo, kaj iru al laboro ridetante. Kiel la suno reaperadas en la oriento, tiel ankaŭ nia pacienco refortiĝu kun ĉiu mateniĝo; kiel la suno lumas al la mondo, tiel ankaŭ donu, ke nia fratameco lumu al ĉi tiu loko de nia loĝado.

### TERURA FUŝO!

La jeno klare montras la necescon de klara komerca lingvo. En franc-lingva gvidlibro tra Budapeŝto oni povas legi: „J'ai trouvé, que nulle part on ne danse mieux qu'ici, dans des salles de danse luxurieuses“; kio signifas: „Mi trovis, ke nenie oni dancas pli bone ol tie en la dancĉambroj malĉastegeaj.“ Oni intencis diri „luxuriantes“ t.e. luksaj laŭ aranĝo, kaj diris malĝuste „luxurieuses“, vorto devenanta de „luxure“ (malĉastegeco). Bona reklamo por uzo de nacia lingvo en internaciaj rilatoj, ĉu ne?

(El La Komercista, bulteno de Komercista Esperanto-Unio, Friedrich-Auguststr. 4, Radebeul, Dresden.)

[Laŭlitera cito. Ankaŭ la korekto povas esti diskuto pri ĝia ĝusteco, ĉar supozinde franco uzus „luxueuses“, „de luxe“ aŭ „sompueuses.“ Grosjean-Maupin en sia Vortaro donas „malĉaste-ma“ kiel difino de „luxurieux.“—Red.]

### ADVERTISEMENTS.

Would readers, when ordering goods from any of our advertisers, kindly mention "La Suda Kruco."

Watch this Space for a Special Announcement next month.

**"STREĈITA KORDO"**  
Poemoj de K. Kalocsay.

Eldonita de Literatura Mondo, Budapest, havebla ĉe B.E.A., prezo 4ŝ.

En 1924 falis el plumo de nia ĉefĉizisto de versoj la jenaj linioj banitaj de la larmoj de momenta sed amarega ĉagreno:

"Poeto sen popolo, ho animprema scio,

Ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko...  
Forsonas senresone la plora melodio,  
Kiel ŝirita kordo en forlasita loko.

Ĉu plu projekti, fidi kaj revii malgrandknabe,

Kaj meti mozaikon el la lingveroj splitaj,

Aŭ ĵeti for el mano la plumon, kiel Kabe,

Kaj eksilenti—patro de versoj abortitaj?"

Nur en la lasta strofo de la poemo "En Amara Horo" montriĝas denove la brave fortika spirito de l'vera dediĉinto al purnobla ideo, la nevenkebla persisto en nerekompencata laboro, spite al indiferento, neŝato.

Sendube estas, ke ankoraŭ relative malmultaj volas strebi al tiu pensegaleco necesa por plena ĝuo de tio, kion fabrikas la teksanta cerbo-koro de homoj, kia ĉi tiu hungara majstro. Malgraŭ tiu fakto ni kredas, ke la polvoŝuta mano de l'malatesto ne por ĉiam kovros mortotuke la volumojn en kiujn li sternis, per gemriĉa lingvo, la plej ardajn movojn de sia sopiranta koro. Esperanto estas ankoraŭ por la plimulto ĉe stadio elementafera, "praktika," sed eĉ nun ĝi enpenetras tien, kie estontece la verkoj de niaj verstalentuloj ricevos analizan studon; ĝi enmarŝas la liceojn, la universitatojn—la hejmojn de homoj povaj ŝati la arton de belesprimo.

Jen 190-paĝa kolekto, en kiu troviĝas inter aliaj la fama "Kongresa Runo," peco aliteracia laŭ antikva skandinava modelo; "Patrineco," korfunde simpatia paĝo el virina vivo—la naiva emocio ĉe enamiĝo, la naskdolora lukto, la laca feliĉo de l'ĵusa patrino; "Grabowski mortis," adortributo de unu granda poeto al alia; "La Renkonto de Kantoj," en kiu li ĉarme prituŝas la rasan parencecon de finnoj kaj hungaroj; la pli longaj pecoj, "Maja Idilio" kaj "Ahasvero de Amo."

Paĝo 26, linio 4, mankas "la" antaŭ "Kre'". 37, "legionoj," por rimi kun "regionoj"; la ĝusta formo estas "legioj." Sur p. 9 sin trovas "lamento giganta traringu la landon" (A. ring through the land). Supoze, Kalocsay volis skribi "trasonoru," sed pro ritmigo devis rezigni la dusilaban radikon kaj plilarĝsignifigi "ring'". Jen du poetoj "rimedoj" nepre diskutindaj.

**"PRETER LA VIVO"**

de J. Baghy.

Eldonita de Literatura Mondo; havebla ĉe B.E.A. prezo 2ŝ. 96 paĝoj.

Multon el la supredirito oni povus ankaŭ diri pri la samnacia rivalo de Kalocsay en la verskampoj, Julio Baghy. Sed ne ĉion. En la dua eldono de ĉi libro troviĝas jen sprita humoro, jen spirita, eĉ etika, ribelema, trajtoj ne tre troveblaj en la alia verko. La sanga teruro de la milito ensorbiĝis en Baghy ĝis plena saturo; el li ĝi eksudas en la paĝojn per kiuj li krias al sia mondo. Sed feliĉe ankoraŭ floras en la koto de l'prifrontaj memoroj la sana ridemo de juna idealisto, de homa homo. Dum "katenis lin sklave Siberio" li povis verki la "Kanton de Vagabondo." Korŝire li kantas, sciiĝinte en militkaptiteco, ke "La Majstro mortis"; donas li "Sablerojn," el kiuj kelkaj estas pli spritaj ol saĝaj; li vagas "En la Tombejo," jen "En la Drinkejo," kiun lastan oni jam metis sur gramofondiskon de H.M.V.; kompatan kripeton li elpuŝas por la mizeruloj de l'ĉiuurba pavimo en "Preĝo sur la Strato." Admirigas la leganton la lertaj rimuzoj kaj la riĉrimedeco de lia metrika eksperimentado.

Tiuj aspirantaj plene posedi nian lingvon ne povas preterlasi la plezuron de von enfosi ĝis fundo ĉi tiujn minojn de Esperanta belliteraturo.

(Robo.)

**FOR 4/- A YEAR.**

We remind those with foreign correspondents that we mail "La Suda Kruco" to any overseas address for the concession sub. of 4/- a year. Make your letters specially welcome by the inclusion of our Australasian Esperanto paper!

Watch this Space for a Special Announcement next month.

**AŬSTRALIAJ KROKODILOJ**  
**Efektiva minaco en la nordo.**

Lastatempe ĉe Ingham (Kvinslando) krokodilo perforte ekprenis kvinjaran infanon el la brakoj de l'frato. Tio ankoraŭ fojon rimarkigas al oni, ke vere tiuj bestoj estas ĉiama danĝero en la nordaj riveroj de Aŭstralio. En 1924, ĉe Cardwell, krokodilo dente ekprenis fervojan laboriston naĝantan en la Five Mile Creek (Kvinmejla Rivereto). Oni fine trovis lian kadavron kaj mortpafis la saŭrion. Ĝi estis longa 13 futojn. En 1925 amaso da homoj rigardis de sur la bordoj de la rivero Katherine (Norda Teritorio) la ferocon de la krokodilo. Vetkursa ĉevalo nomita Komet estis trinkanta, kiam subite kaptis ĝin per la nazo granda krokodilo. La ĉevalo freneze batis la atakinton per la antaŭaj hufoj, sed ĉi tiu ankoraŭ firme ĝin tenis. La du baraktantoj venis ĝis la akvosupraĵo kelk-fojojn: finfine la ĉevalo, malgraŭ ĝisekstremaj tordegoj liberigi sin de la mortigaj dentoj, estis dronigita.

En Kvinslando kelkaj blankhomoj tiel perdis la vivon, sed plejofte la krokodiloj prefere atakas nur bestojn.

Sin trovas du specoj de tiu reptilio en Aŭstralio. La pligranda estas la Crocodilus Porosus, indiĝena ankaŭ en Hindujo kaj Suda Ĉinujo, tra la Malaja Insularo, la norda marbordo de Aŭstralio, ĝis Papuo kaj la Fiĝi-Insuloj. Tiuj frekventas la riverbuŝojn kaj, pli alte, eĉ dolĉakvajn ŝanelojn de riveroj, kaj foje estas vidataj iom tre malproksime en la maro. Fosiliaj restaĵoj de la pli granda speco troviĝis apud Brisban kaj en la Darling-Downs.

La dolĉakva speco, Crocodilus Johnstoni, estas multe pli malgranda; ĝi atingas nur sepfutan longon. Ĝi estas preskaŭ maldanĝera, manĝas ĉefe fiŝojn.

Estas konataj okazoj, kiam krokodiloj rampis longajn distancojn de unu

rivereto al alia. Ili demetas de po 20 ĝis 80 ovojn. Eĉ nune oni trovas dudekojn de krokodiloj en la rivero Flinders kaj aliaj riveroj enmarigantaj en la Golfon de Carpentaria, sed jam de kelk-jaroj ilia nombro malpliigis en la kvinslandaj riveroj. Dum multe da jaroj la kriktoj apud la riveroj Ingham, Herbert kaj Seymour estis plenaj de tiu pesto.

Antaŭ ne longe, ĉe Cardwell, oni kaptis krokodilon longan je 24 futoj. Unu 32futlonga estis mortpafita ĉe l'rivero Pioneer en 1924. Ĉe Townsville oni ruzkaptis specimenon, kies mezuro estis 18 futoj laŭ longo kaj 9 futoj ĉirkaŭ la talio.

Malofte nun sin trovas krokodiloj sude de Townsville. Tiom pli mirige, kiam oni mortpafis tian en rivero Logan, inter Brisbano kaj la novsudkimruja ŝtatlimo.

La maljunaj krokodiloj, pro sia granda korpopezo, neofte iras malproksimen for de la akvorando, sed laŭscie la plijunaj povas foriri iom longan distancon al nigrulaj loksidoj, kaj tie kapti kaj treni al rivero hundojn aŭ infanojn.

La maljuna krokodilo prefere sin movas ruze al la bordo de rivero, kie trinkas ĉevaloj, bovoj, didelfoj aŭ aliaj bestoj. Svingante bate sian fortan voston, ĝi ŝovas la viktimon en la akvon, kaptas ĝin per la dentoj, kaj, droniginte ĝin, puŝas ĝin en la surfundan koton, antaŭ ol ĝin finfine manĝi.

Krokodiloj, similaj al tiuj frekventantaj la nordkvinslandajn riverojn, kuraĝis, en Nov-Gineo, ekkapti homojn el boatoj, kaj eĉ ataki boatojn, deŝirante pecojn. (el la angla tradukita.)

**La Internacia Scienca Asocio ĵus publikigis la Sciencan Fundamenton.**

Tiu 100-paĝa broŝuro enhavas tekston, kiu prezentas elementan resumon de la matematikaj, fizikaj kaj naturaj sciencoj, kun laŭalfabeta tabelo de la vortoj.

**KVAKERISMO KAJ PACO**

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,  
 Samarai, PAPUA.

Mendu ĝin al s-ro Rousseau, 2 rue Alfred de Vigny, Bèconles-Bruyeres (Seine) France, sendante samtempe la prezon, t.e. I dolaron aŭ samvaloran sumon.

### ALIEPOKA FRATO.

Miriga fakto ĵus trafis en mian konon, skribis kontribuanto al la Londona "Evening Standard." Antaŭ kelkaj tagoj viro 92-jaraĝa estis venigita kiel atestonto antaŭ Berlinan kortumon. Demandite pri sia familio, li respondis, ke li havas fraton, kiu mortis jam tre longan tempon. "Kiu jaron li mortis?" demandis la juĝisto. "En 1793j." venis la respondo. "En 1793?!" frapite eĥis la juĝisto; "Nepre vi volas diri 1893, ĉu ne?" Sed la maljunulo rejesis, ke vera estas tio, kion li per dokumento tuj pruvis.

Lia patro, naskita en 1774, edziĝis kiam 19-jara. Lia unua infano, filo, naskiĝis en 1793, sed mortis post du semajnoj. La patro reedziĝis, estante 63-jara, tio estas, en 1837. Lia dua filo naskiĝis en 1838. Kiam do tiu ĉi aperis antaŭ la Berlina kortumo lia "pliaĝa" frato jam kuŝis entombe pli ol 137 jarojn. Supozinde ĉi tio estas rekordo!

### KION VI SCIAS? (respondoj)

- (1) Ĝi **staras sur** Bedloe's Island, en Nov-Jorka haveno; la franca nacio doracis la konstruon en 1885, por honori la centjaran datrevenon de l'America sendependiĝo.
- (2) Holandanoj, kiuj, en 1606, eniris la **Golfon de Karpentaria** sur ŝipo "Duyfken."
- (3) Mt. Kosciusko (7,336 futoj); Mt. Bogong (6,508 futoj).
- (4) Charles Joseph La Trobe.
- (5) Laŭ **nuna scio**, la nordorienta kvinslanda marbordo, inter Port Douglas kaj Cardwell.
- (6) Antaŭ jarcentoj estis tiom da drinkdiboĉo ĉe geedziĝoj, ke en 1753 estis starigita parlamenta leĝo, kiu devigis geedzontojn fari la celebron antaŭ la tria horo. Tio estis pro la bedaŭrinda fakto, ke tre ofte post tiu horo la ĉefroluloj kaj iliaj amikoj estis tro ebriaj por konscii ion pri la soleno.

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A. Skribu al Sekretariino.

**Mastertor. (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 140 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. MARTO, 1932.

## — N.Z.E.A. SECTION — (8th Official Bulletin.)

### Third N.Z. Esperanto Congress.

Under the auspices of the New Zealand Esperanto Association, the 3rd annual New Zealand Esperanto congress was held in the No-More-War Movements Rooms, Manchester-st., Christchurch, from 26th to 28th December, 1931. Although not as large numerically as the two preceding congresses, the 3rd was a brilliant success and an event to be long remembered by all who attended it. This success may be attributed to several factors: thorough organisation, the influence of eminent persons, a sympathetic Press in the congress-town, an active local congress committee (Mr. L. A. Efford, secretary), the loyalty of a number of Dominion Esperantists, and the wonderful harmony which prevailed throughout. Widespread publicity was obtained for Esperanto at Christchurch and throughout the Dominion (Press Association messages relating to the congress were telegraphed to the various newspapers in N.Z.), the local society received assistance in that public attention was drawn to its operations, society members were encouraged by their meeting outside Esperantists, and finally the NZEA and the N.Z. section of UEA were able to conduct their annual meetings of members./

#### Members and Supporters.

The following is a list of members attending:—Mrs. J. Allan, Dunedin; \*Mr. W. H. King, Mr. and Mrs. L. E. Dust, \*Mr. E. C. Jack, Mr. and Mrs. Bertram Potts with two sons, Wellington; Mr. H. Franks, Masterton; \*Mr. T. S. Grose, Mr. J. H. Wood,

Mr. and Mrs. P. W. Frampton, Mr. W. H. Tooley, Miss L. Corkill, Mr. A. More, Mr. R. J. McLaren, Mr. E. C. Baldwin, Mr. and Miss Efford, Miss A. Saunders, Mrs. M. Drury, Mr. G. Gordon and Mr. N. M. Bell, Christchurch; and several visitors. Non-attending: \*Mr. R. W. Pudney, \*Mrs. E. Philpott, \*Mrs. E. M. Watkin, \*Mr. C. Brandon, \*Mr. F. W. Luhnig, Auckland; \*Mrs. C. Bradney, \*Mr. J. Mader, Helena Bay; Mr. D. Patton, \*Mrs. Lovell-Smith, Christchurch; \*Mrs. J. McNab, \*Mr. M. Pavlinovich, Masterton; \*Mrs. A. Chapman-Taylor, New Plymouth; \*Mr. J. A. Hodges, Rotorua; \*Mr. C. J. Adcock, Drury; \*Mr. S. M. Ujdur, Henderson; \*Miss J. Logan, Otane; \*Mr. W. L. Edman-son, Wellington. (The "star" denotes member-donor, to whom thanks are given.—W.H.K.).

#### Civic Reception; Impressive Opening.

Assembled at 11 a.m. on 26th Dec. for the formal opening, congress was accorded a warm welcome to Christchurch by the Mayor of the "Cathedral City," Mr. D. G. Sullivan, M.P., who then addressed the gathering at some length in very favourable terms.

Prof. Macmillan Brown, Chancellor of the N. Z. University and patron of the NZEA, opened congress. After delivering a long address on international language he invited Mr. L. E. Dust, NZEA vice-president, in the absence of the president, Mr. C. J. Adcock, to take the chair. The session was from this point conducted almost wholly in Esperanto.

A vote of thanks to the Mayor and to Professor Brown having been carried by acclamation, the assemblage stood to sing "La Espero" to the piano accompaniment of Mr. R. J. McLaren,

---

**CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.**


---

and then, by standing in silence, paid respect to the memory of three New Zealand Esperantists: Mr. J. Hampton, of Christchurch, Mr. W. Cornish, of Wellington, and Mr. R. V. Smith, of Paeroa, whose deaths occurred during the year.

Officials of the NZEA, club and UEA delegates, pioneers and visitors were introduced, and numerous telegrams and letters, one from as far afield as Philadelphia, U.S.A., were read and applauded.

Salutations and progress reports from their clubs were presented by Messrs. Bertram Potts (Wellington), H. Franks (Masterton), and A. More (Christchurch), each of whom gave an interesting narrative of club activities since the 2nd congress.

#### **Important Resolution.**

Before adjourning at 12.30 p.m., congress adopted a forceful resolution, moved by Mrs. Drury and seconded by Mr. E. C. Jack, calling public attention to the many advantages to be derived from the general adoption of Esperanto, and urging the N.Z. Government to use Esperanto in international relations wherever possible, and to make representations to the League of Nations with a view to obtaining the League's authorisation to include Esperanto in the curricula of all schools under the control of the Members of the League. The full text of the very long resolution appeared in the four Christchurch daily papers.

#### **Annual General Meeting.**

After confirmation of the minutes of the 2nd congress, Mr. Dust presented the president's (Mr. Adcock's) 3rd Report in which, after referring to the economic crisis, he detailed recent Esperanto progress and appealed to Dominion Esperantists to stand behind the NZEA and the movement at a very difficult time.

The NZEA honorary secretary (Mr. W. H. King) presented his 3rd report. Although revealing a serious decline in the membership, it recorded in detail the extensive operations of the NZEA during the preceding nine months. Under such headings as 2nd N.Z. Congress, Examinations, Tuition

by Correspondence, International Cooperation, Propaganda, Questionnaire to Candidates at General Election, and Services to Members, Clubs, etc., a surprising amount of useful work was disclosed. "Everything considered," the report concluded, "the Association has every reason to be satisfied with its activities, all the work to which they gave rise having been accomplished by honorary officers who have devoted much of their free time to Esperanto. I thank my fellow-officers of the Executive for their valuable cooperation, which has now extended over almost three years, and again assure members that the Association will do all in its power to advance Esperanto in the Dominion."

Two satisfactory features of the 3rd Statement of Receipts and Disbursements for the period 1st April to 30th November, 1931, presented by the honorary treasurer, Mr. E. C. Jack, were an estimated surplus of £1 and the payment by a member of five years' subscriptions in advance together with annual donations of 7/6 for the same period. Although sound, NZEA finance will require judicious administration. The fall in the year's membership reduced income by several pounds, while disbursements were increased considerably, partly through higher rates of postage and partly by the issue of a questionnaire to candidates at the General Election. Generous donations amounting to £2/5/- were reported.

Both the secretary's report and the treasurer's statement were adopted.

#### **Election of Office-bearer.**

Mr. Dust announced that Mr. Adcock, who has held the office of president since the founding of the NZEA in 1929, had asked to be relieved of his duties on account of his approaching marriage and his contemplated university studies. The following officers were then elected for the year:—President, Mr. L. E. Dust, Wellington; Vice-pres. (4), Mrs. Jean Allan, Dunedin, Messrs. J. A. Hodges, Rotorua, N. M. Bell, Christchurch (re-elected), and C. J. Adcock, Drury; Hon. Treas., Mr. E. C. Jack, Welling-

---

## MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.

---

ton (re-elected); Hon. Sec., Mr. W. H. King, Wellington (re-elected). Mr. H. Franks is the present Masterton Delegate to the NZEA Executive. Congress thanked the retiring members of the Executive for past services and extended welcome to those incoming.

### Alteration of Constitution.

After full discussion, congress decided "that the end of the financial year be altered from 31st March to 30th November." The forthcoming year of the NZEA, commencing 1st April, therefore consists of only eight months. In view of the low rate of the annual subscription (2/6) no objection to the alteration is anticipated.

In general discussion on future propaganda activities several original suggestions were made, each of which was fully investigated; the NZEA will again consider these proposals and trusts that good results will accrue.

### 4th N.Z. Congress.

On behalf of the Masterton Club, Mr. H. Franks issued an invitation for the 4th congress to be held at Masterton, preferably at Christmas, New Year, or Easter. His group could confidently undertake the social side of the event. In accepting, congress expressed thanks and recommended that the 4th be held next Christmas.

### Social Function, etc.

An enjoyable and well-attended social and concert took place in the evening. A varied programme was presented which included an entertaining narrative by Mr. R. J. McLaren of his experiences at international congresses of Esperanto and of notable personalities he had met thereat. His vivid word-portrait of Dr. Zamenhof—with whom he had had the honor of speaking and of exchanging handshakes during the 3rd congress at Cambridge in 1907—aroused no small interest. In addition, Mr. Bertram Potts, assisted by his two Esperantist sons, Adrian and Malcolm, treated the audience to a comedy and a monologue, each of which was presented in Mr. Pott's masterly style.

At 10 a.m. on Sunday, 27th December, the congress photograph was taken at the Memorial Band Rotunda

on the banks of the River Avon, 25 persons forming the group—a permanent record of an historic occasion; an hour later members attended a service conducted by the Rev. J. Milburn Stewart at the Trinity Congregational Church, at which the preacher strikingly referred to the aims of Esperanto, "the language of peaceful relationships." A trip was made to New Brighton in the afternoon, and at 7 p.m. a fair number took part in a meeting of the Free Religious Movement, followed at 8 p.m. by a meeting of the Social Discussion Group. At the former two Esperanto hymns were sung and two Esperanto readings were given, while at the latter Mr. E. C. Jack delivered an able address on Esperanto. The NZEA secretary also effectively replied to criticisms introduced at discussion time.

### UEA Meeting.

The third and final day of congress, 28th December, proved eventful. Proceedings began at 10.30 a.m. with a business meeting, in Esperanto, of the N.Z. section of the UEA. Mr Potts presided over a small attendance.

The minutes of the last previous meeting were confirmed; and Mr. King (treasurer) reported the closing of the N.Z. Collection for the Vienna Deficit Fund.

Mr. Dust, chief delegate, detailed the present state of the UEA in the Dominion and the new territorial organisation subsequent to the creation of the office of chief delegate. UEA had during the year 46 members, including 6 delegates and 2 vice-delegates, in N.Z., and in future all N.Z. subscriptions to the UEA should be forwarded to Mr. Dust. Every effort will be made during 1932 to extend the membership in the Dominion. The next meeting will be held in conjunction with the 4th congress.

### Sight-seeing, Formal Closing.

At 2 p.m. an extensive motor tour was begun over a route which afforded visitors ample opportunity to view the "City of the Plains" and the outlying suburbs, including Lyttelton and Sumner. Back at Christchurch by 5.30 p.m. the party sat down to an excel-

---

**CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.**


---

lent congress tea. From the walls of the congress-room hung the Esperanto flag of the Wellington Club, the standard of the Christchurch Society, and a handsome banner, from which radiated the wish "Bonvenon al la Tria Kongreso al Christchurch," while upon all the Majstro smiled from his photograph a benediction. Several toasts were honored, and at the conclusion of the meal Mr. Dust, the newly elected president of the NZEA, thanked on behalf of the Association the many persons connected with the congress who had assisted to make the Third an unqualified success, and then declared the congress closed, those present rising to fervently sing "La Espero."

**Congress Miscellany.**

A preliminary balance of the Congress A/c discloses the receipts totalled £15/19/2 and the expenditure £14/11/3; the surplus £1/7/11 will be carried to the 4th Congress A/c. Apart from the Press Association's telegraphed messages, congress reports measuring over eleven feet were published at Christchurch. Five members who attended the 1st and 2nd congresses were present at the 3rd. Participation of Mr. George Gordon (in literature, "Gego") and Mr. R. J. McLaren, formerly president of the Glasgow Esperanto Club, enhanced the prestige of the congress. Disappointment was expressed at the unavoidable absence of Mr. W. L. Edmanson (through indisposition) and the retiring president, Mr. Adcock. Prof. Macmillan Brown's allusion to pidgin English appeared to be inappropriate. The congress badges, an innovation, brought excellent results. Masters Adrian and Malcolm Potts assisted their father with great success in an all-Esperanto comedy. When returning to Wellington Messrs. Jack King, and Franks staged a "post-congress" of two and a half hours' duration aboard the "Wahine" to the wonderment of a number of passengers. Mr. Lincoln Efford, secretary of the Christchurch Society, was the Third's live wire.

**KRONIKO.**

**Perth, W.A.**—Ĉe la ĉiujara kunveno de la Westralian Esperanto Society, s-ro A. Saar, vic-prezidanto, sciigis la geanojn, ke li estas translokigita ĝis Geraldton; pro tio li rezignis la oficon.

Ĉiu bedaŭris tion, ĉar s-ro Saar estas vigla kaj sperta konstruanto por nia movado; sendube ni tre sentos lian foreston.

Ankaŭ rezignis la oficon de sekretario E. Griffin, kiu bone faris la laboron dum la pasinta jaro.

S-ro David Miller estis unuanime elektita kiel sekretario. Bedaŭrinde nia Societo perdis multajn estimatajn anojn, ĉefe pro la malfacilaj vivkondiĉoj, tamen ni intencas antaŭen-iri kurage, ĝis venos pli facilaj kaj pli bonaj kondiĉoj.

Kelkaj skoltestroj studas por sin pliperfektigi, antaŭ ol instrui la skoltknabojn pri Esperanto. Jen vasta kampo por nialingva semo.

**Wellington, N.Z.**—Je la 2a de februaro la loka klubo okazigis sian unuan ĉiusemajnan kunvenon de 1932. S-ro Bertram Potts prezidis.

La prezidanto klarigis novan metodon de klubgvidado. Kurso de kvar lecionoj konsistantaj el la tuta gramatiko komencos je la unua mardo en ĉiu monato. F-ino C. Smythson ĝin gvidos. Ĉiu kunveno konsistos el unu horo da instruo kaj unu de Esperanto-programo—duonhoro por novuloj, duonhoro por spertuloj.

Post instruo bonega tut-Esperanta programo prezentigis. S-ro L. E. Dust parolis al novuloj pri "Interesa Ekskurso," kaj s-ro W. H. King montris unu el siaj poŝtkartaj albumoj kun 400 i.p.k. el multaj landoj. S-ro Potts, kiel klubdel. al la 3a N.Z. Kongreso, raportis pri la kongreso, kaj s-ro W. L. Edmanson deklamis bonstila du ŝekspirajn paroladojn, "Monologo de Hamlet," kaj "La Konsilo de Polonius al sia Filo."

Bedaŭrinde ankoraŭ dum la jaro la klubo perdis du tre viglajn samideanojn. S-ro Jozefo Major estis adiaŭita je la 8a de Januaro, kaj s-ro Potts la 12an de februaro. Ambaŭ sinjoroj es-

MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.

plej spertaj Esperantistoj kaj "fortikaj turoj" ĉe la klubo. S-ro Major iris al Japanujo kaj s-ro Potts al Usono. Nia perdo estas aliula gajnego, sed feliĉe, s-ro Potts forrestos ne pli ol ses aŭ sep monatojn. Al ambaŭ plej bonvolojn.

**Masterton, N.Z.**—La jarkunveno de la grupo okazis je la 2a de februaro. S-ro B. Johns prezidis. Jenajn oficistojn oni elektis: Prez., s-ro A. Dewar, D.B.E.A.; vic-prez., s-ino J. McNab kaj s-ro B. Johns; sek-o kaj kasisto, s-ro H. Franks; klasinstruanto, s-ro Dewar; delegito al N.Z.E.A., s-ro Franks. Tri novaj anoj estis proponitaj; kaj oni decidis okazigi je la 16a de februaro la grupan amikec-vesperon, kiu estos brodkastita de radio-stacio 2ZD, kaj komenci grupagadon por la jaro je la 23a de la sama monato. La grupdelegito al la 3a N.Z. Kongreso ĉe Christchurch, s-ro Franks, raportis pri la laboro entreprenita kongrese.

**WEDDING BELLS.**

The marriage of Mr. C. J. Adcock, president of the N.Z.E.A. from 1929 to 1931 and present U.E.A. delegate at Auckland, and Miss I. Robinson, member of the N.Z.E.A., both of Drury, was celebrated on 19th December last. The best wishes of all Dominion Esperantists are extended to the happy couple.

**LA KOBURGA KLUBO.**

4 Feb-o. Proksimume 20 anoj ĉeestis la Laboristan Halon, kaj tuj ekstudis Esperanton. Ili progresas tre bone kaj ŝajnas facile ensorbi le lernotaĵojn en plej mallonga tempo.

Ni kore gratulas nian prezidanton (s-ino A. Hintze), kiu ĵus gajnis la ateston de la Brita Esperanto-Asocio. Tre plaĉas al ni ankaŭ la helpo de s-ro Glaisher, kiu ĉiusemajne venas al Koburgo por instrui.

En la vespero s-ino Fest plezurigis nin per lertaj rusaj popoldancoj en naciaj kostumoj. Ni poste dankis al ŝi por la vizito kaj amuzo.

La klubo kunvenas ĉiun ĵaudon en la supra halo, Sheffield-st., Koburgo. Vizitantoj kaj lernantoj kore bonvenaj.

4th Feb. Some 20 members attended at the Labor Hall, and immediately commenced the study of the language (Esperanto). They are progressing well and appear to learn everything in the shortest time.

We wish to heartily congratulate Mrs. Hintze (our President), who has just gained her Diploma of the British Esperanto Association. We are also very pleased with the valuable help given us by Mr. Glaisher, who comes every week to Coburg to teach a Class.

During the evening Mrs. Fest paid us a visit and entertained us with some Russian folk dances (in national costumes). Afterwards we thanked her kindly for her visit and her entertainment.

The club meets every Thursday in the labor hall in Sheffield-st., Coburg. Visitors and new pupils are heartily welcome.

**ESPERANTO.**

**Anniversary of Author's Birth.**

The 72nd anniversary of the birth of the late Dr. L. L. Zamenhof, author of the international language Esperanto, was celebrated with enthusiasm by the Brisbane Esperanto Society at a dinner in the Anne Hathaway Cafe.

After the dinner, a short commemorative programme was broadcast from Station 4QG. The president (Mr. M. Hyde, F.B.E.A.), taking as his subject "Esperanto in the World Today," said that Esperanto was important as a means of bringing about a better understanding amongst the nations, as it enabled the people of each nation to understand the other's point of view. He dealt with the appeal of Esperanto to the booklover, instancing the vast volume of literature (both original and translated) which was obtainable, including many masterpieces of national literature.

Miss Blanche Richardson sang in Esperanto the old English song "Cherry Ripe." The remainder of the evening was passed in friendly intercourse, interspersed with competitions, dancing, music and community singing.

---

**CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.**


---

Those who contributed to the general enjoyment were Miss Blanche Richardson and Mrs. Vitoshinsky (songs in Esperanto), Miss Rose Macpherson (original poem) and Miss Doris Wright (humorous recitation). Miss G. Garrick was accompanist and Mr. S. L. Parry provided the dance music.

A silky oak, silver-mounted inkstand, suitably engraved, was presented to the secretary, Miss E. B. Carrick. The president spoke in appreciative terms of the secretary's successful work for the society and for Esperanto. Responding in Esperanto, Miss Carrick warmly thanked the members and friends for their gift, but expressed the opinion that any success achieved was due mainly to the loyal support received.

Mr. B. Crow, on behalf of the G.P.O. Esperanto class, presented a case of cigarettes to Mr. M. Hyde, who suitably responded.

Among those present at the function were Mesdames Benussi, Cooney, Mills, Sunholm, Vitoshinsky, and Window, Misses R. Macpherson, T. Cooney, R. Riordan, D. Wright, N. Littleton, D. Graham, E. Burton, E. Simpson, A. Bree, A. Weller, C. Panske, B. Richardson, I. and M. Macauley, G. Carrick, E. G. Parry, and Dreveson, Messrs. M. Hyde, L. W. K. Wirth, C. Kidd, H. N. Love, T. Suess, N. G. Mills, W. L. Baker, V. Vitoshinsky, B. Crow, Cribb, H. Fay, S. L. Parry, A. Frederick, and W. O. Irwin.

("Telegraph," Brisbane, 19/12/31.)

**NOTE.**

In "The Life of Zamenhof" (Allen and Unwin Ltd.), under the portrait-frontpiece, the date 1875 appears in error instead of 1859.

**PRIPENSOJ POST IA LEGADO.**

Kun granda intereso mi legis lastatempe kelkajn pli gravajn gazetajn artikolojn kaj nove eldonitajn librojn. Plurfoje alloga estas la rakonto. La stilo ĉe multaj verkistoj estas flua, kolora, vigla, se ne ĉiam korekta. Talento certe ne mankas.

Kial do mi tamen ofte fermas kun vera malĝojo la ĵus legitan libron, malgraŭ ĝia literatura valoro?

Nevole ĝi vekas en mi la deziron, ke iu germana esperantisto ekzemple bonvolu ĝin traduki germanen, por ke mi pli precize komprenu ĉiujn detalojn. La germana lingvo, verdire, ne estas mia gepatra; ĝin mi posedas—duan lingvon—kiel mi opiniis posedi Esperanton. Sed kelkaj el niaj lastaj verkistoj enkondukas nun tiom da neologismoj (laŭ mia sento ne necesaj), tiom da strangaj parolturnoj, ke nia Zamenhofa lingvo fariĝas ofte vere enigma, eĉ por kleraj esperantistoj. Se en Esperanto ni volas esprimi ĉiujn nuancojn de la homa sento, de la homa penso,—kiujn cetere tradukas plensukcese neniu el niaj naciaj lingvoj—certe nia lingvo fariĝos pli riĉa ol iu ajn alia, sed samtempe tiel malfacila, ke ĝi ne atingos plu sian klare difinitan ĉefan celon: **esti komuna internacia komprenilo por la popoloj.** Ĝian socian rolon subpremos ia beletristika rolo, kiun oni ne rajtas malŝati, sed kiu tamen devas resti flanka: ornamaĵo tre dezirinda, sed ia ajn dubo utila, sed ne esenca. Plena estas nia lingvo; ĝi do havas kaj havos siajn poetojn, siajn romanverkistojn; nia vivanta popolo havas kaj havos siajn artistojn; malprave oni ĝin riproĉus pri ili, sed ne saĝe estus, ke ilia artplena diletantismo malplifaciligu, pro

---

**KVAKERISMO KAJ PACO**

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

---

**MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.**


---

tro alta ambicio, la taskon de la nunaj propagandistoj, de tiuj, kiuj instruas lingvon, kiu devas resti facila por ĉiuj, por la homaro, kiu ĝin bezonas. La **socia** rolo de internacia lingvo superas ĉiun alian (1).

La kaŭzon de mia malĝojo mi komprenas.

Konsolon kaj rekuraĝigon mi trovas relegante la verkojn de nia Majstro: Hamleton, Ifigenion, Marta kaj la Biblion.

Li ankaŭ estis artisto! Por lin kompreni traduko tamen ne estas necesa. **Th. Cart, en "La Movado" (Parizo).**

(1) Mi ne parolas pri la teknika lingvo, kiu celas specialan publikon, sed poezio, romano—komunaj legaĵoj—ne estas teknikaj verkoj.

---

**TO OUR SUPPORTERS**

We give thanks for the following:—

Adv., 4/-; exch., 1/2; Mr. L. Illingworth, 4/6, dec., '32; Miss J. Griffin, 2/-, majo, '32; Mr. H. Hutton, 9/-, julio, '33; Miss L. Craw, 4/6, feb., '32; Miss E. Carrick, 4/6, marto, '33; N.Z.E.A. subvencio, 22/6; Mr. Holloway, 4/6, feb., '33; Miss Fest, 4/6, feb., '33; Mr. Adcock, 5/-, marto, '33; Mr. Thomas, 4/6, jan., '33; Miss Ely, 4/6, junio, '29; Mr. Farquharson, 5/-, jan., '33; Mr. C. Wittenbach, 4/6, dec., '32. Total: £4/4/8.

(Also from Messrs. Wyatt and Clarey, 9/-)

---

**SPECIAL EXAMINER FOR B.E.A.**

Mr. R. Banham has been appointed a special examiner for the B.E.A. Diploma, and on request will at any time, make arrangements to suit those wishing to gain the above.

---

**OUR ADVERTISERS.**

We urge readers to give fitting attention to the claims of those who are experimentally advertising in our organ. Absence of response will, of course, result in withdrawal of this support.

We trust that the progressive-minded advertiser who uses "La Suda Kruco" as a medium will not suffer a dampening of spirit but rather will find his faith in Esperanto justified.

---

**KORESPONDAJO.**

Bobo. Pri la menciita artikolo subtenanta la nove bakitan "Anglic" ni rimarkigu, ke tre dubinda estas ia mondlingva kompetenteco ĉe ĝia aŭtoro. Ekzistas ja obskurantuloj, kiuj, ignorante Esperantan lernolibron, tamen apolombe asertas, ke Esperanto ne literature taŭgas! Ŝajnas, ke nur en la mondlingva diskuto oni toleras tiaspecan impertinenton.

Al ĉiuj. S-ro N. Ĉistjakov, Staroadskij 9, kv.4, Moskvo, USSR, deziras ricevi raditeknikajn gazetojn el Aŭstralio. Li rekompencus laŭkonsente.

S. en Y. Jam tempo, ke la Lingva Akademio rekomendis unu formon: Zamenhof (p. 430 Orig. Verkaro) uzis "Mandĵurujo"; Privat preferas "Mandĉurio"; "Heroldo" pliofte presas "Mandĝurio"; Leipzig'a foirprospekto "Mandĉurio." Ĉu ankoraŭ?!

---

**LUCIEN PERAIRE**
**Mondvojaĝanto venas.**

Ni ricevis longan leteron, en kiu ĉi s-ro informas, ke li vizitos Aŭstralion perbicikle en Marto aŭ Aprilo. Antaŭ kvar jaroj li foriris de Parizo. Tra Eŭropo, Rusujo, Japanujo, Ĉinujo, Indociĉio, Siamo, kaj Malajaj Ŝtatoj li bikcikle ruliĝis, dum kio li donis ne malpli ol 500 paroladoj en Esp-o kaj franca lingvo. Por gajni la vivon li ankaŭ vendas portretfotojn. Li petas invitojn, per kiuj li povu faciligu al si la vojaĝon, entreprenitan por propagandi Esp-on. Li estas membro de la Turisma Klubo de Francujo, kaj portas legitimilojn pri honesto.

Eventualajn invitojn al ĉi interesa kaj fluparola samideisto adresu al: Aŭstralazia Esperanto Asocio, 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb.

---

**GRUPO ĈE UNITARIANA  
EKLEZIO.**

S-ro P. Holmes donis la unuan lecionon de nova kurso ĉe la suprenomita kunvenejo sur Eastern Hill, Melburno. Pastro Bottomley, kiu antaŭ kelkaj jaroj eklernis Esperanton, sed devis tion rezigni pro ekleziaj devoj, denove studas la lingvon entuziasme.

## MEMORIGA EKZAMENO JE LA NOMO DE J. G. PYKE.

La komitato de la memoriga ekzameno havis sian unuan kunvenon en februaro kaj decidis fari jenan ŝangon en siaj reguloj. Anstataŭ la malnova regulo, ke nur tiuj, kiuj komencis studon de Esp-o post la unua de januaro en tiu jaro en kiu ili partoprenis, rajtas konkursi por la premio—nome kvin gineoj—nun estas permesate, ke la kandidato komencu je la unua de novembro de la antaŭa jaro. Dua decido estis, peti la grupojn en la ĉefurboj de aliaj ŝtatoj, ke ili helpu starigi ekzamenajn komitatojn en siaj ŝtatoj.

La financa raporto montris, ke kvindek funtoj estis kolektitaj por la kaso dum la jaro, kaj, ĉar entuziasmaj laborantoj jam preparas programon por la nuna jaro, estas espereble, ke la sumo baldaŭ kreskos ĝis cent funtoj.

Iu, kiu ne vidis antaŭajn anoncojn pri la ekzameno, povas informiĝi, turnante sin al la sekretario, R. Rawson, Exhibition-st., Melb. (R.R.)

## MENCIOJ.

**Evangelio de sinkompletigo**, de Okamoto-Rikici. Prezo laŭvola. Tomioka-mura, Ŝuntoo-gun, Ŝizuoka-ken, Japanujo.

**Prospekto de la Mnemonika Instituto** de Prof. D. Fajnŝtejn, kies memorforta metodo estis trifoje premiita de la Pariza Akademio. Laŭdleteroj de sukcesaj praktikintoj. Zawalna 15/11, Vilna, Poland.

**La Eterna Evangelio**, tria libreto, de H. J. Patiala, pastro, Turku, Aurakatu 14, Finnlando. Ortodokse kristana verketo, enhavanta interalie tradukon de la tri komunaj kredkonfesoj. Havebla kontraŭ resp. kupono.

**Intersteno**, oficiala organo de la Tutmonda Intersteno-Asocio, Karl-Fleschstr, 3, Frankfurt-a M. Germany. Tre interesa por ĉiu "stenisto." La sistemo taŭgas por ĉiu lingvo. Vidu per presitaj tekstoj. Jarabono 2 ormarkoj.

## NEW ZEALAND MONEY ORDERS.

Please note that money orders drawn in N.Z. on and after first February bear in the Commonwealth only their face value.

**Westralian Esperanto Society**, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikajojn al la sekretario.

**Masterton Esperanto Group**—Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksop-rd. Visitors always welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikajojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society**. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club**.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A. Del., U.E.A. Write for book list.





# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 141 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 APRILO, 1932.

## PRI LA RECENZADO ESPER- ANTA.

Frapas la serĉe legeman E-tiston la ĝenerale mizeraj "recenzoj" pri Esperantaj verkoj. "La Suda Kruco" ricevas ĉirkaŭ dudek gazetojn el la ekzistanta sepdekelko, do la plej gravajn. Estas rajte diri, ke penindas legi la librokritikojn de nur ses. Supraĵeco, nezorgemo, banaldirado forte regas ĉe tiel nomataj recenzoj en la naciaj Esp. organoj. Malbonajn verkojn oni traktas per rutinaĉaj laŭdetoj, stereotipaj, ofte nesekvindaj rekomendoj. Aĉstilaj kaj gramatike eraroriĉaj presajoj pasas tre tro facile tra la manoj de mielbuse indulgaj redaktanoj, volantaj plaĉi al ĉiu trorapida eldonemulo.

Ĉefan valoron en la recenza fako havas sendube "Literatura Mondo," "Heroldo de Esperanto" kaj "Esperanto." La diroj de "The British Esperantist" estas preskaŭ ĉiam pike trafaj, sed multe tro mallongaj, sendetalaĵaj. La jam bedaŭrindege mortinta "International Language" konstante portis pensoriĉajn libroartikolojn kiel regalon antaŭ la okulojn de elektemaj leguloj. Modelo ĝi estis; ĝian ekzemplon imite sekvu tiuj naciorganoj disponantaj pri simila amplekso kaj paĝnombro. Tiuj ĉi tro ofte plenigas siajn paĝojn per sekaj priskriboj pri temploj, naturaj belaĵoj, mezkvalitaj literatoroj propralandaĵaj, bagatelaj neniongravaj naciaĵoj. Ĉu ne konsile iom lasi tion kaj anstataŭe donadi pli da meritata atento al la verkoj en Esperanto produktitaj je tiom de cerboŝvito kaj poŝofero?

Ni havas en la penso tri grandverkojn, nome La Biblion, "Jarmiloj Pasas" kaj "La Originala Verkaro de Dr-o Zamenhof." Krom la komitata

raporto bone verkita, kaj artikolo en "Esperanto," preskaŭ nenio serioze leginda aperis pri La Biblio en la tuta Esperanta gazetaro. Unu rimarkinda escepto estis la kompetentaĵo de pastro W. J. Downes, M.A., B.D. (Light on the Bible, Lumo sur la Biblion, Okt.-Nov., 1927, n-roj de "International Language"). Eĉ la neesperanta gazetaro pli pentre diskutis la majstraĵon en siaj kolumnoj (vidu ekzemple la influan londonan taggazeton "The Times," 28/7/27; "I.L." 9/27).

La duvoluma fortostreĉo "Jarmiloj Pasas," malgraŭ tio, ke "Heroldo" precipe petis por kompetenta, serioza konsidero flanke de la recenzantoj, ricevis la kutiman fluon da ventaj vortoj. Skizo de l'ĉapitraj titoloj, eta resumo de l'enhavo, rimarkoj pri la formato, paĝaro, tehnikaj punktoj de l'eldonaĵo, nekritika admiro pri la imponeco de l'provo, kaj simila—jen ĉio. Krom tiujn de la nomitaj organoj, ni ne rimarkis ian konservindan studon pri la Haefker'a verko, kun la ebla escepto de kelkaj linioj el recenzo en "Internacia Pedagogia Revuo," de kiu gazeto oni rajtas atendi eĉ pli bonan.

Pri "La Originala Verkaro de Dr-o Zamenhof" oni povas simile aserti. Ekster la internaciaj Esp. organoj ni notis nur tiun de "La Progreso" (ĉeĥoslovaka Asocio E-tista), kiu evidente entreprenis recenzon post reserĉlaboro konvena al la tasko.

Pro la supredirita manko ni leguloj tiom pli tre bonvenigis renaskon de "Literatura Mondo," kaj kun streĉa atento spirite manĝas la pensigajn juĝtaksojn de nia literaturo aperantajn en ĉiu numero. For la recenzan banalecon, la infanan nenidiradon, frukton de l'mallaboremo kaj nekompetento.

---

**CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.**


---

**PENEGO POR SAVI VIVON.**  
 Tradukita el "The Age" (29/2/32).  
 De P.H.

Aeroplano, radio, aŭtomobilo kaj ĉevaloj estis uzitaj por ebligi al doktoro 800-mejlan viziton en okcidenta Kvinslando lastan vendredon kaj sabaton. La doktoro estis la "aviada doktoro" ĉe Cloncurry, kaj la paciento estis rajdisto, kiun ĉevalo faligis en Suda Aŭstralio. La afero donas frapan ideon pri la distancegoj, kiujn oni devas vojaĝi, kiam oni bezonas doktoran helpon en la internaj, vastaj, preskaŭ senhomaj lokoj de Aŭstralio.

Viro terure suferis, kiam ĉevalo forĵetis lin el selo kaj ankaŭ rulfalis sur lin, je sunsubiro lastan lundon, ĉe Clifton Hill bienego, Suda Aŭstralio. Indiĝeno sur ĉevalo rajdis dumnokte distancon de 60 mejloj kaj atingis la ĉefbienegan domon je tagiĝo. Tie li havigis al si freŝan ĉevalon kaj rajdis ankoraŭ plu 60 mejlojn por atingi la urbeton Birdsville: tie troviĝas misia hospitalo, kie deĵoras du flegistinoj, kiuj povas per radio voki aviadan doktoran helpon.

Unu el la flegistinoj forlasis Birdsville'on per aŭtomobilo je la 21a horo marde. Tre malfacile estis trovi la vojon tra la sablaj montetoj, ĉar ĝi preskaŭ elvidiĝis pro polva ventego. Fine oni devis halti kaj daŭrigi la vojaĝon denove post tagiĝo. La sceno de la akcidento estis atingita je la 7a horo, kaj la returna vojaĝo al Birdsville'a hospitalo estis sukcese farita je la 15a horo.

La sanstato de la paciento jam estis malbona. Oni per radio vokis la aviadan doktoron, sed malbonŝance la aeroplano, kiu kutime kuŝas ĉe misio de Cloncurry, estis for tiun tagon ĉe Normanton, sed finfine aviadisto kaj la doktoro forlasis Cloncurry'on je la 11a vendrede, kaj atingis Birdsville'on je la 16a horo, post flugo de 400 mejloj. La sanstato de la paciento multe pliboniĝis pro kuraco dum la nokto, kaj sabatmatene je la 8a horo li povis forlasi Birdsville'on aeroplane kune kun la doktoro kaj alvenis Cloncurry'on je la 13a.

La pacieron oni loĝigis en la tiea

hospitalo, kie la doktoro povas daŭre prizorgi lin.

Tiu ĉi vojaĝo de la aeroplano estis preskaŭ ĝis la ŝtatlimo de Suda Aŭstralio, super tereno plejparte el sablaj montetoj, kie troviĝas tre malmultaj homoj, kaj distancoj de pli ol 100 mejloj inter loĝloketoj estas oftaj.

**TO OUR SUPPORTERS**

Thanks for the following—

Mr. Wyatt, 4/6, July, '30; Mr. Cleary, 4/6, Apr., '33; Vivisection ad., 4/6; Mr. A. Cohen, 2/6, Jan., '30; Dr. F. Williams, 5/-, Dec., '32; Mrs. Laws, 5/-, Jan., '33; Adv., 2/-; Mr. D. Miller, 5/-, Jan., '33; Mr. C. Ballard (sales), 5/-; Mrs. Mumford, 3/-, Aug., '32; Mr. Lanyon, 4/6, July, '33; Mr. McPherson, 4/6, Mar., '33; Miss E. Carrick (sales), 6/-.—Total: £2/16/-.

**KRONIKO.**

**Melbourne, Vik.**—Ĉe la lasta kunveno antaŭ Pasko klubanoj bonvenigis f-inon Hynd, de la Bendigo'a grupo. F-ino Hynd mallonge raportis pri la progreso de la tiea grupo kaj forportis nian bondeziron.

En antaŭa kunveno nia fervora ano f-ino H. Bostock aranĝis konkurson en Esp-o, per kiu anoj sin ekzercis karalingve.

S-ro P. Hudson gvidas tradukan rondon, kaj iun vesperon f-ino Bostock legis al anoj la rezulton de la ronda laboro—iun rakonteton de la fama amerika novelisto O. Henry.

**SUCCESSFUL SOCIAL.**

The Masterton Group held its annual social evening on 16th February in the Y.M.C.A. Rooms, decorated fittingly for the occasion.

Mr. G. R. Sykes, M.P., Honorary President of the Group, presided over an attendance of 160, this being the fourth occasion on which Mr. Sykes has acted as our chairman. Items were rendered as follows:—Songs, Miss Bessie Taylor, Miss Doreen Jamieson Mr. Wilbur Davies, Mr. B. Venner; recitation, Miss E. Bate; selection, Misses Blamires; musical monologue, Miss G.

---

**MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.**


---

**Judd;** duet, Miss Jamieson and Mr. F. Clarke. Accompaniments were capably played by Mrs. G. W. Perry.

Dr. N. H. Prior gave a talk on a trip through Europe, illustrating his remarks by film pictures of the tour. He spoke with enthusiasm of the Esperanto movement abroad. In a ten-minute speech, Mr. F. Pavlinovich, of Jugo-Slavia, demonstrated the euphony of fluently spoken Esperanto.

After a dainty supper, served by the ladies, dancing was commenced, the music for which was supplied by the Harrier Club Orchestra under Mr. D. Hooper.

The entire program was broadcast from 2ZD. The Masterton Group is to be complimented on this venture, for the cost was borne wholly by the group members. Judging from outside reports, the broadcasting of the program had the desired propaganda effect, and created an impression highly favorable to Esperanto.

---

**ESPERANTO.**
**Brisbane Society.**

That there had been considerable activity in the instructional work of the Brisbane Esperanto Society was disclosed at the annual meeting. Mr. M. Hyde, F.B.E.A., presided.

An outstanding feature of the period under review was the formation of an Esperanto class at the Postal Institute, as the result of a lecture entitled "Esperanto in the Postal Service," delivered by Mr. M. Hyde, F.B.E.A., before a representative gathering from all departments of the G.P.O. This class completed a course of study in record time, under the tutorship of Mr. Hyde. Satisfactory progress was also made by the class conducted by Mr. F. Simon at the society's headquarters. Visitors during the year were specially interested in the rapid progress of a blind student, who, with the aid of a Braille grammar, took part in the general work of the class. Students were now enthusiastically corresponding with Esperantists in foreign countries.

During the year lectures were de-

livered by Messrs. Hyde (travel talks), C. Kidd (lantern lecture, "Through Beautiful England"), F. T. Simon ("The International Viewpoint"), W. L. Baker ("Art"). Much interest was displayed in an exhibition of water-colour paintings by Mr. L. W. K. Wirth, and drawings by Mr. H. N. Love, on the evening of the "Art" lecture. Native legends entitled "Stories from Papua," were sent in by the Rev. A. H. Lambton, Gedulalara, Samarai, and were read at the meetings, as were also translated stories from Mr. C. C. Dornbusch, of Warwick, and Dr. Fox, U.S.A. Two publications of the "Brisbana Bleko" appeared. Several picnics, a "Queensland Tea," and the annual commemorative dinner (known as the Zamenhof Festo) served to provide opportunities for friendly conversational practice in Esperanto. Thanks were due to Radio Stations 4QG and 4 BC for their broadcasts of a commemorative speech by Mr. M. Hyde and a paper by Mr. C. Kidd on the occasion of the anniversary of the birth of Dr. L. L. Zamenhof, the inventor of Esperanto.

The financial statement showed a small credit balance.

The following officers were elected: Presidents, Mr. F. T. Simon; vice-presidents, Messrs. H. H. Hutton and S. L. Parry; secretary and librarian, Miss E. B. Carrick. A social committee was appointed.

["Telegraph," Brisbane, 21/1/32.]

---

**FRENCH PRESIDENT AND  
ESPERANTO.**

Louis Forest writes in "Le Matin" of 26th October, that the French President, M. Doumer, invited to breakfast the members of the International Chamber of Commerce. Among them was the president of the Paris Chamber of Commerce, M. Baudet, an ardent Esperantist. "Well," M. Doumer asked him, "Have you found a language by which to understand one another?" At that moment Mr. Faraker, the Australian delegate, was announced. M. Baudet immediately turned to him and there ensued a conversation in Esperan-

---

**MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.**


---

to, in the presence of M. Doumer, between the two Esperantists, who each cannot speak the other's mother tongue. (Per "Heroldo de Esperanto")

---

**GEEDZIĜA SOLENO**

Vespere la 5an de marto s-ro Percy Holmes, prezidanto de la Melb. E. Societo, edziĝis kun f-ino Margaret Bryden. La soleno okazis en la Unitariana Preĝejo, East Melbourne, kaj inter la gastoj troviĝis kelke da E-tistoj. La geedziĝon solenis pastro William Bottomley, kiu mem estas entuziasma E-tisto kaj antaŭ ne longe starigis grupon inter la paroĥanoj. Feliĉa vivo al la geedzoj!

---

**"BABILADO" FROM BRISBANE.**

Mr. Jozef Major, a Hungarian Esperantist, called here on 15th Jan. en route for Japan. He bought text books, with the object of forming an Esp. class on board the "Tanda." At his invitation several of the Brisbane Esperantists visited him on the "Tanda," and Mr. Hyde addressed a group of passengers on Esperanto.

Mr. Hyde sent the following to the "Daily Mail," and it was published in the personal column on 28/1/32:—

"Among recent visitors to Brisbane was a Mr. Jozef Major, a Hungarian journalist, representing among other papers, the Cologne "Heroldo de Esperanto." Mr. Major speaks English, but expresses himself more readily in Esperanto. He contributed to the "Heroldo" several articles on his experiences in Australia and New Zealand."

We enjoyed the visit very much. Mr. Major had come from N.Z., where he held the post of Senior Master of French at St. Patriek's College, Wellington.

---

**EN LA KONSILEJO.**

Estas malutile, plu diskuti la demandon. Duono de la konsilanoj estas idiota!—La prezidanto: Mi postulas retiron de tiu ofenda parolo.—Nu bone. Duono de la konsilano ne estas idiota.

---

**"MINACO AL MONDPACO."**  
**Sensacia eldonaĵo ĥina.**

Venis al ni el Nanking la suprenomita broŝuro, kiu estas, laŭ ĥina aserto, Esperanta traduko de sekreta petskribo de la japana ĉefministro Tanaka al la Mikado sendita prezente la 25an de julio 1927.

Estas preskaŭ nekredibla la enhavo de ĉi tiu rimarkeginda verko 53-paĝa. Ĉu ĝi estas vera, aŭ lerte farita falsaĵo de ĥina patrioto? La interesato juĝu pri tio, stude leginte la sensaciajn akuzojn faritajn kontraŭ la japana imperialismo, kiu, laŭ la anonima ĥina verkisto esperas pri preskaŭ senlima militekspansio.

Estas detala plano por retaro da japanaj fervojoj tie konsideroj pri la riĉa ekspluatebleco je ligno, oleo, karbo, fero, sodo, magnezio kaj aluminio, kaj pri la neceso anĝi la monsystemon en Manĉurio-Mongolio de arĝenta en oro.

Precipe interesa al aŭstralianoj estas la mencio pri la lanindustrio, kiun ni presas alikolumne. Ni forte konsilus al la japanoj ne ignori ilian devon konkurenci kun siaj rivaloj per mondiskala uzo de Esperanto por efika dissciigado.

Kelkaj vortoj misuziĝas sence: eventuale (finfine); p. 18, pretendante (ĉu ŝajnigante?); kontroli (la vorto ne egalas la anglan "control, rule over"); volo (testamento). Nomante "valo" kaj "pozicio" neologismoj, la tradukinto evidente ne scias, kio estas tiaj.

Senpage havebla ĉe La Komitato por Internaciaj Rilatoj, 5 Mao-Tan Street, Nanking, China.—(Robo.)

---

**LA SOLA SEMAJNA JURNALO EN TAGGAZETA FORMATO!**

La E-tistaro konsciu pri ĉi tiu fakto kaj abonu grandare. Niaj legantoj varbas per faktoj: granda formato, semajna apero, ilustrita, 8-10-paĝa amplekso. Kun 7 specialaj aldonoj: Radio, turismo, muziko, literaturo, lingvaj studoj, virinoj kaj gejunuloj.

HEROLDO DE ESPERANTO  
 Koln, Brüsselerstr 94, Germanlando.  
 12 markoj germanaj per la B.E.A.  
 Londono.

---

**CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.**


---

**KORESPONDAJO.**

N. en B. "Social Evening." Komparu Marta 187/3, "societoj." "kolegaj rondetoj." Ankaŭ "societa kuniĝo," "vespera festa kunveno," aŭ "festvespero." Se vi celas traduki "get-together evening" konsideru "amikiĝvespero."

B. en To. We think Zamenhof translated "Fables of Anderson" from a German rendering of the Danish original.

Dobo en Ips. "Dostulo" is a press error for "postulo."

**GAZETARO SERVO.**

Mi jam aranĝis gazetaran servon, kiu celas prezenti al la gazetoj manuskriptojn ricevatajn per Esperanto el la tuta mondo, sed ne Germanujo, kaj mi petas pri kunlaboro. Bonvolu sendi al mi el negermanaj landoj memverkitaĵojn aŭ tradukaĵojn de gazetosciigoj, kaj raportojn pri strangaj okazaĵoj, bonhumoraj aferoj, gravaj problemoj, interesaj travivaĵoj, pri lando kaj popolo, moroj, kutimoj k.t.p.—Noveloj, skizoj aŭ alia spirita propraĵo povas esti uzata nur post publikigpermeso de la verkistoj—Ankaŭ interparoloj kun famaj personoj de la politiko, komerco, arto, scienco, k.t.p., estas bonvenaj por mia gazetservo. Por uzeblaj manuskriptoj mi pagas honorarion, do vi povos samtempe gajni monon kaj helpi al grava entrepreno, kiu per via kunlaboro evoluigos pli kaj pli kaj iam fariĝos ankaŭ profita. Bonvole sendu al F. W. Mischke, Redaktoro, Radeberg, SA, Germanujo.

**ADRESLIBRO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.**

Jen grava eldonaĵo por korespondo kaj kontaktiĝo kun eksterlando. Senombra estas la skribularo, kiu anoncas en ĉiu E. gazeto. Sed malfacile estas trovi ĝuste tiun homon aŭ temon, kun iu aŭ pri kiu oni dezirus interrilatiĝi—oni devas tiucele fingradi jarkolektojn de multaj E. gazetoj. Ĉi verko forigas, almenaŭ kiom koncernas Pollandon, tiun malhelpon.

Bedaŭrinde estas, ke la libro, destinita por nepoloj, estas ĉe la informar-

tikoloj verkita tute pollingve. Tamen la ĉefgravaĵo, la listo de 4060 adresoj kaj la laŭfaka indekso estas en Esp-o. Entute 208 paĝoj; prezo 3 Sv. Frankoj, plus 10 procent sendkosto, ĉe Johano Zwada, Warszawa, ul. Zaciszna 2, M.O. Czerniakow, Poland.

Kiu estas la plej rapida trajno en la suda duonsfero?

La Sidnejo-Melburna ekspreso. La 190 mejlojn kuŝantajn inter Albury kaj Melburno ĝi transiris laŭ meza rapideco de 47½ mejloj ĉiuhore.

**INTERNATIONAL ESPERANTO "HOME."**

Property of the Movement under auspices of the International Central Committee.

At Aspremont (Alpes Maritimes), in Southern France, some eight miles from Nice, is found an Esperanto guest house. It stands on ground of 30,569 sq. metres, has nine furnished rooms, and aims at providing simple comfort at moderate tariff to Esperanto tourists at all seasons. This enterprise is under the managership of Mr. and Mrs. Yeland, of London, but is the property of the Esperanto movement and controlled by the I.C.K.

**TO PHILATELISTS AND OTHERS.**

New postcards of Lichtenstein.

New official postcards with interesting views of the principality have just been issued by the postal authorities of Lichtenstein; the little State that attracts an ever increasing flow of tourists to the beauties of its territory. The new edition consists of two series of ten cards each, stamped 10 and 20 centimes and bearing beautifully reproduced scenes of the show places. The designs and photos, polished work of the well-known Viennese master artist Kosel, are printed in two colors, an innovation in this particular field of typography and philately. Of special interest is the use as an auxiliary lan-

---

**MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.**


---

guage of Esperanto, which language the Government of Lichtenstein first exploited in 1930 for its tourist advertising. Lichtenstein is easily reached from Switzerland, Germany, Austria and Italy, and also by tourists from other countries by reason of its situation on the railroad Paris-Vienna.

Robert Kreuz, of the Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado, 11 rue St. Mt. Blanc, Geneva, can supply them.

---

**GOETHE CENTENARY**  
**Esperanto Folder.**


---

From Wiemar, Germany's culture centre, comes a folder in Esperanto setting out the arrangements for the above centenary celebrations. It is indeed fitting that Esperanto, the universal auxiliary language, should serve as a means of drawing the minds and hearts of the peoples to this honored corner of Europe wherein lived for years Germany's greatest literary son and one of the world's most expansive thinkers. The Verkehrsverein, Weimar, Germany, willingly sends this souvenir to admirers of the poet or to those wishing to attend the festival, which runs from 20th March to the middle of September.

---

**ESPERANTO ON THE MARCH.**

Since our last issue we have learned—

That the great Polish newspaper "Krakova Kurjer Ilustrowany" (Illustrated Courier of Kracow), 300,000 readers and wide influence, prints regular information in Esperanto.

That the Lyons Town Council, president M. Herriot, ex-Premier of France, unanimously carried a resolution in favor of Esperanto being taught in the world's schools.

That the State publishing house at Odessa is preparing an Anthology of Ukrainian Literature translated into Esperanto.

That the September Congress of English opticians held in London unanimously passed a resolution favorable to Esperanto and formed a committee to further explore the matter. The review "The Optician" published a report on the congress in English and Esperanto.

That at Geneva the first international congress for motor-ways decided to give moral support to the proposal to use Esperanto as an auxiliary language.

That Cagnes-sur-Mer, between Cannes and Nice, has decided to follow Cannes' example. It has erected the first Esperanto street signs, "Halto por aŭtobusoj." Other signs will follow. The town council intends also to name a street after Dr. Zamenhof.

That Radio-station "Nice-Cannes—Juan-les-Pins" from 11 Dec. broadcasts on Esperanto. Talks in Esperanto will soon be heard from that station.

---

ERROR: P. 80, May, 1929, last line of col. 1. Put "to" before "sleep."

ERROR: P. 332, under heading "Esp. on the March" read "1910 transmissions." The larger figure relates to Esp. broadcasts up to the end of 1930. ing Room, Collins-st., post la 18<sup>1</sup>/<sub>2</sub>

---

**NI REE,**

insiste, petas ĉiujn ŝuldantojn, ke ili fine bonvolu pagi siajn abonojn. Ĉiu aparta admonilo kostas al ni nur perdon de tempo kaj plia mono.

---

**ERROR.**

Transpose on p. 333 line 2 with line 31.

---

**KVAKERISMO KAJ PACO**


---

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,  
 Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

---

**CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.**


---

**EL "MINACO AL MONDPACO."**  
 (vidu recenzon)

"Dum safo en Japanujo produktas nur du kinojn (kino estas 1½ funto) da lano pojare, ŝafo en Mongolio povas produkti ses kinojn. La Sudmanĉuria fervojo-kompanio faris multajn eksperimentojn, kiuj ĉiufoje konfirmis tiun fakton. Cetere la lano estas multoble pli bona ol tiu de Aŭstralio. Ĝiaj malalta kosto kaj alta kvalito kunigita kun ĝia abunda kvanto estigas Mongolion kaŝita fonto de granda riĉeco. Kiam tiu ĉi industrio estos pligrandigata per la faciligoj de fervoja disvolviĝo, la tuta produkto pliiĝos almenaŭ dekoble. Ni ne lasas la mondon tion scii, timante ke Anglujo kaj Usono pro ĝi konkuros kun ni. Tial ni devas unue regi la transportadon kaj poste disvolvi la lanan industrian . . . ne nur por nia propra uzado sed ankaŭ por eksporti . . ."

**IS IT REALLY SO WONDERFUL?**

Some time ago a well-known pacifist, visiting Geneva, paid tribute to the wonderful skill in languages possessed by the diplomats at the League of Nations; he was specially struck by the excellence of the speeches delivered in English and French. He concluded from this that the auxiliary language problem was no longer of urgency.

We do not know whether or not this gentleman himself speaks English. In any case, he was not present at the last sittings of the council, when, in the discussions on the Manchurian situation, the ambassador from Tokio, at a most critical juncture, spoke in Japanese.

There have been occasions, also, when the British delegate, owing to the strange pronunciation used by a fellow countryman, has had to wait for the French translation of the speech in order to extract from it something of the content of the address.

Our observer rightly admired the talent and education of these men, professionals who have, by reason of long years passed in ambassadorial salons, learned to use, to a degree approaching perfection, the tongue of a great nation, not their own. It would be indeed sur-

prising if the different Governments, with their varied resources, could not find in each country two or three people able to speak fluently in French or English.

At the same time he should not withhold a measure of his admiration from the modest secretaries whose exacting task it is to toil over reams of carefully numbered typewritten sheets in the preparation or correction of the official speeches.

Furthermore, our friend has overlooked those who sit in silence, although they may have the most important parts to play. The responsible statesmen or representatives of powerful political parties are not always linguists. Orators, maybe, in their own country, such are compelled to wear a gag while on foreign soil. Even M. Briand does not speak English, and, if the venue of the League were in Tokio instead of Geneva, how far would he get without an interpreter?

Those who have for years observed these League assemblies know full well that the opportunity for delivering speeches depends for the most part on the linguistic ability of diplomats, and that much of the muteness on the part of delegates is to be explained on no other ground than the inequality that rules in this matter; journalists would search here in vain for any political intrigue as the motive for this unfairness.

To the great Powers, strong on sea and land, still belongs the precious privilege of free expression in their own tongue, while the other nations must be content to voice their viewpoint in an idiom foreign to them.

During the discussions this has more than once proved a real injustice. I could give many instances. Let one suffice. A north-European Minister once confessed, after the sittings of an important commission, that he there put forward a certain proposal: "My secretary carefully prepared my French speech, in which the proposal was set forth in detail. All went well with me and the manuscript, but after my address there rose an eloquent statesman whose mother tongue was one of

the two official. In words of thunder he shattered my arguments. I would have replied to him and pointed out his fallacies, but how could I? I was impotent to improvise freely and inerantly in the foreign language. It was impossible to ask an adjournment of the Assembly for the purpose of preparing a reply. My proposal, of course, was rejected. From now on I shall support Esperanto as a solution to the problem of language inequality. We need it."

If this is true of diplomatic assemblies, how much truer must it be of scientific congresses and popular international gatherings!

(Translated from the Esperanto of Dr. E. Privat, in December "Esperanto," Geneva.)

### TRAFFIC SIGNALS IN ESPERANTO.

Thanks to the efforts of M. Cresp, gen. sec. of the Provencal Esperantist Federation and delegate of Universal Esperanto Association in Cannes (France), the council of that town has decided to use Esperanto in its traffic signal system. From now on every indicator table will be printed in French and Esperanto. The first such indicator post was set up on 9th January. Cannes, a town much frequented by foreign tourists, is the first place in France, if not in the world, to take this progressive step. Send a card of approval to s-ro Vial, Mayor of Cannes, Alpes-Maritimes, France.

—Heroldo de Esperanto.

### MENCIOJ.

**Ŝirkalendaro por 1932;** eld. de Heroldo de Esp-o. This is more than a mere calendar. It is a booklet of useful information, short poems, laughable press errors, jokes, quips, and wisecracks. Well worth the 1/6. Get on the regular mailing list of this enterprising publishing house, one of the games we know, and so receive it early every year.

**Esperanto-sigelmorkoj en 12 lingvoj.** So pretty that one almost grudges to use them! Printed in three colors. Ten sheets (80 stickers) cost 0.55 mark (say 3 reply-coupons); 100 sheets, 4.40 (about 4/6). Neniu korespondemulo povas seni ilin kaj la supran kalendaron, sur kiu li notu la eksped-datojn.

**Westralian Esperanto Society,** Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikajojn al la sekretario.

**Masterton Esperanto Group**—Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksoy-rd. Visitors always welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikajojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18 $\frac{1}{2}$ a horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Erisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.*

**Redakcio-Administracio :**

**Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).**

**Abono (por 12 numeroj):**

**Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.**

**Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.**

**Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.**

**Unu numero: 4 pencoj.**

**Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.**

**N-ro 142 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 MAJO, 1932.**

## LINES FOR THE TIMES.

It is safe to say that the past two years have been the most gruelling the "S.K." has ever passed through. That it is still on its feet is, to use a hackneyed but true expression, a splendid tribute to the staunch loyalty of those who have refused to allow the economic blight to paralyse their will to win through. To such the editor gives his sincere, heartfelt thanks. Tens of our old supporters have written, forced to cease subscription; scores more have lapsed mutely under the strain. More than once the editor himself has felt it impossible that the paper could survive the battery of misfortune, and has drafted the death notice for yet another press casualty. On each occasion, however, some fresh manifestation of helpful interest has inspired him to venture further along the road out of the wood. New avenues have been explored; advertisements have been solicited, complete year-issues of the "S.K." have been offered for sale, clubs have been approached for assistance in selling the gazette, cuts have been made in subscriptions of Esperantists with foreign correspondents, and a W.A. friend has suggested that honorary teachers stipulate a subscription of 5/- a year to the "S.K."

While help has come from these means, and may continue to do so, it seems fairly predicable that if the "S.K." is borne through the present crisis it will be on the shoulders of a few. This few may, perhaps, without felt sacrifice, be able so to bear it—we know nothing of that. The encouragement arises from our knowing that they are willing to pull more than their weight because, as

"conscious" Esperantists, they regard the paper as having a worthy part to play in the movement here and abroad. Rich or poor, they would not do what they do if they did not believe that.

And it is worth while. Sent to the five continents, the "S.K." has received the considered approval of eminent men of the movement in Europe, among them T. Jung, Professor Grosjean-Maupin, M. C. Butler and J. Warden, president of the Language Academy. Its lines have been cited in Esperanto book catalogs, side by side with those from the chief organs.

Care is taken as to content. The "S.K." aims to publish book reviews that say something, English translations of striking propaganda articles culled from the leading Esperanto gazettes, sketches characteristic of Australian life, passages from English press relating to interlanguage rendered into Esperanto, besides the club notes and personal pars. "Alvokoj" and similar semi-advertisement matter appear, for the most part, only if of interest or help to the Esperantist here.

Can we see the crisis out? The publication of the "S.K.," as things stand now, makes necessary the spending of every penny of current income. This, alas, means that those who pay one, two, and three years in advance see their money absorbed straight away. This should not be, but what can we do? Until the dry bones of the lapsed start to shuffle an adequate response to the "open letter" elsewhere in this issue our "publication fund" to guarantee the gazette say

two years ahead will remain a long way round the corner.

Enough! Let us join our hands in firm resolve to intensify our efforts to safeguard regular printing of our organ. "Per Dia favoro kaj homa laboro" we have brought it thus far—surely we will bring it safely through!  
—REDAKCIO.

### "GRAVA POPOLHIGIENA KAJ SOCIA DEMANDO."

Originale en Esperanto verkis  
H. Salokannel.

La abstineca ideo kreskas en ĉiu lando. Esperanto povas esti tre utila disvastigilo por ĝi. Kun tiu celo s-ro Hugo Salokannel verkis la supretitolitan, kiu estas modesta provo doni al interesatoj koncizan lernolibreton por abstinecaj Esp. studentoj: prezenti eldiraĵojn de plej eminentaj fakuloj pri la alkohol-demando; doni netajn informojn pri la malpermesa leĝo en Usono kaj Finnlando; kaj interesigi la Esp-istaron pri grava socidemando.

Bone verkita de lerta samideano, la libreto plenas je sciencaj, historiaj, ekonomiaj kaj filozofiaj diroj rilate la movadon kontraŭ la alkoholo.

52-p. broŝuro. Havebla ĉe Esperanto-Instituto de Finnlando, prezo 10 finnaj markoj (2ŝ.). Mendu ĉe s-ro E. W. Chandler, 223 T. and G. Building, Collins-st., Melbourne.—(E.W.C.)

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since last issue we have learned—

That the Spanish Esperanto Assoc. has received from the Ministry of Public Instruction a subvention that will guarantee the life of its official gazette.

That the Italian propaganda gazette "L'Esperanto," in newspaper format, is printed in 3000 copies. Printed entirely in Italian and enjoying the collaboration of eminent men, the paper is markedly stimulating the movement in non-Esperantist circles.

That "Le Bulletin de la Chambre de Commerce de Londres" in its February number published a text in Esperanto, "Ĉu tunelo aŭ pramservo?" (A (Channel) tunnel or a ferry service?).

That Father Bianchini, of Pordenone, Italy, is preparing specially for the priests a textbook of Esperanto in Latin.

That Dr. Privat, who accompanied Gandhi to India, spoke before 300 students and professors at Ramjas College, Univ. of Delhi, his subject being Esperanto and Zamenhof.

### DEMANDOJ.

- (1) En kiu jaro vizitis Aŭstralion la angla kronprinco?
- (2) Post kiu oni nomis Adelaide?
- (3) Kiu estis Rozinante?
- (4) Kie mortis R. L. Stevenson, aŭtoro de "Trezora Insulo"?
- (5) Kiom da trajnoj iras tra Flinders-Strata stacidomo, Melburno?
- (6) Kiom da diametra mezuro havas la horloĝo ĉe Flinders-Strata Stacidomo, Melburno?
- (7) Post kiu oni nomis Sydney?

### "ETERNA BUKEDO"

Tradukoj el 22 lingvoj, de 116 verkistoj,  
farita de K. Kalocsay.

Eldonita de "Literatura Mondo,"  
Budapest.

Paĝoj 352, bindo arta leda, senligna  
papero.

Prezo kun afranko 2.42 dolaroj.

En ĉi tiu kolekto ni havas la dolĉan distilaĵon de floroj ŝirpinĉitaj el pli ol dudeko da fremdaj ĝardenoj. Petaloj el ĝardenoj de l'propralando hungara, petaloj el la riĉodora abundo en la najbaraj, petaloj strange ekzotikaj el teroj apartigitaj de la tuta larĝeco de la mondo. Frapite ni legas, ke ĝi esence estas la ellaboritaĵo de unuopa homo, eble la nura verstantulo sufiĉe bene dotita por aranĝi tian bele diversan faskegon. Ni rememoras senti ion similan, legante en "Internacia Kantaro" la nomon Bennemann ĉepiede de ĉ. 30 kantoj tute nesamlingvaj. Ho tiuj eŭropanoj!

Armita per la ekzemplo de l'granda Grabowski, Kalocsay, dum jaroj pacience studante la vojojn laŭ kiuj nia lingvo tre povas evolui, prove, pionire ekspluatis verse ĝiajn flekseblaĵojn. Li asertas, ke kontentiga tradukado de nacilingvaj strof-gemoj en Esperanton restus neebbla, se al la esperantaj versistoj estus ne permesate akceptadi ĉiam pli novajn rimedojn, por taŭgigi aŭ senbalastigi la lingvon tiom, kiom postulas tion la poeziarto. Ekzemple, pro la metrikaj necesoj ĝenas lin ofte la longaj formoj, kiaj "mallaboreme," "sinjorino," tial li ekuzas "pigre," "damo"; li tre libere utiligas la adver-

bon, ekzemple en la frazo "ekvide lin" (je ekvido al li), ŝajne plilarĝigante per tio la principon laŭ kiu oni faris la formojn "spite ĉion," "koncerne min"; foje li elizias la finaĵon de radikoj adjektivaj, "mult brilajn fratinojn."

En la ĉiutaga, kaj eĉ prozliteratura lingvo, oni devas ne enkonduki neologismojn, krom kiam la senco postulas tion por vesti nocion por kiu mankas preciza, ĝusta termino. Oni asertas, ke ĉe la poezio montriĝas jam novaj faktoroj, tiuj de la ritmo kaj de la propra spirito de la muzo. Tiun demandon, sufiĉe komplikitan, la simpla homo volonte lasas al la fakuloj. Li nur petas, kaj rajte atendas, nenian perforton al la lingvo, nenian malrespekton al la bazoj-principoj de ĝi.

La angla literaturo reprezentigas per naŭ aŭtoroj, Chaucer, Milton, Spenser, Shakespere, Keats, Shelley, Poe, Tennyson kaj Browning. Iom pri "La Odo al la Okcidenta Vento" (Shelley): . . . are driven like ghosts from an enchantment fleeing ("kiel magon fantomar' rifuĝa"). Tie Kalocsay donas al adjektivo "rifuĝa" potencon de la verbo "rifuĝanta"; ĉu oni rekonas "Baiae's" en "Baja"? Make me thy lyre, even as the forest is ("Min, kiel boskon, igu liro via"). "Boskon" ŝajnas ne sufiĉe potence majesta; kial ne "silvon" (Verax)?

Kun la escepto de la dua linio en strofo ses, kie la trokea metriko rompiĝis, Kalocsay kaptas perfekte la misteran sonorecon de "La Korvo" (Poe). Li reproduktas admirinde la tiklan personobildon de "La Priorino." Ĉe lia traduko de la komencaj linioj de "I stood tiptoe upon a little hill" (Keats) li evidente sentis mankon de unusilaba radikoj por esperantigi la anglan "buds" (burĝonoj, floridoj). Por tio lia "branĉoj" tute ne taŭgas; nek "rarfoliaj" por "scantly leaved."

Troviĝas en la fina parto de la libro interesaj biografietoj de la poetoj, klarigoj pri la propra procedmaniero je la tradukado, kaj listo de neologismoj, kiuj tamen estas tre nekompleta.

Per la supra verko kaj lia "Streĉita Kordo" Kalocsay sendube rajtas preni al si la kronon de la laŭreata poeto. Sentante sin ofte devigata priŝuti la liniojn per novaj radikoj, tentate ofte ĝis plenumo utiligi gramatikajn formojn sciitajn de li el aliaj eĉ strangaj lingvoj, li renkontos akran kritikon de

diversaj plumoj. Sed la milmil fadenoj de sana prudento, enteksitaj en la ŝtofo de nia popolo, forte rezistos ĉiun detrueman tineon. Mute la netaŭgaj, neasimileblaj formoj morte kuŝos en nekomprenataj linioj, efikante neniel sur la idiomon ankoraŭ ĉiam vivigatan per la lipoj de la praktikantaro.

(Robo.)

### MENCIOJ.

**Vivarais, Vals-les-Bains**, Francujo, 16-paĝa gvidlibreto por ĉi tiu saniga regiono. Ilustrita per bonaj fotoj Havebla ĉe La Suda Krucio kontraŭ penca p. marko.

**Ilustrita Katalogo de Libroj** eld. de Heroldo. A work of art. Most books photoed for you and described in detail. Printed on gloss paper, 24 pages of it. Senpage havebla.

**Kuo Min Universitato**, Canton, Ĥin-ujo, sendas "alvokon al la tutmondo kontraŭ la japana buĉado en Manĉurio," 4-paĝa denunco en bona Esperanto. Notinde, ke la orientanoj enkondukas neologismojn "asasini," "retreto." "Alie" (Aliie, aŭ aliloke); "terurigi" (teruri). Kontraŭ penca p. marko havebla ĉe La S.K.

**"Essenza e Avvenire** dell'idea d'una Lingua Internazionale." Itallingva traduko de la fama teksto el la "Fundamenta Krestomatio," verkita originale de d-ro Zamenhof sub pseŭdonomo Unuel. Kun antaŭparolo kaj notoj de R. Orengo. Ni tre gratulas niajn italajn samcelanojn pri ilia revigliĝo kaj precipe pri la eldono de ĉi tiu ege valora propaganda broŝuro. Ĝi estu la heroldo de vico de similaj! Prezo 2 liroj ĉe Esperanto-Centro Itala, Galleria Vitt. Emanuele 92, Milano.

### WORTERBUCH ESPERANTO-DEUTSCH.

Ĉiu Esperantisto povoscianta aŭ lernanta la germanan lingvon saĝe farus turnante sin al d-ro E. Pfeffer, Steyer-muhl-Verlag, Tagblatt-Bibliothek, Wolzleile 20/22, Wien 1. Tiu firmo jam eldonis tre malkaran vortareton (prezo nur 0.30 ormarko), kiu enhavas ĉiujn radikojn oficialigitajn kaj la plej komune uzatajn fakesprimojn. La konforma Deutsch-Esperanto vortareto ankaŭ estas havebla samadrese. Prezo 18p.

### KION LEGI?

Ĉe kursfinoj ofte leviĝas demando, kion rekomendi al la legema progresinto por ties literatura regalo kaj pliperfektigo? Respondante la demandon per sugesto, ni donas la titolojn de verkoj nepre interesaj, bonstilaj, kaj legeblaj kun minimumo da cerbostreĉo. Rimarku bone nian celon! La juna paŝanto sur la belan tapiŝon de nia verkaro tre eble ne povas digesti la subtilaĵojn de la "Cikonio-Kalifo," unu el niaj plej gravaj tradukoj, aŭ la frapan stilon de "Mr. Tot." Komencire li bezonas pli asimileblan nutron. Tial la elekto ne estas ĝuste el la plej valoraj verkoj en nia literaturo; ekzemple, la traduko de "La Karavano" estas laŭ literatura kaj lingva vidpunkto multe malpli valora ol tiu de "La Rabistoj," kiun ni ne rekomendas al la simpla kursfininto. Por anglalingvanoj bona konsilo estas legi nur verkojn faritajn de homoj kies gepatra lingvo ne estas angla.

Unuarange ni metus "La Vivo de Zamenhof" (Privat). Tiam en nia rakonta literaturo elektindaj estas: la interesa "Idoj de Orfeo" (originalo de Bulthuis), supoze la plej populara el liaj verkoj; la kortuŝa "Marta" (Orzeszko, trad. Zamenhof), valora precipe pro tio, ke en ĝi Zamenhof uzas milojn da ĉiutagaj terminoj; tiu tragedio de du naive puraj animoj, "Paŭlo kaj Virginio" (B. St. Pierre, trad. Hodler): "La Interrompita Kanto" kaj "Bona Sinjorino" (trad. Kabe), "Rusaj Rakontoj—Fabeloj al Helenjo" (trad. Kabanov), "Nobela Peko" (trad. Morariu), "La Kapitanfilino" (trad. Ŝidlovskaja). Post kiam la studanto legis tiujn aŭ almenaŭ la haveblajn el ili, profite li turnus sin al unu plej majstra kolekto de noveloj, "Dancu Marionetoj" (originalo de J. Baghy). Per tio li sentus la kontraston inter la "klasika" skolo de la antaŭmilitaj tagoj kaj la moderna, plievoluema de la nuna tempo. La trivoluma "La Faraono" (Prus, trad. Kabe), pro ĝiaj studinda frazglateco kaj katena intereso, meritas fruan atenton. La lasta kvalito precipe montriĝas en la dua kaj tria volumoj. Ĉi tiun gloran fortostreĉon Kabe fide entreprenis, kiam ankoraŭ ekzistis nur kelkcentoj da Esperantistoj en la mondo. "For la Batalilojn!" (Suttner, trad. Caumont) bedaŭrinde ne estas plu listita de la B.E.A. Petu ĝin ĉe la kluba biblioteko. Longlonge restas ĉe leginto la impresoj, kiujn la verko batas en la animon.

Pri la verkoj de anglalingvanoj ni citu la originalon de Luyken, "Pro Iŝtar," tian de A. Sinnotte, "Lilio," "Tatterley" (Gallon, trad. Wilson), la preskaŭ perfekta "La Karavano," el la germana de Hauff, trad. Eggleton, kaj la "Alegorioj el la Naturo" (Gatty, trad. G. Gordon). Mendu ĉe B.E.A.

Finvorte, ĉu estas necese menciigi la Bibliion, la kronverkon? Ĝi estas la ĉe-kubuta kunulo de ĉiu Zamenhofano arde sciema pri la majstra modelo, kaj kiu fervore sopiras alproprigi al si almenaŭ fajrereton de tiu stila genio per kiu la amata doktoro mirigas la mondon.

### TO THOSE CONCERNED.

Kara S,—

We feel it necessary to approach you once more in the hope that you may inform us of your attitude to our enterprise, the publication of LA SUDA KRUCO—whether, in spite of your silence in the matter, you yet appreciate the paper and wish its continued service.

The periodical mailing of intimations to lapsed subscribers is a felt drain on our slender resources, and we are wishful, by the response to this circular, to clear from debt the names of many such readers, who, for this reason or that, have not seen fit to answer our several reminders to them.

In spite of adverse circumstances we have sufficient confidence in the worth of our labor to persevere in it and to struggle on to participation in final victory, if this is by any means possible.

Will you not encourage us by at least replying to this appeal and so help, even negatively, in relieving the editor from the disappointment he feels at so much apparent indifference.

Yours truly,  
La Redakcio.

### NEKROLOGO.

Ni tre bedaŭras sciigi pri la morto de s-ro Laŭri Laiho, finna ĵurnalisto, kiu vizitis Melburnon tempe de la ĉiurba kongreso en 1925. Li kunlaboris kun s-ro M. Hyde super la verko "Aŭstralio, Lando kaj Popolo," kiu poste estis tradukita en la finnan lingvon. Li mortis la 4an de januaro kaj estis solene cindrigita la 10an. Niajn korajn kondolencojn al la koncernatoj.

**TO OUR SUPPORTERS**

Thanks for the following: Mr. W. Middlesborough, 4/6, Sep., '29; Mr. A. J. Davern, 4/6, Jan., '33; Mr. H. Facer, 5/-, May, '33, and gift, 2/6; Miss de Novak, 5/-, April, '33; Miss C. Bauer, sales 3/-; "Iama Rondano," 15/-; Miss E. M. Hynd, 4/6, Jan., '32; Mr. O. Behncken, 5/-, Mar., '33; Mr. J. McDonald, 4/6, April, '33; Mr. W. L. Edmanson, 10/-, Oct., '33; Adv., 2/-; Miss M. Helm, 10/-, Feb., '34; Mr. P. Holmes, 2/3, July, '32; Mr. D. B. Thomson, 5/-, Mar., '33.—Total, £4/2/9.

**"RUMANA BONHUMORO."**

Tradukita de P. Firu kaj S. Pragano. Ĉe L. Moreau, Raapopscheweg 55, Arnheim, Nederlando. Broŝurita 2 sv. fr., tole bindita 3 sv. fr.

La rumana literaturo okupas relative mizeran lokon en la Esperanta verkaĵaro. La jam publikigitajn tradukojn oni povas denombri sole per la fingroj. Des pli bonvena do estas ĉi tiu kvino de elektitaj rakontoj, en kiuj la tradukintoj evidente pensis "prezenti ĝuste la specifajojn de (la rumana) popolo, ĝuste tion, kio iomgrade diferencigas nacion de nacio." Plejparte ili sukcesis en tio, donante jen la naive sagacan babiladon de la kampulo, jen la malpacienca abrupitecon de febre aferplena komizo.

"Du Lotbiletoj" kaj "La Venkinto de Napoleono" perride streĉas la legantan vizaĝon ĝis finsorbo de l'lasta linio. En "Oĉjo Johano Rado" la tradukanto provas konservi la aromon de la originala lingvaĵo, sed je tio li ne ĉiulinie trafas la celon, ĉar nerumanojn cerbumigos la monstro "cemilite reirite kaj ĉedonace sinpuŝemo" P. 32. Ofte sin trovas la malĝusta formo "terurigite, terurige" (terurite, terure); 17. "ekis bluan ridegon" (subite elpuŝis amaran ridegon?); 20. "reklamacii" (krie plendi?); 23 lasta linio "ŝia" (ĝia); 28. "fruntajn" (ĉefajn); "venigo Jaŝon" (venigo al Jaŝo); 41. "konatuloj," iom ofta eraro eĉ ĉe cetero bonaj verkistoj. Tio ŝajnas esti senutila duoblaĵo de l'simpla formo -ato, kiu montras preskaŭ ĉiam personon, vivantan estaĵon.

(Robo)

**LUCIEN PERAIRE.**

Ni informiĝis, ke ĉi tiu sinjoro mondvojaĝanto "pro nesufiĉeco da mon-

rimedoj ne sukcesis eniri Aŭstralion." Lia estonta adreso: Lavardac Lot et Garonne, France.

**KORESPONDO.**

Serĉas korespondantojn en Aŭstralio kaj ĉiuj landoj per il. pk. kaj leteroj diverstemaj s-ro Johann Wetzig, Regensburg, Auerg. 4, Germanio.

**STILO.**

Ja estas al mi mirinda la maniero laŭ kiu niaj lertaj verkistoj priskribas simplan situacion. Ekzemple, rimarku la jenon:

"Iun brilan matenon, juna viro gaje piediris sur arboflanka vojo." Neniel komplika, tio. Nur simpla, ofta diraĵo laŭ la stilo de vi kaj mi, kara leganto. Sed ĉu la verkisto dirus ĝin tiumaniere? Kompreneble ne! Li devas envolvi ĝin en dolĉaj, belsonaj al la orelo frazoj ĝis la bildo enkadriĝas en rando orvorta.

Imagu ke la supran frazon skribus

**Jean Forge.**

Hela mateno! . . . .

Brila sunleviĝo promesas belan tagon.

Birdoj trilas sur la arboj. Kaj roskovrita verda tapiŝo odoras frese, dolĉe . . . .

Kion do fari?

Ha, ideo! Piediri!

Senĝene mi paŝas sub la ombrigaj arboj. Per malrapidaj paŝoj. Kun ĝojo en la koro. Antaŭen . . . .

Mi, Mateo Gazuka, trovas inspiron en senhoma vojo . . . .

Denove, supozu ke la sama ideo trafus

**H. A. Luyken.**

Belega, paca vojo etendiĝis antaŭ la serenaj okuloj de juna sinjoro, piediranta en la ombro de la altaj, majestaj arboj dum la frueco de la hela mateno.

Li estis altkreska, beltalia viro kun belforma kapo, kovrita de ruĝbrunaj, krispaj haroj, kaj liaj belaj vizaĝtraĵoj montris spiritan trankvilecon malgraŭ la iom gaja mieno kaj viveca sintenado. Sincereco kaj poeziemeco montriĝis en la formo de liaj oreloj kaj la rekta nazo indikis artemecon kaj amon al ĉiuj belaĵoj. La firma mentono kaj kompatema buŝo donis impreson de forta amikemeco kaj granda kuraĝo, kiu impresio estis pliigita de la fortika nuko.

La roskovritan herbon briletigis la leviĝanta suno, donante aŭron esper-

plenan al la tuta ĉirkaŭaĵo.

Certe amversigus ĝin en sia propra, neimitebla maniero nia nesubpremebla samideano **Raymond Schwartz**.

Je hela mateno junviro eliras,  
Junviro eliras je hela mateno.

Dum gaje li marŝas, feliĉon sopiras  
Kaj revas pri amo en ĝoja plenpleno.

Al ĉiu la amon printempo pensigas,  
Printempo pensigas al ĉiu la amon.  
Kaj rosekisitaj la arboj instigas  
Al birdoj ennesti, al inoj . . . ornamon.

Sed ĉiam demono malhelpas rikane,  
Malhelpas rikane sed ĉiam demono  
Amrevojn junvirajn printempajn tirane.  
Nomiĝas li bone—la manko de mono.

(R. J. Yarworth, in "International Language.")

### RESPONDOJ.

- (1) 1920.
- (2) Reĝino Adelaide, edzino de angla reĝo, Vilhelmo Kvara.
- (3) La ĉevalaĉo de Don Kihoto.
- (4) Ĉe Vailima, lia samoa terpeco.
- (5) 2400.
- (6) 11 futoj.
- (7) Lordo Sydney, angla internafera sekretario, 1788.

### AŬSTRALIANO RIGARDAS AL KATALUNUJO

de M.S. en "The Age" (Melburno) la 25an de julio 1931.

Senor Campalana, la ministro de publika instruado en la nova kataluna ŝtato, diris, ke Katalunujo ne deziras sin apartigi for de la cetero de Hispanujo, sed nur volas esti ŝtato de federacia respubliko. Li aldone asertas, ke Katalunujo estas pli sentimente apuda je Madrid en la nuna horo ol en ia ajn tempo pasintece.

Se Katalunujo decidus fluigi siajn altvalorajn vivfortojn en la novan Hispanujon tio tre probablighos, ke freŝe revivigita lando emerĝos el la ĥaosa komenciĝo de la hispana respubliko.

Forta kaj vigla estas la pulso de la vivo en Barcelono, la ĉefa komercurbo. Nur ĝin komparu kun tiu de la ceteraj hispanaj civitoj, kiuj minace, aroge estas la ebenaĵojn—civitoj rajthavaj pro aŭtoritato dia. La forto de ties vivpelo jam velkiĝis ĝis tio, ke jam restas ĉe ili nenio pli ol la mortema, barbara vegetado de la ciganoj, la almuzuloj kaj la sociaj parioj.

La intensa, hejma patriotismo de la katalunoj ĉiam minacis la politikan unuecon de Hispanujo. Jam en 1469 Katalunujo estis unuigita kun Aragono kaj Kastilo per la interredziĝo de iliaj reĝuloj. Tamen, ĝi ankoraŭ retenis specialan konstitucion kaj aliajn karesatajn privilegiojn. Sed en 1640, ofendite de peza impostado de Felipo la Kvara, Katalunujo ribelis kaj elektis Louis la Dek-tria, reĝon de Francujo, ke li estu grafo de Barcelono. Jam de tiam Barcelono ne ĉesis ĵeti provokojn al Madrido. Katalunujo subtenis Aŭstrion ĉe la milito pri la hispana tronhavigo, sed finfine fariĝis politike hispana ŝtato en la milito por sendependado kontraŭ Napoleono.

Ne mirige do, ke la katalunoj rigardas hispanojn de ekster Katalunujo kiel fremdulojn. La kataluna temperamento estas tute nesimpatia kun tiu de kaj la kastilano kaj la andaluziano. La kastilano, kortegane ĝentila kaj memdependa, sed tre konservativa, sur sia praava terbulo sidadas, fierega pro sia "grandeza" (majesteco). Li malŝatas novaĵojn. La ligna erpilo de antikvo bone por li taŭgas. Male, la kataluno estas aferisto kaj akceptas kun plaĉo kondiĉojn de la moderna industrio. Tial li tute ne paciencas kun la majeste iranta Kastilo kaj la nelaborema Andaluzio.

En Barcelono estas malfacile taksi la veran katalunan spiriton. La tieaj religiaj kaj industriaj konfliktoj konfuzas la juĝkapablon. Ĝia aktiveco tro ekcitas, lacigas. Oni prefere foriru el kosmopolita Barcelono kaj iru pli suden,

## KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,  
Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

## PARALLEL TRANSLATION

### ANKORAŬ UNU VESPERA PREĜO.

Lord, receive our supplications for this house, family, and country. Protect the innocent, restrain the greedy and the treacherous; lead us out of our tribulation into a quiet land.

Look down upon ourselves and upon our absent dear ones. Help us and them; prolong our days in peace and honor. Give us health, food, bright weather, and light hearts. In what we meditate of evil, frustrate our wills; in what of good, further our endeavors. Cause injuries to be forgotten, and benefits to be remembered.

Let us lie down without fear, and awake with exultation. For His sake, in whose words we now conclude.

Ho Sinjoro, akceptu niajn petegojn por ĉi tiu domo, familio kaj lando. Defendu la senkulpulojn, malhelpu al la aviduloj kaj la insidantoj; konduku nin el nia aflikto en trankvilan landon.

Rigardu sur nin kaj sur niajn forestantajjn karulojn. Helpu al ni kaj ili; longigu niajn tagojn en paco kaj honoro. Donu sanon, nutron, belveteron kaj korojn plenajn de gajo. Se ni pripensas fari malbonon, nian intencon malsukcesigu; se ni pripensas fari bonon, niajn penojn prosperigu. Donu, ke pasintaj nejustaĵoj al ni foriĝu el nia memoro, kaj ke nur bonfaroj tie restu.

Estu, ke ni kuŝigu nin sen timo, kaj releviĝu kun ĝojo. En la nomo de Li, per kies vortoj ni finas nian peton.

### MATENA PREĜO.

The day returns and brings us the petty round of irritating concerns and duties. Help us to play the man, help us to perform them with laughter and kind faces, let cheerfulness abound with industry. Give us to go blithely on our business of this day, bring us to our resting beds weary and content and undishonored, and grant us in the end the gift of sleep.

Nova tago venas, portante al ni la negravan rutinon de ĝenaj aferoj kaj devetoj. Helpu al ni honeste fari, helpu al ni plenumi ilin kun ridado kaj bonkora vizaĝo; lasu, ke gajeco abundu kun laboremo. Donu, ke ni ĝojkore faru la devon de la nuna tago; al la lito konduku nin lacajn, kontentajn, kun honoro nemakulita, kaj en la fino donu la favorkoraĵon de la dormo.

(Robert Louis Stevenson)

en la apudmaran, ne tiel grandan urbon Tarragona. Tie oni povas serene observi la gajan aferemecon kaj optimismon, kiuj estas bonegaj trajtoj de la kataluna karaktero.

La civito sidas sur monteto; la Mediteraneo safirblue trembrilas malproksime sube. Jen tiu marbordo, pri kiu glorkantis Plinio kaj Martialo, la "aprica litora," la sunhela sablobordo de Tarragona. El ĉiuj romidaj civitoj en Hispanujo, Tarragona estas la malplej neinda je la patrinurbo Romo, ĉar ĝi fariĝis antikva sen kadukiĝo; ĝi estas civito vivanta.

Oni povus ĝin kompari kun Merida de Estramadura, kiu estas tipo de dekadencia romida civito. Jen afero por teruri la imagokapablon—historiĉa Merida, konita en sia flortempo, kiel la Romo de Hispanujo, kun 84 pordegoj kaj 3700 turoj, ĉeborde de la ŝtalblua rivero Guadiana; nun velki-

ĝinta ĝis vilaĝa amplekso, havanta gastejon tute nehispanan pro ĝia negastemeco. Enfermitaj en la domaj muroj oni trovas templajn kolonojn el marmoro; ruiniĝintajn ŝtonskribojn. Eksterapude la urbon sidas la malgranda Kapelo de Sta. Eutalia, konstruita en 1612 el restaĵoj de la roma templo de Marso. Jen ekzemplo el tio, kiel la popoloj, en la mallumo sekvanta la formorton de la roma potenco, komencis konstruadi siajn kompatindajn domverkojn, kunigante dispeciĝintajn kolonojn kaj rompitaĵojn arkitravojn, ĝisfine, sub iliaj fuŝmovantaj fingroj, evoluis ĝis kompleteco la ĉiun-miriga Romaneska stilo.

Tarragona restas civito romida. La koloron de l'suno ĝi havas. La ĉefstrato estas ankoraŭ ĉiam la Via Triumphalis de Romo; ĝi kondukas krute supren de la monteto ĝis la sunsaturita fasado de la katedralo, kiu

kolose elstaras kontraŭ fono el blua ĉielo, ĝustsame kiel iam faris tion la roma templo de Jupitero.

Verdire pilgrima vojo estas tiu kruta strato, kulminanta je giganta perono, kiu ankoraŭ supreniras al la ŝtonpavimita placo fronte de la katedralo: La katedralajn pordojn flankas la Apostoloj; staras meze la Madono de Majstro Bartoleme, tenante surkokse la Infanon. Vere ŝi montras talion tiel bele fleksmovan kiel tiuj de la virinoj, kiuj, portante dutenilajn kruĉegojn, en la nuna tago iradas al la putoj.

Matene la katedralaj gargojloj okulumas malsupren sur la rulsonadon kaj kriadon de la legoma vendplaco. Ruĝaj, verdaj piproj helbrile amas kuŝas tie sur la bulstonoj; lignaj bareloj da olivoj, sakoj da kaŝtanoj, ŝnuroj da ajlo, montetoj da granatoj. Maljunulino en ŝalo kaj nigra jupo volas vendi kokon. Ŝi portas ĝin surbrake, etendas ĝin al tiu kaj tiu virino, por ke ili inspektu. Sed ili nur volas skuteni ĝin per ties maljunaj kruretoj, fingropuŝi ĝin, mokridante. La vendistino do ek-reprenas malpacience, tenas ĝin kvazaŭ suĉinfanon, mankaresas la plumojn de la kompatinda birdo, zumante al ĝi. Jen aliloke, gestanta viro en Ford-aŭto vendas skarpajn, longajn je plena sesmetro. Li laz-maniere ĵetas ilin trans la kapojn de apudstarantoj, por ke virinoj ĉe la homamasa rando povu mem taksi la valoron. Simieto kaŭras sur la ventŝirmilo de la aŭto, sin gratante, kaj, distrite, ankaŭ sian lankovrilon. De la altaj muroj pendas birdodometoj kaj malgrandaj kaĝsimilaj balkonoj el fero; ŝnuroj da ruĝaj piproj, sekiĝante, sin tenas ĉe la fenestroj. Vesperigĝe flagroj eklumas en la nigre-internaj butiketoj de la urbo malnovmonda. La moderna urbo, kun ĝiaj du largaj, arbe ombrataj promenvojoj kaj belaj konstruoj, ne estas neinda je la malnova.

Fininte la taglaboron, preskaŭ ĉiu urbano vage iras al la Rambla Sta. Juan, por trinketi ĉokoladon en kafejoj, aŭ diskuti politikon subarbe. Tintadas rido, pli bonkora, malpli mokaroga, ol tiu de la Sudo. Oni povas legi, klare gravuritajn en la bronzvangaj vizaĝoj, la humoron kaj pensosanon, kio estas la heredo al Katalunujo.

**Eraro: P. 346, 2a Kol., L 10, "pentre" (legu: penetre).**

**Westralian Esperanto Society, Perth,** W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

**Masterton Esperanto Group**—Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksop-rd. Visitors always welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto,** s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18<sup>1/2</sup>a horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

---

**Redakcio-Administracio :**

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

---

N-ro 143 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. June-July, 1932.

---

—N.Z.E.A. SECTION—  
9th Official Bulletin.

**Membership Matters.**

When the third year of NZEA activities began on 1st April, 1931, the Dominion was beset with a multitude of economic ills, and the Executive of the association recognized that a difficult year confronted it. The storm was, however, weathered during that year, and although the NZEA membership shrunk from 154 for the preceding year and from 210 for the first year to a modest 113, the Executive had the great satisfaction of being able to report that the year's program had been carried out in its entirety and that a small surplus existed in the NZEA funds.

The economic position obtaining at 1st April, 1932—the commencement of the present year's operations—did not show any improvement. As a matter of fact, the outlook appeared to be worse, for the Dominion's unemployed, which include several enthusiastic Esperantists, had increased to over 50,000; a state of affairs that must have its repercussions on the welfare of the NZEA.

With a view to enrolling members for the current year the NZEA issued in April last a circular setting out the position. As a result, the Association's hopes had, at the end of May, been partially realised, 48 members, including 3 new members, having come forward; but it now appears, notwithstanding that several constant supporters have not yet renewed their subscriptions but may be relied upon to do so at a later date, that there will be a further decrease in the membership this year. The Executive's task of bringing the NZEA through another

difficult year is however, already considerably lightened by the receipt of several generous donations, and another helping factor will be the shorter financial year resulting from the decision of the 3rd Congress to amend the NZEA constitution to provide for the closing of the accounts on 30th November annually. While fully appreciating the magnanimity of the members who have liberally and loyally supported the NZEA, <sup>the association</sup> ~~it is felt, however,~~ that <sup>the usefulness of the Association</sup> ~~the usefulness of the Association~~ would be extended if the main principle underlying the Association's foundation could be more widely applied: that the NZEA comprise the greatest possible number of members and so rightly claim to be the national organisation of <sup>the Dominion</sup> ~~the Dominion~~ Esperantists and supporters of the international-language idea.

**Donations Received.**

The Executive cordially thanks its several well-wishers for monetary assistance. Donations to the NZEA General Fund—bright spots in these black days—are acknowledged as follows:—Mrs. L. W. Lovell-Smith (2), £1/5/-; Mrs. J. Allan, 10/6; Mr. M. Pavlinovich, 10/-; Mr. J. Keay, 5/-; Mesdames E. H. Wall, J. Hampton and I. F. Gillies, 2/6; Messrs. H. E. Facer, F. W. Luning, E. C. Jack, M. Parkinson, A. S. Hilliker and Dr. E. S. Dukes, 2/6; D. Tilly and V. Leck, 1/-.

(A splendid response to but one of many contemporary appeals.—W.H.K.)

**Propaganda.**

**General.**—The NZEA has recently exploited a new field of propaganda and although the apparent gain to the Association may be negligible, it is likely the work will in the ultimate

prove of benefit to the movement generally. During this year it has become a practice to obtain from the hotel registers published in the newspapers the names of oversea visitors (other than English-speaking) to Wellington, and to forward each a propagandā leaflet and an "Esperanto Key." After returning to their native countries the persons concerned must, therefore, admit their making contact with Esperanto while in New Zealand, which will strengthen the claim of Esperanto to universality. Pursuing this practice, the NZEA has supplied comprehensive information regarding Esperanto to visitors from Japan (2), Sweden (1), Holland (2), France (4), Germany (3), and Belgium (2). Leaflets and "Keys," with extra copies for distribution, were also forwarded to Vice-Admiral Iamura and Captain Kasuya of the Japanese training-ship "Asama," and to Captain Okada, of the "Iwate," during the cruisers' recent visit to the Dominion. In this manner the NZEA, although the outpost most distant from the world's Esperanto headquarters, is taking its place as a serviceable link in the long international-language chain.

**Rotary.**—The NZEA grasped the opportunity presented by the visit to the Dominion of the President of the Rotary International, Mr. S. W. Pascall, of London, to obtain a statement from him concerning Rotary and Esperanto. In a letter dated 13th May, 1932, Mr. Pascall expressed his good wishes for the welfare of the NZEA, and advised: "...I am interested to hear of the progress of your Association in New Zealand. Rotary is not, of course, committed to Esperanto, although it is in entire sympathy with your desire to provide an easier method of intercommunication between peoples of different languages. On many occasions I have felt the lack of a suitable medium of expression in an international gathering. ..." Due publicity in the Wellington Press was subsequently given Mr. Pascall's statements.

#### Secretary's Reminder.

NZEA subscriptions (2/6 per annum) fell due on 1st April last. Members who enrol or re-enrol during the current financial year are registered as "Standfast" members as a permanent record of their support at a critical time in the Association's history. Pen-

ny stamps or postal-notes may be used in payment of subscriptions, and correspondence should in the meantime be addressed to Mr. W. H. King, Hon. Sec., Secretary's Office, G.P.O., Wellington.

#### KRONIKO.

**Auckland, Nov-Zelando.**—En lundo, la la de Februaro, la Auckland'a societo komencis kunveni por 1932, kaj de post tiam daŭris ĉiusemajne. Estas kuraĝige, sciigi ke en la kuranta sezono naŭ novaj anoj aliĝis kaj ĝis nun tiuj progresis kontentige en sia studado. La 4an de Aprilo okazis la ĝenerala kunveno ĉiujara. Dekkvin membroj ĉeestis kaj elektis oficistojn por la jaro: Prezidanto, s-ro J. S. Russell; Viceprez., s-ro pastro Woolloxall; Hon. Sek-o kaj Kasisto, s-ro C. Brandon (16 Wairaki Rd., Mt. Eden). Forta komitato estis elektita el la gemembroj. Pasintan jaron paroladoj kaj dialogoj estis radiebrodkastitaj kaj kaŭzis iom da intereso; la societo profitis per la laboro tiukampe.

**Christchurch, N.Z.**—Esperanto Societo kaj ankaŭ klaso konsistanta el 20 viglaj geanoj, gvidata sub aŭspicio de la W.E.A. (Laborista Eduka Asocio), nun funkcias ĉi-urbe. Dum la W.E.A. sezono la societanoj partoprenas ĉiulunde la klason, kiu sin subtenas pleje per la testamentmono (£500) de la mortinta s-ino Ensom, Christchurch-anino. Efikan propagandon faras s-ro N. M. Bell, kiu, malgraŭ nebona sanstato, regule aperigas ĉiumonatan kolonon Esperantan en "The Christchurch Star." La laboro estas tre grava kaj jam daŭras multajn monatojn. S-ro B. Kalin, societano, forlasis por mallonge viziti sian patrujon, Svislandon. Oni atendas lian revenon je la jarfino, kiam sendube li regalos nin per vojaĝrakontoj.

**Masterton, N.Z.** — Decidiĝis ŝanĝi la nomon de nia grupo al 'klubo,' kaj estontece la membroj agos sub la aŭspicio de la Masterton Esperanto Klubo. Jara agado komencis je la 2a de Februaro, kiam agkomitato estis elektita; kaj la ĉiusemajnaj klasoj daŭris regule de post la 23a de la sammonato. Klubanoj nunaj nombras dudek ses—preskaŭ duobla la antaŭjara membraron; kaj la meznombro da klubĉeestantoj estas dekok. S-ro A. Dewar, D.B.E.A., klubinstruanto, pleje respondecas pro la

kresko de la klubanaro kaj pro ties progreso. Frue prezentigos klubeje la komedio, "Kara Panjo," kaj oni poste ĝuos drolajn dialogojn.

**Wanganui, N.Z.**—Spite al okupado, s-ro S. I. Nolan, malnova amiko de Esp-o, kiu dum vintraj monatoj de la pasintjaro gvidis ĉiusemajnan rondeton tie-ĉi, same agos ĉi-jare.

**Wellington, N.Z.**—Agema oficistaro kondukas la lokan klubon tra la severa krizo ekonomia ĝis pli prosperaj tagoj, kvankam la membro-listo kluba grave malgrandiĝis nunjaron-nesurpriza fakto. Tamen, duhoraj kunvenoj okazis ĉiumarde, kaj daŭras la alta grado de la kiubprogramoj, entenantaj unu horon da instruado. Raporteto en ambaŭ ĉefurbaj taggazetoj sekvas ĉiun kunvenon; la vic-prez., s-ro E. C. Jack, certigas, ke ĉiu raporto enhavas trafan mencion de presinda progreso de Esp-o. Tiel sciigis pri nia afero la ĝenerala publiko, fakuloj kaj aŭtoritatuloj.

### KRONIKO.

**Brisbano, Kvinslando.**—La 26an de aprilo s-ro M. Hyde paroladis pri "Akiro de stilo en Esp-o." Li akcentis la neceson multe legi en la Esp-a literaturo kaj konsilis la studadon de la poezio. Oni per tio akirus scion pri trafaj frazoj, ĉar lingvo ne estas nur kolekto de vortoj sed ankaŭ de frazoj.

S-ro H. Fay parolis la 10an de majo pri Esperantismo kaj la mondmilito de 1933." Kia estos la sintenado de la Esp-istoj rilate al mondpolitiko kaj malarmado? Kiel ni povas agi, por ke el la nuna tutmonda krizo ne naskiĝu multe pli terura tutmonda milito? Jen demandoj de la parolinto, kiu tamen kredas, ke la popoloj fine faros "unu grandan rondon familion."

La societanoj kunvenis la 23an de aprilo ĉe la hejmo de s-ro H. Mills, Moorooka, kaj de tie faris ekskursojn al div. lokoj. Poste on "piknike" manĝis ĉe ges-roj Mills kaj la vesperon pasigis per kartoĵoj, ludoj ktp. Tiel agrable estis, ke s-ro Mills devis ja forpeli nin, por ke ni ne maltrafu la lastan tramon. Ĝuitan tagon kaj . . . gajno por la societa kaso.

Ĉi tiun jaron Brisbanaj lernantoj havos okazon partopreni en la J. G. Pyke Memoriga Ekzameno, kaj ni esperas prezenti kelkajn kandidatojn.

### LA PETERSHAM'A FILIO DE LA SIDNEJA ESPERANTA SOCIETO.

**Est. Redaktanto:**—Bv. permesu, ke mi iom informi pri la progreso de la suprenomita (p. 331 S.K.). Antaŭ 2-3 semajnoj okazis la unua provekzameno. Sidis la tuta grupo (10 plenaĝaj gelerntoj), en kiu estis neniu, kiu komencis lerni E-ton antaŭ la 11a de jan-o. Estis necese, ke ĉiu persono, sidante aparte unu de alia, respondu ĝuste almenaŭ al dudek el trideko de demandoj, kaj ankaŭ, ke ĉiu skribe traduku, kun sufiĉe da klareco, du el tri anekdotoj. La rezultoj estis tre kontentigaj. La gvidantoj limigis la demandojn nur je tiuj, kiujn la lernantoj pritraktis dum la unua kurso ĝis la ekzamena tempo. Estis 4 lernantoj kaj 6 -inoj. La virinoj faris multe pli bone ol la viroj, nome: 23, 21, 20, 18, 17 kaj 16 poentoj. Pri la viroj, ho ve! neniu el la kvaroj atingis eĉ duonon da necesaj poentoj. Mi forte opinias, ke la sinjorinoj elmontras pli da entuziasmo kaj atentemo ol la s-roj. Ĝisdate la filio kreskiĝis ĝis 55 anoj kaj lernantoj, kaj ankoraŭ tiaj varbiĝas. Mi fieras pri la sukceso de la entrepreno kaj forte kredas je ĝia estonteco. Korajn salutojn al vi kaj al ĉiuj legantoj de la S.K. Sincere via, A. W. Peacock (instruisto).

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned— That "Ekrelo," Dircksenstrasse 42, Berlin C25, intend to publish in 16 volumes (3000 pages) the entire works of Lenin. The first vol. will appear Sept.-Oct., 1932.

That by decree of the People's Commissar for Instruction the teaching of Esperanto during 1931-32 must be uninterrupted in the schools of Sebastopol (Crimea). At a summer school 1500 students from 14 schools have learned the language, says La Movado, Paris, April.

That the Flemish Touring Assoc. (110,000 members) is printing an Esperanto course in its fortnightly magazine, Toerisme.

That the Estonian Govt. by a decree dated 18 Feb., 1932, permits officials to wear an Esperanto badge on their uniform.

That the Govt. inspector who visited St. Paul's School, Worcester, Eng., on 18 Feb., reports: Esperanto is still

being taught with success. It is interesting and pleasant to hear the elder boys conversing easily together in a language other than their mother-tongue.

That "The Sorrows of Werther" (Goethe) has been translated by a German, and will be published by the Belgian Esperanto Assoc.

That Aracaju, capital of Sergipe, Brazil, has now a "Zamenhof Street."

That Ludwig Renn, world-famed author of "War," a work held by Winston Churchill to be greater than "All Quiet," has been elected president of the International Association of Revolutionary Esperanto Authors.

That Honolulu University has an Esperanto course, and that Esperanto is an optional subject in a large Honolulu High School.

### LA SPAREMAÇO.

Iam vivis homo, kiu, ne volante nŝpari, penis kreskigi terpomojn en la toambo-tereto de sia mortinta edzino. Ankoraŭ alia tia-emulo, vekiginte unu matenon, vidis, ke la edzino kuŝas mortinta ĉe lia flanko. Saltinte el lito, li kuregis ĝis la kuirejo, kriante, "Servisto, boligu ĉitiumatene nur unu oveton!"

La administracio de La Suda Krucio, aŭdinte tiujn anekdotojn, pensis pri tiuj poŝgardemuloj, kiuj, facile povante pagi sian abonon, tamen preferas ricevadi la senpagajn ekzemplerojn.

### MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(No. 1)

Ni havis jam la okazon rimarki, ke unu el la plej gravaj rimedoj por vastigi nian aferon estas konstanta parolado pri ĝi en gazetoj. La gazetaro en nia tempo ne senprave estas nomata la sesa regno potenco, kaj senlace ni devas ĝin devigadi kiel eble pli ofte tuŝadi nian aferon, ĉar nur tiam ni povas esperi pli aŭ malpli frue aligi al nia afero la grandegan indiferentan amason de la publiko. Ŝe unu fojo ne prosperis, ni devas netimigite provi la duan fojon, la trian k. c.; se unu gazeto estas obstina, ni devas nin turni al alia gazeto; se ni ne povas paroligi la gazeton en unu formo, ni devas provi formon alian.

(Originala Verkaro P.93)

### TO OUR SUPPORTERS

Heartly thanks for the following:—  
Mr. E. Chandler, 5/-, June, '33; Miss D. Wells, 4/6, Mar., '33; Mr. E. McKenzie, 4/6, Apr., '32; Mr. Rawson (sales), 4/8; Mr. F. Pavlinovich, 5/-, Mar., '33; "Two Friends" (gift), 5/-; "Espero" (gift), 5/-; Mr. Cox (sale), 4d.; s-ro Fajnŝtejn (anonco), one dol. (6/3); "Die Hoffnung" (gift), 5/-; Coles' ad., 51/-; ad., 2/-; Mr. C. Dornbusch, 4/6, July, '33; Miss E. Sanderson, 4/6, May, '33; Mr. J. Cossar, 4/6, Mar., '32; Miss Bostock, 2/-, Dec., '33; Rev. Galloway, 4/6, Mar., '33; Mrs. A. Carter, 4/6, June, '33; Miss V. Newnham, 5d.; Mrs. Wilson, 4/6, June, '33; Miss H. Conwell, 4/6, May, '33; Mr. M. Ravelich, 5/-, May, '33; Mr. W. King, 5/-, Aug., '33; subvention from N.Z.E.A., 22/6; Mr. C. Kidd, 10/-, June, '31; Miss Carrick (sales), 6/-; Brisbane Club (adv.), 5/6, May, '33.—  
Total: £9/6/2.

### "A.P.A."

Just before the war Mr. (now Sir) John E. Wrench, editor of the London "Spectator," founded the Overseas League, and in 1918 the English-speaking Union. Then, in 1930, his vision broadened. He had come to the conclusion that "race imperialism is not enough; we must organise the world on the basis of all peoples." So the All Peoples' Association was born, "a society of men and women, belonging to all nations," which seeks "to remove prejudice and misunderstanding between the peoples of the world," and offers to join hands with "all organisations which aim at promoting world friendship and international co-operation." It has already a membership of some two or three thousand, with branches in many parts of the globe.

The ideal that actuates the A.P.A. is very similar to the "interna ideo" of Esperanto. It seeks to stimulate the growth of "international-mindedness" by making contacts between thinking people of all tongues, and confirming such contact by the publication of a common magazine for members "printed in at least three languages, pending the time when the world will have a common language, which will not necessarily be English." Further, it "strongly advocates the learning by its members of one or two languages other than their own."

To the Esperantist, provided with the means of meeting, on the ground of a neutral language, men of all civilised tongues, great and small, in intelligent, profitable intercourse, the method by which the A.P.A. seeks to do the same thing must seem cumbersome and relatively ineffectual. He would feel that the Association is, with the best intentions, perpetuating one of the most formidable hindrances to international understanding—the blighting belief that the curse of language diversity can at best be alleviated only by cramming the skull with one foreign idiom after another. It is, however, favorable to Esperanto, and its organ, "World Service," while printed mainly in English, French and German, gives space to the interlanguage.

Active membership of the A.P.A., it would seem, will thus largely be built up from those fortunate in possessing tongues other than their own. The Zamenhofan Esperantist is, within the framework of his own organisation, working for world-amity in much the same spirit as the A.P.A., but the joining of this body by Esperantists is desirable, inasmuch as their activity may influence it to a more marked recognition of the value of the auxiliary language. Sub. 10/- year. Address: 99 Gower-st., London, W.C1.

### KIOMA PROPONO?

La administracio havas por vendi konte de la kaso de La Suda Krucio kompletan kolekton jam de n-ro 1 (julio 1920). Tiu, kiu en la sekvantaj ses monatoj proponas le plej altan prezon rajtas ilin ricevi. Laŭ nia scio ĝi estas la sola kompleta kolekto aĉetebla en la mondo.

### — ADDRESS BOOK — OF THE BOHEMIAN ESPERANTO SERVICE POTSTEJN, CZECHOSLOVAKIA.

This booklet aims to become a **complete indicator** to the worldwide Esperanto movement. To that end it is striving to incorporate the address of **every** active Esperantist or Esperanto enterprise. Last year it contained **1256 addresses**, in **40 countries**; in June of this year a **yet larger** edition left the press. It costs **only one shilling** to have **your name and address included**; if you send a snap and another sixpence your photo will also appear. The "**B.E.S-a Adresaro**" brings you correspondents from **all parts of the world**, on almost any **theme** imaginable.

Support it and serve yourself by sending four reply-coupons (6 for photo inc.) to agent: Box 731F, P.O., Elizabeth-street, Melb.

### EKZAMENO B.E.A.

Sukcesis ĉe la plej lastaj B.E.A. ekzamenoj:—Elementa: S-ro P. W. Frampton, Christchurch, N.Z.; supra: S-ro C. W. Brandon, Auckland, N.Z. Koran gratulon.

### NASKIGO.



BANHAM (naskita Dawes):—

Al Hilda, edzino de Reginald Banham, fileto (Frank Marcus), en la 27a de aprilo ĉe "Llandyssil" hospitalo, Essendon, Melburno. Ambaŭ bon-sanaj.

La

**M**EMORON PLIFORTIGAS KAJ PERFEKTIGAS laŭ metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio, Profesoro de mnemoniko **D. FAJNSTEJN, VILNO** (Pollando), Zawalna str. 15.

Dank'al mia metodo de mnemoniko, bazita sur leĝoj de **PSIKOLOGIO, FIZIOLOGIO, LOGIKO KAJ PEDAGOGIO, LA MEMORO RESTARIĜAS** ĉe tiuj personoj, kiuj ĝin perdis, **PLIBONIĜAS** ĉe tiuj, kiuj havas malbonan kaj **PERFEKTIĜAS** ĉe tiuj, kiuj havas bonan; samtempe **FORIĜAS LA DISTRECO KAJ MALDILIGENTECO, FORTIĜAS LA VOLO KAJ PLIBONIĜAS ĈIUJ PSIKAJ KAPABLOJ** (influante pozitive la **KARAKTERON** kaj la **NERVAN SISTEMON**) ĉe personoj **ĈIUĜAJ**, komencante de 8 jaroj **ĜIS GRIZHARA MALJUNECO.**

 Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga perkoresponda kurso en Esperanto. 

**NIA POŝTO.**

B. en To. "Akurate" signifas angle "punctually, prompt to date and time." "Akurata pago" ne signifas "correct payment" sed "punctual payment"; esprimo kia "akurata traduko" havas nenian signifon, krom se oni aludas al traduko farita je antaŭe difinita horo aŭ tago. Por la angla vorto "accurate" estas uzablaj (laŭ cirkonstancoj) la vortoj "ĝusta, preciza, korekta, senerara" kaj aliaj; sed neniam "akurata." Sen la fundamenta signifo "punctual," la vorto "akurata" ĉesas havi apartan utilon; kaj estas tre bedaŭrinde, ke kelkaj Esp-istoj ĝin misuzas. (B.L. en International Language, Okt., 1930).

M. en Y. "Midnight," "Midsummer" kaj "Midday." La demandinto bv. legi la regulon 11-an de Esp-o pri la kunmetitaj vortoj, kaj li tuj komprenos, ke la vortoj "noktomezo," "somero-mezo" kaj "tagmezo" estas la solaj uzotaj, se oni parolas pri la "mezo," ĉar la ĉefa vorto staras en la fino.

N. en I. "Left alone with..." "Ŝi lasis min **duopa** kun St. John" (Jane Eyre, trad. Bulthuis).

P. Dean, Podgora, Primorska Bano-vina, Jugoslavio: Via ŝatata abono estas jam finiĝinta. Ni fidas al vi!

M. en Yo. Nia opinie la vojaĝaj priskriboj de s-ro J. Major estas pli interesaj ol tiuj de s-ro Scherer. La unua s-ro pli intime tuŝas la vivon de la popoloj kaj eldiras sian internan penson rilate al la viditaĵoj. Liaj kritikoj estas kuraĝe pikaj, liaj laŭdoj prudentaj.

**PRESIDENT DOUMER AND ESPERANTO.**

La Movado (Paris) informs us that the late President had accepted honorary presidency of the coming world Esperanto Congress in Paris, and had promised to attend in person its inauguration sittings.

**PRI "BREMSI."**

S-ro D.B.T. en Ips. trovis la radikon "brems" en rusa gazeto. Ne sciante ĝian signifon, li demandis al ni. Aldone li skribis: Se ĉiuj naciaj sekcioj aldonadas novajn vortojn al la lingvo, ni baldaŭ havos denove la babelturon.

La vorto estas germandevena:— Bremsen, to apply the brake to a wheel (ein Rad bremsen). La radikon enhavas "La Marista Terminaro" (Rollet de l'Isle), Plena Vortaro de Boirac, Verax (egalaĵo de la Franca "frein," mekanika sistemo por malakceli, haltigi aŭ reguligi movon aŭ funkciadon), la Worterbuch Deutsch-Esperanto de Pfeiffer kaj verŝajne aliaj. Privat kaj kelkaj bonaj verkistoj uzas ĝin. Per tio oni evitas la longajn formojn, "malakceligilo, haltigilo (maŝina, veturila).

**KIAL NE APERIS JUNIA N-RO?**

Tenante en penso la absolutan neceson eldoni la N.Z. specialan n-ron julian, kaj tenante en la redakcia poŝo nur dudekelke da ŝilingoj, mi devis, jam la 28an de majo, fine forlasi esperon enmondigi n-ron por junio. Tiel agante, mi procedas laŭ decido farita en junio 1931, nome eldoni laŭ la enhavo de la S.K. kaso.—(Red.)

**RAPORTOJ PETATAJ.**

Ni petas informojn pri la jenaj kursoj, pri kies ekzisto sciigis s-ro Rawson. Tiu de s-ro Lanyon, ĉe Box Hill (melburna antaŭurbo), kun 18 membroj; tiu de la Amikoj de la Sovet-Unio (gvidanto, s-ro Brooks), 20 membroj; tiu de la Unitariana Eklezio, 18 membroj; kaj tiu de la Brighton'a Teknika Lernejo (s-ro Clive Hughes, gvidanto), pri kiu aperis bona artikolo en "The Education Gazette kaj Teachers' Aid" antaŭ monatoj. La Koburga Klubo havas ĉ. 20 anojn. Antaŭdankon!

**KVAKERISMO KAJ PACO**

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

BONVOLE PETU PER ILUSTRITA POŝTKARTO AŬ LETERO.

DR. FRED. J. WILLIAMS,  
Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

## LETERO DE D-RO ZAMENHOF. (represita el "La Movado," Parizo)

La jena letero estas tre valora skribo, bedaŭrinde ne entenata en la kolekto "Originala Verkaro," kompilita de D-ro Dietterle.

"Ni publikigas ĉi sube la jenan interesan leteron de la Majstro, skribitan unu jaron antaŭ la universala Kongreso en Boulogne. En ĝi li donas konsilojn pri tiu Kongreso, responde al petoj de S-ro Michaux, unu el la organizantoj, kiu estis prezidanto de la organiza Komitato." (La Movado.)

Varsovio, 26-9-1904.

Al Sinjoro Michaux.

Kara Sinjoro, Viajn du leterojn kaj ankaŭ la gazetojn mi ricevis. Estas tre bone ke vi vin turnis al la Franca Societo por Propagando de Esperanto, ĉar efektive estas necese, ke kiel oficiala aranĝanto de la Kongreso aperu, ne la Bulonja Grupo, sed la tuta F.S.P.P.E.

Pri la tempo, kiu estas la plej bona por la Kongreso, mi nenion povas diri al vi; **por mi persone estas tute egale** kian tempon vi elektos. Eble estus utile fari publikan demandon pri tio per la Esperantaj Gazetoj. Pri la Rusoj, mi povas diri, ke la lernado en la Universitatoj, gimnazioj, k.t.p. finiĝas en nia lando ĉirkaŭ la 12/25 de junio; la libertempoj en nia lando estas de la fino de junio (novastile) ĝis la komenco de Septembro. Sekve ĉiu, kiu havas ian staton al instruado aŭ lernado, havos nenian eblon alveturi antaŭ la fino de Junio aŭ post la komenco de septembro.

Sed, ĉar por la Kongreso havas signifon nur tiuj personoj, kiuj intencas efektive alveturi, tial mi pensas, ke estus bone fari jenon: per publikigo en la esperantaj gazetoj peti, ke ĉiu, kiu havas la intencon partopreni en la Kongreso, sciigu vin jam nun pri tio-ĉi, kaj ke li skribu al vi, ĉu la tempo, kiun vi supozas elekti, estas por li akceptebla. Tiam vi povos elekti aŭ forĵeti tiun aŭ alian tempon laŭ la oportuneco de la plimulto aŭ almenaŭ de la Esperantistoj plej gravaj.

En la nuna momento ne venas al mi en la kapon kia teatraĵo estus la plej bona por la Kongreso; sed ŝajnas al mi, ke la Moliera "Le Mèdecin malgré lui" estos bona.

Multe helpi al vi per iaj bonaj konsiloj mi ne povas, ĉar sidante ĉiam dome, mi tre malmulte konas la mondon kaj mi neniam ankoraŭ partoprenis en ia Kongreso aŭ publika festo. Sed ĉion, kio venos al mi en la kapon, mi, de tempo al tempo, skribados al vi. Nur, jam antaŭe mi petas vin, ke ĉion, kion mi skribos al vi, vi volu rigardi nur kiel mian **opinion** (kiu absolute ne devas vin per io ĝeni aŭ ligi) sed **ne** kiel mian **deziron**.

Kiam mi estos iom pli libera (post 5 aŭ 6 semajnoj), mi intencas verki ian specialan **himnon** por la malfermo de la Kongreso. Tiu himno komenciĝos kiel solena preĝo (sed preĝo pure filozofia, kaj neŭtrale homa, por ke ĝi tuŝu la religiajn konvinkojn de neniu en la mondo), kaj finiĝos kiel brua, vigliga, flamiga kaj esperiga marŝo.

Mi intencas presigi por la Kongreso projekton de Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo, kaj se, post matura diskutado en la Kongreso, tiu ĉi deklaro estos akceptita, ni povos ĝin dissendi kiel deklaro de la Kongreso al ĉiuj gazetoj de la mondo, por fermi la buŝon al ĉiuj atakoj de niaj kontraŭuloj.

Mi pensas, ke ni devas frutempe publikigi pri la **kondiĉoj** sub kiuj ĉiu povos partopreni en la Kongreso, kaj en ĉiuj ĝiaj festoj kaj amuzoj (t.e. kiom oni devas pagi, kiu povas havi rajton de voĉo, kaj kiu povos esti nur gasto, k.t.p.).

La Kongreso devas efiki sur la **sentojn**, kaj fari **impreson**, kiel eble pli grandan kaj neforgeseblan impreson. Multe da soleneco, muziko, efektoj por la okulo, k.t.p. Ju pli ni efikos sur la sentojn, des pli niaj Kongresoj kaj, sekve ankaŭ nia afero, fariĝos popularaj en la mondo. Estas domaĝe, ke ni devas akiradi la mondon en **tia** maniero; sed la homoj havas tian naturon, ke oni povas ilin venki nur per la **sentoj**, dum per seka parolado vi nenium konvinkos. Ni devas peni, ke niaj Kongresoj per sia soleneco kaj ĉarmeco fariĝu korekscita, religia centro, kiu allogados ĉiujare la amikojn de internacia frateco el la tuta mondo.

Mi pensas, ke oni devos tiatempe dissendi inviton por la Kongreso al multaj eminentuloj, kaj al la plej gravaj gazetoj de la mondo. Kredeble ankaŭ ekspozicion oni devos aranĝi en la Kongreso.

La Franca Societo por Propagando de Esperanto devas de tempo al tempo publikigadi la supozatan programon de la Kongreso (almenaŭ la punktojn pri kiuj estos diskutate), por ke ĉiu povu prepariĝi aŭ ankaŭ proponi ian aldonon aŭ ŝanĝon por la programo.

Oni devos zorgi, ke post la malfermo de la Kongreso aperu telegramoj pri tiu ĉi en la ĉefaj gazetoj de la mondo kaj pri la solenaĵoj de la Kongreso aperu pentraĵoj en la ilustritaj gazetoj.

Ĉiuj gastoj de la Kongreso devos ricevi ian memorajon, kiun ili poste povos montri al siaj konatoj.

La Kongreso devos ellaboradi fortikan organizadon de nia tuta laborado.

Eble estas bone aranĝi ian historio-etnografian maskobalon aŭ promenadon, finiĝantan per ia danco de internacia frateco?

Mi persone bedaŭrinde ne povas multe zorgi pri la Kongreso, ĉar mia tempo estas ĉiam treege okupata kaj mia kapo estas plena de diversaj zorgoj. Sed se eble venos al mi en la kapon ia nova ideo, mi skribos al vi.

Via, ZAMENHOF.

P.S. Mi skribas al vi ĉion sub la influo de la momento. Multe el tio, kion mi skribas estas nesufiĉe pripensita, kaj eble eĉ tre naiva kaj fantazia; tial mi petas vin ke vi ne publikigu miajn leterojn.

#### NEKROLOGO.

Okazis je la 13a de Junio ĉe Remuera, Aucklando, N.Z., la morto de sinjoro pastro J. H. Hawkes, pensiulo de la Anglikana Eklezio de post la jaro 1913. Naskita en Dublin, Irlando, en 1843, pastro Hawkes venis al Nov-Zelando antaŭ 50 jaroj, kaj estis unu el la fruaj altlernejestroj ĉe Whangarei, Nord-Aucklando. Oni lin povas prave nomi Nov-Zelanda pioniro Esperantista, ĉar tre frue en la nuna jarcento li, kune kun nia fidela nuna U.E.A. delegito, s-ro D. Tilly, fondis Esperanto-klason, kiu floris dum kelkaj jaroj ĉe Whangarei. Translokiĝinte poste al Aucklando, pastro Hawkes daŭris sian agadon por Esperanto tie dum multaj jaroj ĝis tiam, kiam maljuneco devigis lin ĉesi tian laboron. La skribanto trezoras la memoron de vizito al lia pastra moŝto, tiam 79-jara. Li renkontis tre entuziasman, viglan samideanon, kiu malgraŭ sia profunda aĝo, portis koran intereson pri Esperanto kaj vivis en vera Esperantista atmosfero.

—W.H.K.

**Westralian Esperanto Society**, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

**Masterton Esperanto Club** — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksop-rd. Visitors always welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretario f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18 $\frac{1}{2}$ a horo.

**Sydney Esperanto Society**. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club**.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 144 (13th Year), Melburno (Melbourne), Aŭstralio. .10 Aŭgusto, 1932.

## SPECIALA VARBNUMERO

### WHY ESPERANTO SHOULD APPEAL TO WOMEN.

From early times, thinking men and women, conscious of the impossibility of learning all languages or even the chief of them, have occupied themselves with the problem of an international auxiliary tongue. On 15th Dec., 1859, there was born in a little Polish village Lazarus Ludovic Zamenhof, 'destined to be the author of a system which to date has adherents in all civilised countries of the world and bids fair to gain recognition as the world's official "help-language." Over 4000 books form its growing literature, "consuls" are found in 1800 towns throughout the world, and trade, radio and education are daily recognising in Esperanto a power in the affairs of men.

Esperanto is many times easier to acquire than any national language. A daily half-hour, spent in conscientious study, should enable the student in three months to read and write the language fluently enough to correspond with the four corners of the earth. By the end of the year she should be able to speak it and enjoy its literature.

Women form a large proportion of the world's Esperantists. Some of its chief propagandists and organisers are women. The clubs throughout the globe are half feminine. How many of you have availed yourselves of this wonderful medium for international communication? How many of you are still ignorant of the infinite wealth of foreign friendships and cultural broadening Esperanto holds for those who use it?

You that are fortunate enough to

travel the backwaters of old Europe, far from the well-worn tourist tracks, can you enter into the intimate life of the Bulgarian peasant, the French provincial shop-keeper, the boatman on the Norwegian fjord? Esperanto, the Latin of Democracy, while sponsored by some of the greatest intellects, yet finds thousands of adepts among the simple folk, the countryman and the artisan. While English may serve in a stereotyped way, on the beaten paths of world travel, only Esperanto gives one entry into the true life of a people.

Those who cannot go abroad can exchange ideas by post with thousands of Esperantists in other countries. This should specially appeal to the collectors and to those with special interests and hobbies.

There is much in Esperanto literature to attract the Australian woman. Selma Lagerlof, Sweden's foremost authoress, and Nobel Prizewinner, has already seen one of her books appear in Esperanto and has consented to the publication of all her work in that language. The thrilling travel story, "Through Wild Kamchatka," printed in twelve tongues, has just been published in Esperanto. It tells of the adventures of Mr. and Mrs. Sten Bergman, Swedish scientists, in a remote icebound quarter of the globe. Miss Lilian Pyke's "A Wife by Proxy," a book well-known to Australian readers, was in 1930 published in Esperanto by a Cologne firm. One of the most touching stories of the degeneration of a good woman under the weight of evil circumstance is provided by Zamenhof's translation from the Polish

of the work "Marta," a figure to be compared only with Fantine, in "Les Miserables." To appreciate this work alone, unobtainable in English, surely repays for the time spent in mastering Esperanto.

Let me now touch on Esperanto in the service of Peace Movement. Women play a conspicuous part in the world peace crusade. What an advance would be made on this front if the delegates of the various conferences held to promote the cause were able to understand one another without the unsatisfactory and time-wasting machinery of translation and interpreting! Some of the noblest-spirited women have seen their work weakened or frustrated by inability to express themselves freely owing to the language difficulty. But the Peace organisations are bestirring themselves in this direction; and the time is not far distant, we hope, when the auxiliary language, Esperanto, shall be regarded as official in all such deliberations. When such is true the words "international understanding," to many of us flat and empty, will be invested with meaning and reality.

A language that for 23 years has brought the peoples of 40 nations to an International Congress characterised by the harmonious relation that comes from the unfettered interchange of thought and sentiment is surely worth the world's attention.

It has survived the shock of universal war; it is spreading despite the present unprecedented economic crisis; it lives on the lips of the most widely diverse races. Thus it has proved permanent, the possessor of enduring vitality, and has no fear of being displaced by other systems or of falling into dialect.

True, the modest little Polish oculist, Dr. Zamenhof, its author, although he lived to see his life work established and expanding, did not have the joy of final victory. In 1914 the war shocked rudely his dream of brotherhood and love among the peoples. In Warsaw, under the German occupation, something broke in Zamenhof's heart. He was weak and sick, and intense disappointment weighed him down. Seeing death in front, he yet feverishly labored to effectualise the idea of true fraternity, but he knew peace no more, dying on 14th April, 1917, aged 57.

Only some Polish friends and his humble clients of the poor Hebrew quarter could say good-bye in the name of the universal body of Esperantists, for all the frontiers were closed. "He never sinned," whispered his old servant, intoxicated with love and admiration. Such was the death of one whom to know was to love, and several Australians knew him. Apart from his main labor in composing his language he bequeathed to the world masterly translations from a dozen tongues, including the whole Hebrew Bible.

Some may ask, How can one find Esperantists when one travels abroad? True, they are not yet as thick as peas, and found on every street. You join the Universal Esperanto Association, headquarters in Geneva, for 5/-. You thus get its year book, in which you find thousands of addresses from all parts of the world, and simply use it! You inform by card the "delegate" or "consul" of the town or village you intend to visit. He meets you and helps you in every way possible.

Some time ago, two New Zealanders, wishful of seeing the lesser known parts of Europe, set out from Greece to go through the Balkans north. They spoke only English and French. It so happened that they arrived by train in a Balkan village only to be arrested as spies by the Turks, then at war with the Bulgars. Impotence before the language barrier led them to be confined in a Turkish prison some time before the matter was satisfactorily cleaned up. Had they known Esperanto, and had their year book with them, they need only have pointed out the address of the nearest "delegate" and a most unhappy and even dangerous situation could have been avoided.

Any who are willing to learn Esperanto should get in touch with Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melbourne, for particulars and list of textbooks.

(Broadcasted from 3DB, Melbourne, on Wednesday, 29th June.)

### NIA POSTO.

Bobo. La letero de Zamenhof (n-ro 143) estis kopiita laŭ la plej ekstremaj detaletoj. En la teksto de "La Movado" sidas foje majuskloj (grandaj komencliteroj), foje minuskloj (malgrandaj) por la monatnomoj. F.S.P.-P.E. signifas "Franca Societo por la

Propagando de Esperanto."

Reg. C. en R. demandas, "ĉu la vorto "klaso," kiu aperis en la Kroniko, n-ro 143, estas tute ĝusta? Kial ne "kurso"? Mi opinias, ke "kurso" riatas al soci-ordo." Respondo: Laŭ la Plena Vortaro la vorto "klaso" havas kvar signifnancojn, inter ili estas "aro el ĉiuj lernantoj, kiuj sekvas iun gradon de studkurso." En la fama "Letero al Borovko" (Zamenhof, tradukita V. Gernet) troviĝas "kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio..." Millidge ne donas la sociologian difinon, kiun la Plena Vortaro tamen metas unua. Tial, ni ambaŭ estas pravaj. Dankon pro via gratulo kaj konstanta intereso!

### THE 1932 "B.E.S. ADRESARO" Just Arrived!

For one shilling may be had from Box 731F the above excellent vade mecum of the "korespondemulo"-Esperantist. Apply early as there has been sent only a very small number of them.

This 10th edition is not only a mine of ordered information about the Movement, but provides interesting reading matter in the form of a well written foreword and history, and a valuable "dictionary" of useful abbreviations. Get the B.E.S. (Bohema Esp. Servo) Adresaro now!

### FOTOGRAFISTOJ!

Ĉiulandaj profesiuloj, amatoroj kaj interŝanĝantoj de fotoj estas insiste petataj registriĝi plej baldaŭ ĉe la subskribinto. Celata estas: Eldono de adresaro, starigo de internacia organizo, kreo de fotografa terminaro, eldono de foto-revuo. Włodzimierz Pfeiffer, Delegito de U.E.A., Ksiagarnia Fiszerka, Lodz, Pollando.

### KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA.

Fondita en 1911 en Antverpeno ĉi ligo celas disvastigi Esp-on en evangelikristanajn rondojn. Lastatempe ĝi faras sukcesan agadon precipe inter la nederlandaj protestantaj Esp-istoj. La kresko de la anaro dum la lasta jaro preskaŭ ebligas revivigon de la iam konata ligorgano "Dia Regno." Paul Hubner, Polkenstrasse 4, Quedlinburg, Germanujo, urĝe petas ĉian evangelian Esp-iston aliĝi al la Ligo. Jarkotizo estas minimume nur 4 resp-kuponoj. Petu la "Informilon"!

### TO OUR SUPPORTERS.

We draw attention to a new departure inaugurated with this number. Until further notice a **blue** cross will appear on the wrapper of all those whose subscription has **recently** lapsed, that is, within the last two months. A **red** cross will be placed on the wrappers of all those whose subscriptions have been overdue for some time longer than that. Now, it so happens that a reader may owe for, say, three years and then send us nine shillings. This, of course, leaves him lapsed still a year. In order to give an accurate reflection of the state of things and facilitate the system, we have decided to include his wrapper in the red-marked ones. We trust that this means of reducing postal charges and of promptly informing subscribers of expiration will be satisfactory to all.

Received with thanks:—Miss L. Irwin, 4/6, June, '33; Miss C. Hannaford, 5/-, July, '32; Mrs. Purnell, 5/-, June, '33 (and gift 5/-); Mr. Guilbert, 4/6, June, '33; Rev. A. Lambton, 4/6, July, '33; Miss Ryan, 4/6, June, '33 (and 6d. gift); Yuzo Hasegawa (per Miss Ryan), 5/-, July, '33; Miss Hopton, 4/6, June, '33; Mr. H. Love, 4/6, June, '33; Mr. Cox (sales) 1/-; Hobart Club (per Messrs. Guilbert and Simmons), 13/-; Miss L. Saw, 4/6, July, '33; Mr. F. McArdle, 2/6, Feb., '30; Mrs. A. Heintze, 4/6, Jan., '33; Mr. J. Hodges, 5/-, June, '33; Mr. Dandridge, 2/3, Dec., '32; Mr. Hayes-Williams, 5/-, June, '33; Mrs. McCabe, 4/6, June, '33; Herr R. Strauss, 4/1, Dec., '32; adv., 2/-; Miss E. Chisholm, 5/-, May, '33; Mr. J. Girdwood, 4/6, June, '33; Mr. H. Franks, 10/6, Jan., '33; sales (Messrs. Holloway, Cox), 9d.—Total: £5/16/7.

### GERMANLINGVANOJ!

Mi deziras plumamikon, kiu konsentus preni sur sin la taskon traduki mal-longajn artikoletojn, kaj frazgrupojn, pri Esperanto el la germana en Esperanton. Reciproke mi same farus el la angla en E-ton por li. Celante tre-precizecon en tiu laboro, mi petas, ke bonvolu respondi nur tiuj serioze studentaj kaj la patran lingvon kaj Esp-on.

Germanglo, ĉe "La Suda KrucO," Box 731F., P.O., Elizabeth-str., Melbourne.

### “LA SUDA KRUCO”

fermis la jarkonton (Junio 1931-32) kun kelkŝilinga surpluso. Tio montriĝis ebla nur pro la jenaj konsideroj: (1) Vendo de jarkolektoj, (2) Donacoj de monsumoj, (3) Reklamoj, kaj (4) Neapero de n-roj por Septembro, 1931 and Junio, 1932. Malgraŭ tio, ke 20 novaj aliĝis la abonliston, la efektiva abonforto bedaŭrinde malpliĝis, kelkaj eĉ fervoraj amikoj de la gazeto esprimis letere sian nepran devigatecon ĉesi perpoŝan subtenon. Sed la espero devenas de eterna fonto. Pli bonan jaron 1932-33! Ne lasu forvaporigi la kuraĝon!

#### ERARO:

Paĝo 366, kol. 2, linio 31: “supra” (legu: supera).

### “ORA MASKO”

Vol. unu.

De Rampo Edogaŭa, tradukita  
J. Simomura.

Eldonita de la Japana Esperanto  
Asocio, Tokio.

Paĝoj 110; prezo ne indikita.

Estas ne facila tasko doni kontentigan taksjuĝon de libro, pri kiu la recenzanto scias nur enhavon de la unua volumo. Se ĉi volumo entenas duonon, oni rajtas plendi je tio, ke la eldonistoj ne aperigis tian nelongan verkon sub unu kovrilo.

La fi-farojn de la Ora Masko (efektive: Arsene Lupin!), fantomeca krimulo, la japana publiko poparte legadis en tokia taggazeto “King.” Kun iom novece stranga sento la eŭropano sorbos tiun tipan felietonon de por li tre fremdmora popolo. Sed Kogoro Akeĉi okupas rolon familieran jam al milmiloj da anglaj kaj francaj legantoj de la Sherlock Holmes kaj Arsene Lupin rakontaroj—tiun de la amatora detektivo “enŝovanta la nazon” ne plaĉe al la oficialaj krimul-serĉistoj. Bedaŭrinde por la hardita legulo de pri-krimaj fikciaĵoj, Akeĉi faras malmulton eksterordinaran en la unua volumo. Espereble li pli originale agados en la sekvonta.

Ni salutas ĉi tiun manifestajon de kreskanta literatura produkemo ĉe niaj ekstrem-orientaj samideistoj, sed, verdire, pli serioza romano pli ĝojigus nin ol ĉi iom krudefakta gazetaĵo. Ĉu ne estas disponeblaj por la E-ta tradukemulo en Japanujo imago-verkoj rakontaj, jam akirintaj rajtan laŭdon

ĉe literaturaj rondoj? En antaŭparolo diras la verkinto: “La japanaj kriminalaj rakontoj ne estas sole tiaj, kia estas ‘Ora Masko,’... Ĝenerale ili estas pli bontonaj kaj intelektaj. ‘Ora Masko’ estis verkita por la gazeto ‘King,’ havanta pli ol milionon da legantoj; sekve, bonvolu memori, ke mi ĉefe celis, ke ĝi estu amuziĝe komprenata de ĉiuj junaj kaj maljunaj...de ĝenerala popolo.” Tio ne estas trea komplimento al la Esp-istaro, sed eble klarigas la trivialecon de la enhavo.

La bindo krep-ora kaj la sola ilustraĵo bone konformas al la spirito de la teksto. Per kelkaj siaj karakterizoj la tradukaĵo sin montras esti provo de homo verkanta en lingvo, kies sintakso estas supozeble forte diferenca de tiu de la gepatra. Sed la okaza uzo de Zamenhofa esprimo promesas disvolviĝon ĉe s-ro Simomura de pli internacia stilo. Neĝusta (ne)uzo de la artikolo; iii, “tio devus kaŭzi” (tio tre povas kaŭzi, A. that may well cause); 9/5, “kiam ankoraŭ scivoluloj ne amasiĝis” (kiam s. jam ne amasiĝis); 53, “la 12a” (la 24a, noktomezo), bone estus, ke en E-to oni uzu komune saman hor-indiksistemon; “narkot(ik)” (kial du radikoj por sama objekto?); “spuro”, (G. Spur, postesigno); 91/18 devas teksti: “ne nur tiuj, kiuj ne scipovis naĝi, sed ankaŭ tiuj, kiuj povis, egale perdis...” Kelkaj radikoj ne troveblaj en la pli uzataj vortaroj bezonas noton.—(Robo.)

#### PRI PAĜO 346.

Pri la ĉefartikolo en la aprila n-ro de “La Suda Kruco” s-ro M. C. Butlér skribas (mi tradukis):—“Pri ‘Recenzado’ mi konsentas. Tamen eĉ en ‘The British Esperantist’ foje aperas iom longaj recenzoj se spaco troviĝas por tio. ‘Jarmiloj Pasas’ estis de mi mem recenzita—ne laŭde. Sed tio estis ‘voĉo de kianto en la dezerto.’ Recenzo 37-paĝa miapluma pri la Biblio aperis en ‘La Kristana Revuo’; restas ankoraŭ la samlonga cetero, kiu ne povis aperi pro la morto de la gazeto.”

Ni dankas al s-ro Butler pro lia intereso, sed responde dirus, ke la “iom longaj” recenzoj de “The British Esp-ist,” cetere tre legindaj, ne konformas kun la ampleksaj kritikaj skriboj, kies maloftecon en nia gazeta literaturo mi kaj aliaj sentas.

La valora studo de s-ro Butler pri la

Biblio estas preskaŭ pure notado de la Zamenhofa lingvouzo kaj ne viciĝas en la kategorion de ĝuste nomitaj "recenzoj."

En la tempo kiam la aprila S.K. artikolo estis skribata, ankoraŭ mi ne ricevis la "Germana Esperantisto," en kiu troviĝas tre bonaj librokritikaĵoj ĉefe de Karl Minor. En la germana lingvo li verkis, inter aliaj, detalan **sespaĝan** studon (marto '32) de la Esp-a traduko de "La Vojo Returne" (Remarque). Jen ekzemplo imitinda por niaj supraĵemaj banaluloj. La ok-kolumna kritiko de Nekrasov pri "La Vila Mano" (Bulthuis) en "La Nova Etapo" (Moskvo), malgraŭ ia ideologia koloro, ankaŭ montras la paciencon kaj akra videmon necesajn ĉe tiu, kiu prenas sur sin la taskon taksu fidele kaj laŭmerite la pli gravajn verkojn de la Esp-a literaturo.—(Red.)

### TRI GAZETOJ.

Alvenas al ni en la sama tempo la "Espero Katolika," "La Nova Epoko," kaj "La Nova Etapo." Laŭ nia nuna kono la unuenomita estas la plej malnova ankoraŭ aperanta tutesperanta gazeto (28a jaro.) Redaktita en Hispanujo de pastro J. Font Giralt, ĝi celas prezenti ĉion, kio povas interesi aŭ informi al la romkatolika Esp-istaro. Ampleksa, bele presita, la jan-februara n-ro enhavas i.a. atentindan artikolon pri "Pio xi kaj Rusujo" kaj "Letero el Hispanujo. Ĉi organo de la Internacia Katolika Unuiĝo E-tista sin nomas monat-aperanta, kaj kostas 30 francajn frankojn (ĉ. 5ŝ.) ĉe Prov. de Gerona, Collell, Hispanujo.

"La Nova Epoko" estas literatura-sciencia organo de la Lanti'a (sennaciula) frakcio de la klasbatala Esp-istaro.

Ilustrita per belaj reproduktaĵoj, la nuna n-ro entenas, krom aliaj bonaj, ĝuindan studon "La Universala Genio de Goethe," artikolon pri la situacio de la verkistoj en Sovetio, kaj konservindan recenzon de "Eterna Bukedo" (Kalocsay) fare de N. Bartelmes. Dumonate; 3ŝ. ĉe R. Lerrhner, Kolmstr., 1, Leipzig, Germanl.

"La Nova Etapo" estas literatura-lingvosciencia organo de la Moskva (internaciista) frakcio de la klasbatala Esp-istaro. Tre valora kaj interesa kompilaĵo. "Kritika skizo pri la romanoj de J. Bulthuis"; "Heine kaj Komunismo"; "Genia lingvisto (Zamenhof) venkita de etburĝeco" en n-ro 1. La redakcio promesas en venontaj n-roj "Kritika skizo pri la verkoj de Jean Forge" kaj "Kiel Zamenhof ricevis la francan ordenon de honora legio. Neniam publikitaj sekretaj dokumentoj el arĥivo de la rusa carisma polica departemento en la jaro 1905." N. V. Nekrasov, CK SEU. Spiridonovka 15, Moskvo 1. USSR. Abono por 6 kajeroj: 4 mark. germ.

### PRI LA JAPAN-ĈINA AFERO.

La mondopaco estas nun en danĝero pro miskompreno aŭ pli ĝuste pro malkono. Jus aperis: LA KONFLIKTOJ EN MANĈURIO KAJ SANKHAJO, kun aldono pri agado de U.H.A. en Ĉinujo. Pg. 60 kun 8 fotoj. Formato 13 x 19 cm. Prezo tre mal-kara—ses pencoj aŭ du resp. kuponoj.

Ĉiuj Esp-istoj legu la broŝuron kaj ekposedu la ĝustan konon pri la konfliktoj.

Mendu al UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO, Kameoka, Kiotu-hu, Japanujo; aŭ s-ro K. Niŝimura, 1 rue Felix-Faure, Paris (15e).—(Anonco.)

The administration of "La Suda Krucio" invites every non-subscriber receiving this copy to fill in the following, and so aid in guaranteeing regular monthly appearance of the gazette.

### SUBSCRIPTION FORM.

I wish to subscribe to "LA SUDA KRUCO" from the month of ..... and herewith enclose the sum of 4/6 (New Zealand, 5/-).

Signed.....

Address.....

Date.....

## MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF. (N-ro 2.)

“Se venos iam la tempo, kiam la tuta mondo scios kaj uzos la lingvon Esperanto, tiam—neniu dubos—ni povos kuraĝe diri, ke nia afero absolute atingis la celon. Ju pli multe da homoj ekscias kaj ekuzas nian lingvon, des pli multe ni proksimiĝas al nia celo, des pli multe ni progresas. Sekve la sola efektive vera montro, ĉu ni progresas aŭ ne—estas la kreskado aŭ nekreskado de la nombro de esperantistoj. Ĉio alia estas nur rimedoj, sed ne faktoj. Se eĉ la tuta mondo bruos pri nia afero, se nia afero brilos en ĉiuj publikaj lokoj, sur ĉiuj ekspozicioj de la mondo k.t.p., sed la nombro de la personoj kiuj elernas kaj uzas nian lingvon ne kreskos—tiam ni malgraŭ la ŝajna potenco devos diri, ke nia afero mortis, ke ĝia lumo baldaŭ estingiĝos, kiel la lumo de minuta meteoro; sed se eĉ la tuta mondo silentos, se ĉiuj obstine kovros antaŭ ni la okulojn kaj la orelojn, se nia afero longe ankoraŭ restos nekonata en la plej granda parto de la mondo, sed se la nombro de la esperantistoj regule, se eĉ malrapide restados (a),—ni povos kuraĝe diri, ke ni regule progresas, ke ni regule iras antaŭen kaj ke la estonteco apartenas al ni” (Originala Verkaro p. 158/9; el “La Esperantisto,” 1892).

(a) Ĉu ne skriberaro por “kreskados”?  
(Red. S.K.)

## “TUTMONDO KOLEKTANTO”

La sola gazeto por kolektantoj. Redaktas d-ro Jozefo Takacs. Administracio en Jablonne n. Orl., Ĉ.S.R.—Aperas dumonate. Abono 0.40 dolaro aŭ egalvaloro. Specimenumero kontraŭ respondkupono.

“La Suda Kruco” rekomendas.

## MENCIOJ.

“Que es la Esperanto: 16-paĝa folieto koncize, efike klariganta la nunan staton de Esperanto kaj ĝian strukturon, kaj donanta citindajn dirojn de famaj homoj pri la lingvo. Hispanlingva, verkita de Julio Mangada Rose-norn. Presitaj dekdumil, el kiuj disdonitaj dekmil. Petu al Asociacion Esperantista Espanola, Sagasta 10, Asamblea Suprema de la Cruz Roja, Madrid.

**Scienca Gazeto Esperanta:** Dumonata gazeto popolscienca. Komparate kun la organo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista ĉi tiu usona eldonaĵo montriĝas supraĵeca. La artikoletoj konvene sidus en la tielnomata scienca suplemento (aldonaĵo) de porpopola sabata taggazeto. Amerika Esperanto-Instituto, Madison, Wisconsin, U.S.

“**Esperantlingva Novelbiblioteko,**” redaktata de Leono Vienano. N-ro 1, “**Eksiĝo,**” el la hebrea originalo de Naum Jeruŝalmi trad. L. Vienano. 40 paĝa kortuŝa rakonto pri la amo de juda lernejservisto al ventkora kuracisto. Lerte verkita, flustile tradukita. Ni salutas aperon de bonaj tekstoj kia estas ĉi tiu sed kial eldoni mizerajn kelkfoliaĵojn anstataŭ uzi dekon da ili en vere inda libro? Notinda estas “eki” (unue provita de Fiŝer en “La Portreto,” 1911); 37, stranga uzo de “nur” anstataŭ “ĵus” (la knabino nur (ĵus) transpaŝis la sojlon); 9, “sefardaj” bezonas noton; 8, kial “liroj”? La verko ne estas Italaĵo. Korekten-daj: 12, katedroj (katedroj); 14, “mi ne sukcesos okupi sin” (min); 15, (la) Dia nomo. La tradukinto uzas transitive jen “ordi,” jen “ordigi”; 31 ...kiu daŭris ĉirkaŭ du horoj(n). Ankoraŭ pli da atento estas necesa flanke de la redaktejo, por plene verigi ĝian diron, ke ĝiaj verkoj estas liberaj de lingvaj malĝustaĵoj. Prezo 6p. ĉe N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki 8.

## KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

BONVOLE PETU PER ILUSTRITA POŝTKARTO AŬ LETERO.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

La konfliktoj en Manĉurio kaj Ŝanhajo; pri la agado de la Universala Homama Asocio en Ĉinujo, eldonita de la U.H.A. en Kameoka, Kiotu-hu, Japanujo. Ok fotopaĝoj, 50 paĝoj da teksto. Vidu ĉi-numeran anoncon. Porjapana prezento de la ekstremorienta demando. Bona Esperanto. Iuloke iom akratona ("Ni ne dubas ke en la proksima estonteco ili (la grandpotencoj) mem spertos ke dankemeco ne ekzistas en Ĉinujo"). Verkita parte de s-ro Jozef Major, kiu lastatempe en siaj skriboj montras senduban "Japanujemon." La dua parto de la broŝuro elspiras malpli naciecan, pli neŭtralan spiriton, kiu strange kontrastas kun la vigla defendemo de la japana vidpunkto karakterizanta la unuajn du artikolojn. Sed eĉ en la dua parto, en kiu troviĝas priskribo pri multa bonfaro flanke de la U.H.A., sonas sur p. 42 disputa noto. Tie diras la Siberia Homama Asocio: "Ni kredas, ke kresko de la potenco de via Japanujo...kvietigos la ŝanceliĝeman politikon de orienta Azio." 20 "dekada ĵurnalo" (?); 16 "naturalizigitajn" (nacionigitajn). La citita formo, cetere nenecesa, estas tro sufikshava.—(Robo.)

### LA UNUA SUPLEMENTA LEGOLIBRO DE ESPERANTO.

de Kooĵi Taŝiro.

eld. Esperanto-Kiboŝa, Tokio.

Iom mistere la verkinto antaŭparole diras: "Kiam mi pensas pri la sufero de la pasinteco de mi mem, mi ne povas resti silenta. Tio estas la sola motivo, ke mi verkis tiun ĉi broŝuron." Ĉu li aludas al la teruraj lernjaroj, tra kiuj li devis cerbumadi en fremdlingvaj klasoj?

La libreto konsistas el paĝoj da simplaj frazoj, kun konformaj liniitaj blankoj, kiuj permesas la notadon de klarigoj donitaj de la instruisto. Por elementaj ekzamenoj tiu ĉi eldonaĵo bone taŭgas.

P. 24, "la 6a posttagmeze" (kial la E-tistoj ne uzas saman hor-sistemon?); 46, "gardenia-arbo" (?); 52, "historialeciono" (for streketon); 88, malbone uzi en lernlibro akuzativon post "ĉe," formon nezamenhofan kaj disputatan. Prezo neindikita.—(Robo.)

### PIKANTAĴOJ.

"Ni havas la impreson, ke la Redakcio de 'Literatura Mondo' tro favori-

gas (sic) certajn anglajn verkistojn, kies lingva kapablo kaj literatura talento ne meritas tiom da konsiderado. Ni esperas, ke en la estonto ili pravigos la krediton tiel grandanime donitan de nia ĉefa literatura organo."

—J.M., en "Oomoto," Japanujo.

"(La ĵus aperinta) tria parto de la 'Fabeloj de Andersen,' tradukita de Zamenhof, estas sendube bonvena, ĝuste en la momento, kiam multaj verkemuloj, sciantaj aŭ ne la lingvon, rapidegas fabriki librojn."

—"Oomoto Internacia."

### SPORTULOJ POR ESPERANTO.

La pola gazeto "Dziennik Bydgoski" donas Esp. anguleton, enhavantan la plej novajn sciigojn el la sportmondo. La gazeto kredas, ke Esp-o fariĝas la estonta internacia sportlingvo, kaj petas eksterlandanojn sendi resumojn de la plej gravaj novaĵoj por represio. Flankdire, ni petus la gazeton ne uzi "meĉon" (konkurso, konkuro) sence de la angla "match," sporttermino. Adresu: Scienca Esperanta Rondo, Bydgoszcz, Poland.

### UKRANIO ANTAŬEN!

Jam kelkfoje la ukrania Centrasindikata direktivo helpis al la Esperantolaboro. La 10 septembro la tutukrania sindikato decidis sisteme akceli lernadon de la internacia lingvo. La plano 1931/2 montras jenan ciferon pri Esp-lernantoj enregistritaj: en rondoj kaj kursoj 10,000, radio 2,000, korespondaj kursoj 1,000, perfektigaj radiokursoj 1,000, entute 14,000! Esperanto per tio konsistigas 25 procenton de la sindikata lingvokursaro.

(El Arbeiter-Esperantist)

### BONE!

En la jara kunveno de akciuloj de la Akcia Societo "Centra Esperanto Libreo" en Hago (Nederlando), la 27an de Februaro, la bilanco kaj la konto de perdoj kaj profitoj estis aprobatataj kaj la dividendo pri 1931 fiksata je 7% (kiel antaŭan jaron).

La kunveno decidis donaci 102.53 guldenojn al la komitato por la starigo de la Zamenhofa monumento en Bjalistok (Polujo). (Proks. £7/10/-.)

**SIDNEJA ESPERANTA SOCIETO.**

Ĉe la jarkunveno de la societo la 30an de junio ĉefaj oficistoj estis elektitaj por 1932-33:—Prez., s-ro A. W. Peacock (S.A., U.E.A.); vic-prez., s-ro T. Perry kaj s-ino J. G. Mair (vic-del. U.E.A.); sek-io, s-ro L. E. Pfahl (del. U.E.A.); helpsek-io, s-ro L. Hiller; kasisto, s-ro H. Davies (U.E.A.); kontrolanto, s-ro V. Rutland (U.E.A.) kaj bibliotekisto, f-ino F. Smith (U.E.A.).

La prezidanto, leginte sian raporton pri la funkcio de la societo dum 1931-32, diris, ke malgraŭ forte malhelpanta monmanko estas konstata progreso. Jam stariĝis filioj aŭ grupoj ĉe Petersham, Parramatta, Punchbowl, Redfern kaj Waverly. Leteroj el kelkaj enlandaj lokoj montris, ke granda intereso tie floras pri la E. movado. La publikaj instruparoladoj ankoraŭ daŭros dum la nuna jaro. Pri tio ni baldaŭ informos pli precize. La nove elektitaj esprimis sian intencon neniel malpene miĝi dum sia oficeno. Vivu E-to!

—A. W. Peacock (Prez. S.E.S.)

**Melburno, Vic.**—La 28an de Junio, kelke da anoj de la Melb. Esperanto Societo sidis por la B.E.A. ekzamenoj.

Je la 4a de Julio la jarkunveno de la Societo okazis, kaj la oficistoj elektitaj por la sekvonta jaro estas jene: Prez., s-ro P. Hudson; Vic-Prez-oj, s-ro C. W. Ballard, kaj f-ino H. Bostock; Sek-io, f-ino L. Irwin; Kasisto, s-ro E. Cox (re-elektita); Bibliotekisto, f-ino V. Cox.

La pasintjara bilanco montris, ke la financa stato de la Societo sufiĉe kontentigas. La prezidanto, s-ro P. Holmes, proponis dankesprimon de la klubo al f-ino Cox, pro ŝia bona servo al la Societo dum kelke da jaroj kiel sekretariino. S-roj Ballard kaj Hudson kore subtenis la proponon, al kiu f-ino Cox taŭge respondis.

La Melb. Klubo elsendis alvokon "Venu al la Frenezaĵoj" je la 29a de Junio. Staris sur la programo rusa danco, "tragedia" prezentaĵo kaj aliaj ridindaj eroj. Kiel kutime la ĉeestantaro pasigis feliĉan vesperon.

**Is there a blue or red cross on your wrapper?**

**Westralian Esperanto Society**, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

**Masterton Esperanto Club** — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksop-rd. Visitors always welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunveno: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18<sup>1</sup>/<sub>2</sub>a horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.